# EL Popola ĈINIO

N-ro 11 NOVEMBRO 1967






Granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ

# Bombardu la Komandejon

## —Mia Dazibaŭ-o—

(La 5-an de aŭgusto, 1966)

MAŬ ZEDONG

Kiel bone skribitaj estas la unua marksism-leninisma dazibaŭ-o (opini-afiŝo) en la tuta lando kaj la artikolo de komentisto de "Renmin Ribao" (Popola Ĵurnalo)! La kamaradoj bonvolu ankoraŭfoje tralegi la dazibaŭ-on kaj la artikolon. Tamen, dum pli ol kvindek tagoj, iuj gvidantaj kamaradoj en institucioj, de la centraj ĝis la lokaj, iris en inversa direkto. Prenante la reakcian burĝan starpunkton, ili praktikis la burĝan diktaturon, subpremis la ardantan movadon de la granda kultura revolucio de la proletaro, inversigis pravon kaj malpravon, konfuzis nigron kun blanko, organizis ĉirkaŭatakojn kontraŭ la revoluciuloj, subpremis malsamajn opiniojn, praktikis blankan teroron, kaj estis tre memkontentaj pri siaj faroj. Ili kreskigis la arogantecon de la burĝaro kaj sufokis la batalvolon de la proletaro. Kia vipura malico! Ĉu tio ne povas igi nin profunde pripensi, se ni ligas ĉion ĉi tion kun la dekstra tendenco en la jaro 1962 kaj la erara tendenco, forme "maldekstra" sed fakte dekstra, en la jaro 1964?




*Centmilionoj da popolanoj kaj armeanoj entuziasme aklamas la unuan datrevenon de la publikigo de la dazibaŭ-o de Prezidanto Maŭ* Bombardu la Komandejon.

*Pekinaj proletaj revoluciuloj kaj junaj ruĝaj gvardianoj solene celebras.*



# Prezidanto Maŭ Inspektis Nordan, Sud-centran kaj Orientan Ĉinion

Sub la senprecedence bonega situacio de la granda proleta kultura revolucio, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ inspektis lastatempe nordan, sud-centran kaj orientan Ĉinion kaj enketis pri la stato de la granda kultura revolucio en la provincoj Henan, Hubej, Hunan, Gianghi, Ĝegiang kaj la urbo Ŝanhajo.

Nun, Prezidanto Maŭ jam revenis al Pekino.

(*Hinhua-a Novaĵ-agentejo, la 24-an de septembro 1967*)


*La proletaj revoluciuloj de la Pekina Akvoproviza Kompanio kantas kaj dancas por aklami la revenon de Prezidanto Maŭ al Pekino post lia inspekto pri la granda proleta kultura revolucio en norda, sudcentra kaj orienta Ĉinio.*



HIANGJANG:

# Ĉie Cirkulas la Ĝojiga Informo tra la Lando

*En Ŝaŭŝan, la loko de kie leviĝis la ruĝa suno, la proletaj revoluciuloj varme aklamas la alvenon de Prezidanto Maŭ al Hunan por inspekti tie la grandan proletan kulturan revolucion.*



ĈE ambaŭ borboj de Jangzi-rivero tondre leviĝas ĝojkrioj, kaj en amdaŭ flankoj de la Granda Muro ĉielskue sonas gongoj kaj tamburoj!

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam venke revenis al Pekino post siaj inspektado en la regionoj de norda, sudcentra kaj 'orienta Ĉinio kaj enketado pri la stato de la granda kultura revolucio en Henan, Hubej, Hunan, Gianghi, Ĝegiang kaj Ŝanhajo.

Sub la senprecedence bonega situacio de la granda proleta kultura revolucio en la tuta lando kaj en la nova fluso de la revolucia amasa kritikado kaj granda revolucia unuiĝado, venas la ĝojiga informo tiom kuraĝiga por la amaso. Ni krias senretene: Longe vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ, la plej plej ruĝa suno en la koroj de la ĉina popolo kaj de la popoloj en la tuta mondo!

La inspektado de Prezidanto Maŭ certe irigos nian grandan proletan kulturan revolucion de venko al pli granda venko.

La inspektado de Prezidanto Maŭ estas esprimo de lia plej granda zorgemo, plej granda kuraĝigo kaj plej granda instigo al nia tuta popolo kaj al la tuta armeo!




*La proletaj revoluciuloj de Gianghi varmege aklamas la alvenon de Prezidanto Maŭ por inspekti en tiu provinco.*

Ho, granda gvidanto Prezidanto Maŭ! Vi plej multe fidas al la amaso, zorgas pri la amaso, subtenas revoluciajn movadojn de la amaso, lertas en trovado kaj koncentrado de la saĝo de la amaso kaj respektas la revolucian iniciatemon de la amaso. Ekde la granda kultura revolucio, Vi akceptadis fojo post fojo revoluciajn amasojn en milionoj nombrantajn, kaj lastatempe Vi plie iris persone al diversaj lokoj por tie inspekti kaj profundiĝi inter la amasojn por enketi kaj esplori. Vi ja restas ĉiam inter la revoluciaj amasoj kaj kunligiĝas kun ili koro al koro!

Ho, granda gvidanto Prezidanto Maŭ, via bonfarto estas la plej granda feliĉo por nia tuta popolo kaj por la revoluciaj popoloj de la mondo!

Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Vi estas nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto.

Estas Vi, kiu kunligas marksism-leninismon kun la ĉina laborista movado, kreis la grandan Komunistan Partion de Ĉinio, genie, kreive kaj plenamplekse heredis, defendas kaj disvolvas marksism-leninismon, levis ĝin al nova etapo kaj kondukis la mondon en la grandan novan epokon de la penso de Maŭ Zedong.



*Aŭdinte la novaĵon pri la inspekto ĵus farita de Prezidanto Maŭ, la proletaj revoluciuloj de la institucioj sub la rekta direktado de la kirasitaj fortoj de PLA treege entuziasmiĝas kaj decidas fari novajn kontribuojn en la proleta kultura revolucio.*

Estas Vi, kiu kreis la fajreron sur Ginggang-montaro, fondis la grandan Ĉinan Popolan Liberigan Armeon, transformis la malnovan Ĉinion per la pafilo de revolucio kaj malfermis por la mondo la solan, grandan ĝustan vojon de kapto de regpotenco per armita forto.

Estas Vi, kiu levis la freŝe ruĝan, kvinstelan standardon super la Tian-anmen-placo, fondis la grandan Ĉinan Popolan Respublikon, ebligis al ĝi stari firme en la oriento kiel giganto, kaj konstruis vere ruĝan bazlokon por la proletaro kaj subpremataj popoloj de la tuta mondo.

Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Resuminte la spertojn de la internacia komunisma movado kaj de la ĉina revolucio, Vi solvis la teorion kaj praktikon de revoluciado sub la kondiĉoj de proleta diktaturo. Per plej granda spiritforto kaj plej alta saĝeco, Vi iniciatis kaj gvidas persone la mondskuan grandan proletan kulturan revolucion kaj elskribis epopeon, kiu estas pli impona ol la Pariza Komunumo, la Oktobra Revolucio kaj ĉiuj antaŭirintaj grandaj revolucioj en Ĉinio.

Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Ni Vin sekvos por ĉiam!

Sekvante Vin, ni ekhavas grandiozan idealon kaj ĝustan direkton!

Sekvante Vin, ni ekhavas plej grandan kuraĝon kaj senfinan forton!

Sekvi Vin signifas venkon!

Ho, la plej plej estimata kaj amata Prezidanto Maŭ! Ni nepre sekvos la instrukcion de Via plej intima batalamiko vicprezidanto Lin Biaŭ — por ĉiam legi viajn librojn, aŭskulti viajn vortojn, agi laŭ viaj instrukcioj kaj esti viaj bonaj batalantoj!

Vi instruas al ni: **"La teoria bazo, kiu orientas nian penson, estas marksism-leninismo."** Ni al Vi garantias: Ni nepre puŝos la amasan movadon de kreiva studo kaj kreiva apliko de viaj verkoj al nova alta tajdo kaj faros la tutan armeon granda ruĝa lernejo de la penso de



*La tuta urbo de Ĝenggoŭ bolas de entuziasmo ĉe la alveno de la ĝojiga novaĵo pri la inspekta vojaĝo de Prezidanto Maŭ. La revoluciaj amasoj iras sur la stratojn varme kriante: "Vivu Prezidanto Maŭ! Longan, longan vivon al Prezidanto Maŭ!"*

*La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Pekina Unua Prestinkturejo entuziasme kunsidas por priparoli la ĝojigan novaĵon pri la inspekta vojaĝo ĵus farita de Prezidanto Maŭ.*



Maŭ Zedong! Ni nepre ekposedos efektive la penson de Maŭ Zedong — la plej altnivelan marksism-leninismon en la nuna epoko!

Vi diris al ni: **"Vi devas prizorgi la ŝtatajn aferojn kaj konduki la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino!"** Ni al Vi garantias: Ni nepre sekvos strikte vian grandan strategian planon kaj firme tenos la ĉefan direkton de la batalo por kritike faligi kaj senkreditigi la plenmanon da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, ĝisfunde ruinigi la burĝan komandejon estratan de la ĉina Ĥruŝĉov, deradike frakasi la burĝan ideologion, plene starigi la penson de Maŭ Zedong kaj intensigi la revoluciigon de nia ideologio!

Vi instruas al ni: **"Ni devas neniam malstreĉi nian singardemon."** Ni al Vi garantias: Ni nepre tenos la revolucion, stimulos la preparîgon al eventuala militdanĝero, streĉos revolucian singardemon, firme gardos la batalpostenon kaj por ĉiam servos kiel Granda Muro por defendi la nacion, la proletan diktaturon kaj la grandan proletan kulturan revolucion!

Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! La plej vasta oceano ne povas enteni nian senliman amon al Vi, nia senlima fido al Vi estas nekomparebla per la plej alta monto, nian senliman fidelecon al Vi ni ne povas esprimi per miloj kaj miloj da vortoj, kaj nian senliman adoron al Vi ni ne povas finkanti per miloj kaj miloj da kantoj!

Lasu nin laŭte krii milfoje kaj dekmilfoje: Vivu, vivu, vivu longe Prezidanto Maŭ!

*La garnizono de Interna Mongolio kaj proletaj revoluciuloj de Huhehoto entuziasme celebras la revenon de Prezidanto Maŭ al Pekino post lia inspekta vojaĝo.*



# Ĝisfunde Frakasu la Burĝan Komandejon

**— Memore al la Unua Datreveno de la Okazigo de la 11-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio**

**Ĉefartikolo de la Gazeto** *Hongqi* (*Ruĝa Flago*) **N-ro 13, 1967**

LA situacio de la granda proleta kultura revolucio fariĝas ĉiam pli bona. Kun profunda malamo al la klasaj malamikoj, la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj bravaj, junaj ruĝaj gvardianoj disvolvis grandan batalon kaj amasan kritikon kontraŭ la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj levis novan revolucian tajdon de ĝisfunda frakaso de la burĝa komandejo. En tiu ĉi nova revolucia tajdo, la tuta popolo de la lando celebras kun batala entuziasmo la 1-an datrevenon de la okazigo de la 11-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio.

La plej granda historia merito de la 11-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio estas tio, ke ĝi pluapaŝe starigis absolutan aŭtoritaton de la penso de Maŭ Zedong, definitive nomis kamaradon Lin Biaŭ, kiu ĉiam alte tenas la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj plej fidele, plej firme kaj plej ĝisfunde plenumas la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ, la vicĉefkomandanto de la tuta Partio, pluapaŝe solidigis la proletan komandejon estratan de Prezidanto Maŭ kaj venkis la burĝan komandejon estratan de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon. La dokumentoj de la Plena Sesio ellaboritaj sub la persona direktado de Prezidanto Maŭ pluapaŝe solvis sisteme la problemojn de teorio, linio, principo, metodo kaj politiko por fari revolucion sub la kondiĉoj de proleta diktaturo kaj montris al la popolo de la lando la al venko kondukantan vojon por solidigi la proletan diktaturon, preventi la restaŭron de kapitalismo kaj antaŭenpuŝi socialismon al komunismo. Tiu estis sesio kun granda historia signifo, influanta la sorton de nia partio kaj nia lando kaj la sorton de la internacia komunisma movado.

La 11-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio estis okazigita en la grava momento de la akra batalo inter la proletaro kaj la burĝaro, inter la proleta komandejo kaj la burĝa komandejo, en la kriza momento, kiam la granda proleta kultura revolucio alfrontis la danĝeron esti strangolota de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon. En tiu ĉi serioza momento nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ skribis la dazibaŭ-on (opini-afiŝon) titolitan *Bombardu la Komandejon*, kiu tekstis jene:

**Kiel bone skribitaj estas la unua marksism-leninisma dazibaŭ-o en la tuta lando kaj la artikolo de komentisto de "Renmin Ribao" (Popola Ĵurnalo)! La kamaradoj bonvolu ankoraŭfoje tralegi la dazibaŭ-on kaj la artikolon. Tamen, dum pli ol kvindek tagoj, iuj gvidantaj kamaradoj en institucioj, de la centraj ĝis la lokaj, iris en inversa direkto. Prenante la reakcian burĝan starpunkton, ili praktikis la burĝan diktaturon, subpremis la ardantan movadon de la granda kultura revolucio de la proletaro, inversigis pravon kaj malpravon, konfuzis nigron kun blanko,**

**organizis ĉirkaŭatakojn kontraŭ la revoluciuloj, subpremis malsamajn opiniojn, praktikis blankan teroron, kaj estis tre memkontentaj pri siaj faroj. Ili kreskigis la arogantecon de la burĝaro kaj sufokis la batalvolon de la proletaro. Kia vipura malico! Ĉu tio ne povas igi nin profunde pripensi, se ni ligas ĉion ĉi tion kun la dekstra tendenco de la jaro 1962 kaj la erara tendenco, forme "maldekstra" sed fakte dekstra, en la jaro 1964?**

Tiu ĉi dazibaŭ-o estas plej brila revolucia dokumento, la gvida penso de la Sesio kaj la ĝenerala principo de la granda proleta kultura revolucio.

La dazibaŭ-o *Bombardu la Komandejon* forigis la kovrilon, sub kiu kaŝiĝis dum longa tempo la batalo ekzistanta en la Partio inter la revolucia linio de la proletaro kaj la reakcia linio de la burĝaro, inter la proleta komandejo kaj la burĝa komandejo, kaj pli klare evidentigis al la tuta Partio kaj la tuta popolo de la lando la ĉefan objekton kaj la ĉefan taskon de granda proleta kultura revolucio.

La burĝa komandejo konsistas el plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kaj ĝia ĉefo estas la ĉina Ĥruŝĉov. Ili ja estas la ĉefa objekto de tiu ĉi granda proleta kultura revolucio, kaj la ĉefa tasko de tiu ĉi granda proleta kultura revolucio estas ĝisfunde faligi ilin.

La dazibaŭ-o *Bombardu la Komandejon* profunde malkovris la reakcian esencon de la burĝa komandejo, nome: praktiki la burĝan diktaturon starante sur la reakcia burĝa pozicio. Prezidanto Maŭ malkovris en la dazibaŭ-o ke iuj gvidantaj kamaradoj en institucioj, de la centraj ĝis la lokaj, iris en inversa direkto. La ĝusta "direkto" ĉi tie menciita ja estas la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kaj "iuj gvidantaj kamaradoj en institucioj, de la centraj ĝis la lokaj" ja estas la burĝa komandejo konsistanta el la plenmano da personoj estrata de la ĉina Ĥruŝĉov. La dazibaŭ-o komplete malkaŝis la fian kontraŭrevolucian kaj reviziisman vizaĝon de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj alvokis la tutan Partion **"Profunde pripensi"**. Tio estas granda batalordono donita al la tuta Partio kaj la tuta popolo de la lando por ĝisfunde frakasi la burĝan komandejon.

En la tuta historia periodo de socialismo ĉiam ekzistas batalo inter la proletaro kaj la burĝaro, inter la socialisma vojo kaj la kapitalisma vojo. La batalo inter la proleta komandejo kaj la burĝa komandejo estas la plej koncentrita esprimo de la batalo inter la du klasoj, la proleta kaj la burĝa, inter la du vojoj, la socialisma kaj la kapitalisma. Por preventi la ŝanĝiĝon de la koloro de nia partio kaj nia lando, plej grave estas ĝisfunde frakasi tiun kaŝitan komandejon burĝan.

Sub la kondiĉoj de proleta diktaturo, post la ĝenerala plenumo de la socialisma transformo de la posedsistemo de produktaj rimedoj, precipe post la batalo kontraŭ dekstruloj en 1957, kvankam la kapitalistoj revas pri la restaŭro de kapitalismo ĉiumomente, tamen neniu el ili povas veni al la komandanteco. Kiuj havas la eblon veni al la komandanteco kaj arogante provas efektivigi la restaŭron de kapitalismo reprezentante la burĝaron, povas nur esti la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Ili estas agentoj de la burĝaro en la gvidaj organoj de la Partio kaj la ŝtato. La batalo inter la du komandejoj aperanta en la Partio estas neevitebla fenomeno kaj neevitebla reflekto de la ekzisto de klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasaj bataloj en la socio.

La burĝaro en la socio ankoraŭ havas sufiĉe grandan forton. Sed, "sen kapo, la birdo ne povas flugi kaj la serpento ne povas rampi", la "kapo" de la burĝaro estas ĝuste la

*Junaj revoluciaj batalantoj de la ruĝa gvardio kritikas la ĉinan Ĥruŝĉov.*



burĝa komandejo kaŝita interne de la organoj de la proleta diktaturo. Tiu burĝa komandejo estas la plej ĉefa, plej danĝera malamiko de la proletaro.

La historia sperto de la proleta diktaturo diras al ni, ke la tuta Partio kaj tuta lando neeviteble ŝanĝos iutage sian koloron, se oni ne frakasos la burĝan komandejon kaŝitan interne de la organoj de la proleta diktaturo. La plej baza kaŭzo de la restaŭro de kapitalismo en Sovetunio, Jugoslavio kaj iuj aliaj socialismaj landoj estas ĝuste tio, ke la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon de tiuj landoj uzurpis la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato. Tio estas la plej serioza leciono en la internacia komunisma movado.

Prezidanto Maŭ montris, ke la ĉefa objekto de revolucio sub la kondiĉoj de proleta diktaturo estas la burĝa komandejo kaŝita interne de la organoj de la proleta diktaturo; kaj ni kondukas revolucion precize kontraŭ tiuj partoj en la organoj de la proleta diktaturo. Konsidere al niaj partio kaj ŝtato entute, ili ne okupas la superregan pozicion, sed estas necese faligi ilin, por ke ni povu solidigi kaj plifortigi la proletan diktaturon kaj preventi la restaŭron de kapitalismo. Tiu ĉi teorio estas ekstraktita el la historia sperto de la proleta diktaturo internacia kaj ĉina.

Dum la longdaŭra batalo kontraŭ la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, Prezidanto Maŭ travidis lian lupan ambicion kaj plene certiĝis ke li estas granda latenta danĝero kaj ege katastrofa malutilo por nia partio. En la lastaj jaroj, Prezidanto Maŭ senĉese faris al la tuta Partio avertojn, ke en nia lando ekzistas danĝero de restaŭro de kapitalismo, kaj tiu danĝero venas ĉefe de la burĝa komandejo estrata de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon.

En januaro de 1965, la dokumento pri *Kelkaj Problemoj Nun Leviĝintaj en la Socialisma Eduka Movado en la Kamparo*, nome la "23 reguloj", ellaborita sub la persona direktado de Prezidanto Maŭ, unuafoje montris klare: **"La gravita punkto de la movado estas batalo kontraŭ la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon."** El la supre diritaj "enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon", la plej granda estas la ĉina Ĥruŝĉov.

Dum la tempo de la laborkunveno de la Centra Komitato en septembro de 1965, en plivastigita kunsido de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato, Prezidanto Maŭ elmetis la demandon: **"Kion vi faros, se en la Centra Komitato aperos reviziismo? Estas tute eble, ke ĝi aperos; tio estas plej danĝera."** La apero de reviziismo en la Centra Komitato, menciita de Prezidanto Maŭ, aludas nenion alian ol la burĝan komandejon estratan de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon.

*Loĝantoj de Kingdaŭ indigne akuzas la damnindan malnovan socion kaj forte refutas la absurdan kontraŭrevolucian aserton "ekspluato estas merito" de la ĉina Ĥruŝĉov.*





La 16-an de majo de 1966, la *Cirkulero* ellaborita sub la persona direktado de Prezidanto Maŭ montris pli klare: **"tiaj homoj kia Ĥruŝĉov estas nun kuŝantaj apud ni".** Ĉi tie la "homoj kia Ĥruŝĉov" ĝuste aludas pri la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon.

En aŭgusto de 1966, t. e., en la 11-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio, jam plene malkovriĝis la kontraŭrevolucia reviziisma vizaĝo de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon; la de li estrata burĝa komandejo jam sufiĉe multe sin prezentis. Jam maturiĝis la tempo por ekpafi kontraŭ la burĝa komandejo. Prezidanto Maŭ, kiu rigardas de alte kaj vidas malproksime, alprenis kun eksterordinare granda spiritforto firman kaj decideman paŝon, skribis la dazibaŭ-on *Bombardu la Komandejon* kaj faris firman decidon mobilizi la amasojn por frakasi la burĝan komandejon.

La frakaso de la burĝa komandejo, laŭ la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ, estas farata ne per la metodo de deoficigo ordonita desupre, ne per simpla organiza rimedo, sed per senrezerva mobilizo de la amasoj por ke la vastaj amasoj leviĝu por batali kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon.

*La Decido de la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio Koncerne al la Granda Proleta Kultura Revolucio,* kiun akceptis la Sesio, t. e., la "16 punktoj", estas granda revolucia programo ellaborita sub la persona direktado de Prezidanto Maŭ. La lancpinto de batalo de la "16 punktoj" estas ĝuste direktata al la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. La baza spirito trapenetranta la tutan 16-punktan dokumenton estas fidi la amasojn, sinapogi sur la amasoj, senrezerve mobilizi la amasojn por forte pafegi kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj fari desube veran, ĝisfundan socialisman revolucion.

La amasoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong estas veraj herooj. En la granda proleta kultura revolucio, nur per senrezerva mobilizo de la revolucia amaso nombranta en centmilionoj, per apliko de vasta demokratio sub la proleta diktaturo, per plena eldiro kaj libera esprimo de opinioj, grandaj debatoj, dazibaŭ-oj kaj aliaj rimedoj, kaj per malkovro kaj kritiko de la krimoj kontraŭ la Partio, socialismo kaj la penso de Maŭ Zedong, faritaj de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, oni povas ĝisfunde frakasi la burĝan komandejon estratan de la ĉina Ĥruŝĉov, konkeri la reakciajn citadelojn okupatajn de ili en iuj regionoj, departementoj kaj institucioj kaj repreni la potencon uzurpitan de ili.

*Bombardu la Komandejon* kaj la "16 punktoj" inspiris kaj armis sennombrajn revoluciajn amasojn kaj mobilizis la aktivecon de la vastaj amasoj. La flamanta fajro de la granda proleta kultura revolucio brulas pli arde. La revolucia amaso nombranta en centmilionoj ekbolis kaj plene forbalais la sufokan atmosferon de "dekmil ĉevaloj en silentado", kaŭzitan de la subpremo de la reakcia linio de la burĝaro. En la tuta lando aperis la situacio de kuna pafado de dekmil pafilegoj kontraŭ la burĝa komandejo.

Revolucio estas lokomotivo de historio. En la lasta jaro, okazis mondrenversa ŝanĝiĝo en Ĉinio, kiu havas sepcent milionojn da loĝantoj.

Post unujara luktado, la proletaro gajnis grandan venkon en la batalo kaj akiris grandajn sukcesojn. La kontraŭrevolucia vizaĝo de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon jam elmontriĝis antaŭ la vastaj revoluciaj amasoj. La plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj estas malkovrita kaj la reakciaj citadeloj de ili okupitaj estas konkeritaj. La diktaturo de la proletaro fariĝis pli solida. La kontraŭrevolucia fronto de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon jam tute disfalis. En la batalo kontraŭ la reakcia linio de la burĝaro, la subpremitaj kaj persekutitaj proletaj revoluciuloj jam estas forĝitaj en senfine grandan revolucian armeon kiu kreskis komencante de io malgrandnombra, malforta kaj disa al io multnombra, forta kaj koncentrita. En la ŝtormo de klasa batalo dum unu jaro, elhardiĝis grandaj nombroj da novaj personoj fidelaj al la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Rapide kreskas la juna generacio de daŭrigantoj de la revolucia afero de la proletaro.

Tio estas la granda frukto de la 11-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato kaj de la "16 punktoj"; en tio montriĝas la granda potenco de la dazibaŭ-o *Bombardu la Komandejon*, kaj tio estas granda venko de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Sed ankoraŭ ne finiĝis la batalo inter la du komandejoj kaj inter la du linioj. La centra tasko antaŭ la proletaj revoluciuloj estas ĝisfunde kritiki en politiko, ideologio kaj teorio la plenmanon da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj ĝisfunde frakasi la burĝan komandejon. Tio estas granda historia tasko. Por plenumi tiun ĉi grandan historian taskon, estas necese plifortigi la diktaturon de la proletaro, plifortigi kaj plibonigi la instrumentojn de la proleta diktaturo kaj firme subteni kaj defendi la proletajn revoluciulojn.

Ni devas scii, ke nur politike, ideologie, kaj teorie faligi ĝisfunde la plenmanon da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj ĝisfunde frakasi la burĝan komandejon povas garantii, ke nia partio kaj nia lando ne ŝanĝos sian koloron, kaj ni povos konduki la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino; kaj ankaŭ nur en la batalado por plenumi tiun ĉi taskon, ni povas efektivigi kaj fortikigi la grandan unuiĝon de la proletaj revoluciuloj kaj la revolucian "triflankan kombiniĝon", glate konduki batalon, kritikon kaj reformon en niaj propraj institucioj, plenumi la batalon de depreno de la potenco el la manoj de plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj teni vere bone la potencon por la proletaro. Forgesi tiun ĉi centran taskon signifas forgesi la instruon de Prezidanto Maŭ **"vi devas zorgi pri ŝtataj aferoj"**, forgesi la grandan proletan kulturan revolucion kaj forgesi la socialisman vojon, kaj de tio oni perdos la direkton kaj suriros eraran vojon.

La revolucia dialektiko estas nerezistebla. La burĝa komandejo estos nepre ĝisfunde frakasita. La granda proleta kultura revolucio nepre gajnos plenampleksan, ĝisfundan venkon!

Kamaradoj proletaj revoluciuloj, junaj sturmantoj! Celebrante la unuan datrevenon de la 11-a Plena Sesio de la Oka Centra Komitato kaj la dazibaŭ-o *Bombardu la Kamandejon*, ni tenu pli alte la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj batalu por fari novajn meritojn en la ĝisfunda frakaso de la burĝa komandejo!

*Junaj revoluciaj batalantoj de la ruĝa gvardio akre kaj forte kritikas la reviziisman edukan linion de la ĉina Ĥruŝĉov.*



# Ĉu Iri la Socialisman aŭ Kapitalisman Vojon?

**Artikolo de** *Hongqi* (*Ruĝa Flago*) **kaj** *Renmin Ribao* (*Popola Ĵurnalo*)

ĈINIO en la nuna epoko estas la fokuso de kontraŭdiroj en la mondo, la centro de la mondrevolucia ŝtormo.

Kien Ĉinio iru? Ĉu ĝi iru la socialisman vojon aŭ la kapitalisman vojon? Tio ĉi ne nur estas fundamenta problemo de la ĉina politiko, sed ankaŭ koncernas la sorton de la revolucio de la monda proletaro.

Rilate al tia fundamenta problemo, de dekoj da jaroj, en la Komunista Partio de Ĉinio ĉiam ekzistas du radikale reciproke antagonismaj linioj kaj iras furioza batalo en ĉiu historia stadio de la disvolviĝo de la ĉina revolucio kaj je ĉiu kriza momento de revolucia turniĝo.

Unu linio persistas, ke la ĉina revolucio nepre devas esti gvidata de la proletaro, ke ĝi nepre devas iri tra la stadio de la novdemokratia revolucio al la stadio de la socialisma revolucio, ke la revolucio sub la diktaturo de la proletaro nepre devas esti kondukata ĝis la fino kaj ĝia finfina celo estas realigo de komunismo. Tio ĉi estas la proleta revolucia linio reprezentata de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

La alia linio likvidas la gvidantecon de la proletaro en la ĉina revolucio, praktikas burĝan reformismon, kaj en la socialisma stadio oponas la socialisman revolucion kaj la proletan diktaturon kaj iras la kapitalisman vojon, tio estas, la malluman malnovan vojon kondukantan Ĉinion returnen al duonfeŭda kaj duonkolonia socio. Tio ĉi estas la burĝa reakcia linio praktikata de Ĉen Duhiu, Kju Kiubaj, Li Lisan, Vang Ming kaj Ĝang Guotaŭ sinsekve en heredo rekte ĝis la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon. Kaj la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon estas la plej koncentra reprezentanto de tiu ĉi reakcia linio.

La du radikale reciproke antagonismaj linioj kondukas al du tute kontraŭaj estontoj, du tute kontraŭaj sortoj por la ĉina revolucio. Ĝuste tra la batalado inter la du linioj, la ĉina revolucio trahakis, sub la direktado de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, sian vojon tra ĉiaj malfaciloj kaj venke marŝis antaŭen.

La esenco de tiu ĉi batalo estas la demando, kiun vojon Ĉinio prenu. La fokusa punkto de la batalo ĉiam estas la demando de regpotenco, nome la demando kiu klaso praktiku diktaturon.



*Proksime sekvante la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la minejo de Ŝuangja-monto en Hejlonggiang-provinco levas novan alttajdon de revolucia amasa kritiko.*

## I

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas nin: En la stadio de la demokratia revolucio, la fokusa punkto de la programo de la Komunista Partio de Ĉinio estas la kuna diktaturo de kelkaj revoluciaj klasoj gvidata de la proletaro; en la stadio de la socialisma revolucio, la fokusa punkto de la programo de la Komunista Partio de Ĉinio estas la diktaturo de la proletaro en la formo de la popola demokratia diktaturo.

La demando, kiun Prezidanto Maŭ elmetis tuj ĉe la komenco mem de sia granda verko *Pri Nova Demokratio*, estas: **Kien iru Ĉinio?** En tiu ĉi brila marksism-leninisma verko, li komplete, profunde kaj sisteme resumis la historian sperton de la ĉina revolucio kaj la monda revolucio, science formulis la politikan, ekonomian kaj kulturan programojn por la novdemokratia revolucio, kaj klare kaj plene montris la vojon por la transiro de la novdemokratia revolucio al la socialisma revolucio. Li diras: "**La unua paŝo aŭ la unua stadio en tiu ĉi revolucio certe ne estas, kaj ne povas esti, starigi kapitalisman socion sub la diktaturo de la ĉina burĝaro, sed starigi novdemokratian socion sub la kuna diktaturo de ĉiuj revoluciaj klasoj de Ĉinio kun la ĉina proletaro kiel la gvidanto por fini la unuan stadion. Kaj poste, igi ĝin disvolviĝi en la duan stadion, por establi socialisman socion en Ĉinio.**"

Prezidanto Maŭ severe refutis la reakcian absurdan teorion vane celantan starigi burĝan diktaturon en Ĉinio. Li klare montris, ke en konsidero pri la internaciaj kaj enlandaj cirkonstancoj, kiu ajn songâs pri starigo de kapitalisma socio sub la burĝa diktaturo, finfine povos nur sin ĵeti en la sinon de imperiismo kun la rezulto ke Ĉinio denove fariĝos ĝia kolonio aŭ duonkolonio kaj parto de la reakcia mondo de imperiismo. La akra refuto de Prezidanto Maŭ celis ne nur la dekstran oportuniston Vang Ming, delonge jam fetore famantan, sed ankaŭ la plej grandan enpartian potenctenanton irantan la kapitalisman vojon, kiun oni ĵus malkovris.

Tiu ĉi plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon estas oportunisto kaj reviziisto kun malnova marko, burĝa reprezentanto enŝteliĝinta en nian partion.

Tiel frue kiel en la komenco de la dudekaj jaroj, li jam kantis la saman melodion de la renegato Ĉen Duhiu. Li malice atakis la proletajn revoluciulojn dirante ke la kapto de regpotenco "ja ne povas esti tuj efektivigita de tiel infaneca proletaro, juĝate laŭ la nuna situacio en Ĉinio. Ĉar ĝi estas afero de fora estonteco, do estas nenecese elspezi multajn vortojn por diskuti ĝin".

Nelonge post la kontraŭrevolucia ŝtatrenverso de la 12-a de aprilo lanĉita de Ĉiang Kajŝek, li ordonis la laboristpikedojn en Vuhan fordoni siajn milojn da fusiloj al Kuomintango, rekte sekvante la renegaton Ĉen Duhiu. Kaj krome, li persone aperis en kunveno okazigita de la Departemento de Laboristaj Aferoj de la Centra Komitato de Kuomintango kaj raportis al ĝi pri la tiel nomata "signifo kaj procezo de la volonta malorganizado de laboristpikedoj fare de la Ĝenerala Konsilantaro de Sindikatoj de Hubej-provinco".

Post la publikigo de la verko de Prezidanto Maŭ *Pri Nova Demokratio*, li elsaltis por rekte ataki Prezidanton Maŭ, kantante melodion tute kontraŭan al tiu verko. Li iris tiel malproksimen, ke li laŭdis Ĉiang Kajŝek kiel "la standardon de la revolucio" kaj deklaris: "Mi opinias, ke sub la standardo de la Tri Popolaj Principoj de Kuomintango la ĉina revolucio povos iri multe pli glate ol sub iu ajn alia standardo, almenaŭ en la nuna stadio de la demokratia revolucio." Li diris kun nigra sento: "Kial ni ne diras, ke ni efektivigas la Tri Popolajn Principojn, sed spiteme klopodas ellabori ion alian?" Ĉi tie la malnova oportunisto nude senmaskigis sian vizaĝon de renegato oponanta kaj perfidanta la revolucion!

Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la usona imperiismo intencis ŝanĝi Ĉinion en sian propran ekskluzivan kolonion, utiligante sian lakeon Ĉiang Kajŝek. Tiam la ĉina popolo estis kondukanta mortan batalon kontraŭ imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo. Tio estis granda batalo decida por la elekto inter la du sortoj, du estontoj por Ĉinio. La problemo de ŝtatpotenco elmetiĝis al la proletaro en ankoraŭ pli akra maniero. En ĝusta tempo Prezidanto Maŭ montris ĉi tion al la tuta Partio kaj la popolo de la tuta lando. En sia brila parolado *La Aktuala Situacio kaj Nia Politiko post la Venko en la Kontraŭjapana Rezistmilito*, Prezidanto Maŭ montris: "**De nun estos lukto pri tio, kian landon oni konstruu. Ĉu oni konstruu novdemokratian landon de la popolamasoj sub la gvido de la proletaro, aŭ oni konstruu duonkolonian, duonfeŭdan landon sub diktaturo de la grandaj terposedantoj kaj grandaj burĝoj? Ĝi estos batalo tre komplika. Nun tiu batalo aperas en la formo de lukto inter Ĉiang Kajŝek, kiu klopodas uzurpi al si la fruktojn de la venko de la Rezistmilito, kaj ni mem, kiuj oponas al lia uzurpado. Se en tiu ĉi tempo estus oportunismo, ĝi manifestiĝus en tio ne probatali plenforte sed memvole donaci al Ĉiang Kajŝek la fruktojn, kiujn la popolo devas ricevi.**" Prezidanto Maŭ montris krome: "**Ĉiang Kajŝek ĉiam klopodas forkapti de la popolo ĉiun colon da potenco kaj depreni ĉiun colon da profito. Kaj ni? Nia politiko estas lin oponi pinton kontraŭ pinto, batali pro ĉiu colo da tero.**" "**Nun Ĉiang Kajŝek jam estas akriganta siajn glavojn, tial ankaŭ ni devas akrigi la niajn.**"

La reprezentanto de la oportunismo, kiun Prezidanto Maŭ kritikis ĉi tie, estis neniu alia ol la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon. Je la historia ŝlosila punkto de la granda batalo decida por la elekto inter du sortoj, inter du estontoj por Ĉinio, tiu ĉi malnova oportunisto denove sisteme elmetis sian naci-kapitulacisman kaj klas-kapitulacisman linion por oponi kaj vendi la revolucion. Li predikis: "Nuntempe, la ĉefa batala formo de la ĉina revolucio jam fariĝis paca kaj parlamenta; ĝi estas laŭleĝaj amasa batalo kaj parlamenta batalo." Li volis, ke nia partio fordonu siajn armeon kaj armilojn al Ĉiang Kajŝek, ke ili "fariĝu unuoj de la nacia armeo, nacidefenda armeo, sekurigaj trupoj kaj memdefendaj fortoj" kaj "likvidu la organizojn de la Partio" en la armeo. Li postulis, ke nia partio "ĉesigu sian rektan gvidadon kaj komandadon al la armeo", ke "la armeo estu metita sub la unueca komando de la ministerio de nacidefendo" (t.e. la kuomintanga ministerio de nacidefendo). Per ĉio




*Proksime sekvante la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ kaj prenante la penson de Maŭ Zedong kiel armilon, la komandantoj kaj batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo disvolvas revolucian amasan kritikon.*

ĉi tio li volis flati al Ĉiang Kajŝek kaj sin prezenti al li post ŝminkado. Senhonte li diris, ke necesas "esti kapablaj konkuri en elekta movado kaj gajni voĉdonantojn por vi" kaj ke "ni fariĝos unu el la registaraj partioj (t.e. partioj de la kuomintanga registaro), ni ne plu estos en opozicio sed en potenco, kaj iuj el ni enviciĝos al la regantaj oficistoj. Ni havis oficistajn postenojn en la centra registaro en 1927, kiuj nuliĝis kiam oni ekbatalis. Ĉifoje la pozicioj ne perdiĝos, se oni ekbatalos". Jen frazo malkaŝanta la plej sekretan deziron en lia koro!

La perfiduloj al la proletaro, kiaj la dekstra-alaj socialistoj kaj la malnovaj reviziistoj Bernstein kaj Kaŭcki, ĉiuj ludis la rolon de ornamoj kaj komplicoj de la burĝa reakcia reĝimo per prediko pri la parlamenta vojo, opono kontraŭ perforta revolucio kaj perfido al la interesoj de la proletaro. La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon estas varo de la sama speco! Se troviĝas ajna diferenco, ĝi estas tio, ke li volis ĝentile fordoni la popolan regpotencon kaj la popolan armeon eĉ kiam la ĉina proletaro jam havis armeon el pli ol miljon kaj ducent mil homoj kaj jam starigis popolan regpotencon en regiono kun pli ol cent tridek miljon loĝantoj. Tia granda kapitulaco kaj granda perfido estas do ankoraŭ pli fiaj kaj malicaj!

Ĝuste kiam la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon intencis forvendi la fruktojn de venko en la Kontraŭjapana Rezistmilito, troviĝis en Francio kaj Italio ĉefoj de la "komunistaj partioj" kiaj Thorez kaj Togliatti kaj similaj, kiuj faris politikan negocon kun la burĝaro per fordono de la venkaj fruktoj akiritaj de la popolo je la kosto de sango kaj vivofero. Ili fordonis al la burĝaro kelkcent mil pafilojn — la revoluciajn armilojn de la proletaro — por gajni interŝanĝe postenojn kia tiu de "vicĉefministro" de la burĝa ŝtato, kaj fariĝis krimuloj en la historio! Je tiu ĉi historia turniĝa punkto, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris al ni: **"La armiloj de la popolo, ĉiu pafilo kaj ĉiu kuglo, ĉiuj nepre devas esti tenataj, nepre ne devas esti fordonitaj." "La rajtoj gajnitaj de la popolo absolute ne devas esti facile perditaj, sed nepre devas esti defendataj per batalo."**

**"Se ili (Kuomintango) volas batali, ni ekstermos ilin komplete."** Kun proleta heroa sentimeco, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ sukcesis rezisti la mondskalan retrofluon de kapitulacismo — "la fordono de pafiloj" — kaj kuraĝis batali kaj gajni venkon, donante brilan ekzemplon por la proletaj revoluciuloj tra la tuta mondo. La ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong montris per tio sian senfinan potencon.

Ĝuste sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, nia partio, nia popolo kaj nia armeo, firme tenante la pafilon, trarompis ĉiajn rezistojn, laŭ la ĝusta direkto antaŭenmarŝis triumfe sur la revolucia ŝoseo, kaj fine gajnis la grandan venkon en la popola liberiga milito kaj fondis la Ĉinan Popolan Respublikon. Ĝi estis senkompata verdikto farita de la historio pri la klasa kapitulacismo kaj nacia kapitulacismo de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon!

## II

La fondo de la Ĉina Popola Respubliko puŝis la historion antaŭen al nova stadio, t. e. de tiu de la novdemokratia revolucio al tiu de la socialisma revolucio. En tiu momento, la fokuso de la batalo inter la du linioj estis kiun vojon la ĵus fondita nova Ĉinio devas iri — ĉu la socialisman aŭ la kapitalisman vojon? Analizite ĝis la fino, tiu ĉi batalo estis super la demando ĉu proleta aŭ burĝa diktaturo devas esti praktikata en Ĉinio.

Antaŭvespere de la tutlanda venko en la novdemokratia revolucio, Prezidanto Maŭ montris klare en sia brila verko *Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio*: **"Post la tutlanda venko de la ĉina revolucio kaj la solvo de la agra problemo, restos en Ĉinio ankoraŭ du fundamentaj kontraŭdiroj. La unua estas enlanda, t. e., la kontraŭdiro inter la laborista klaso kaj la burĝaro. La dua estas eksterlanda, t. e., la kontraŭdiro inter Ĉinio kaj la imperiismaj landoj. Pro tio la ŝtata potenco de la popola respubliko sub la gvido de la laborista klaso, post la venko de la popoldemokratia revolucio, devas esti ne malfortigita sed fortigita."**

Poste, en sia parolado pri la partia ĝenerala linio por la transira periodo Prezidanto Maŭ montris: **La fondo de la Ĉina Popola Respubliko je la unua de oktobro, 1949, markis la fundamentan finon de la stadio de la novdemokratia revolucio kaj la komencon de la stadio de la socialisma revolucio. "La ĝenerala linio kaj ĝenerala tasko de la Partio dum tiu ĉi transira periodo estas paŝo-post-paŝe efektivigi en sufiĉe longa tempo socialisman industriigon de la lando kaj la socialisman transformadon de agrokulturo, metia industrio kaj kapitalismaj industrio kaj komerco. Tiu ĉi ĝenerala linio estas la lumturo, kiu lumigas ĉiun el niaj laboroj, kaj se ni devios de ĝi en iu el niaj laboroj, ni faros dekstran aŭ 'maldekstran' eraron."**



*La ruĝaj gvardianoj de la Pekina Poŝtelekomunika Instituto serioze studas la gravan artikolon "Ĉu Iri la Socialisman aŭ Kapitalisman Vojon?" de la redakcioj de la* Popola Ĵurnalo *kaj la* Ruĝa Flago.

Je tia momento de nova granda ŝanĝo, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon denove elsaltis kiel proparolanto de la burĝaro por kontraŭstari la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ. Freneze li klopodis kaj pledis por disvolvado de kapitalismo en la urboj kaj la kamparo. Li elmetis la sloganon "batalu por la firmigo de la novdemokratia sistemo". Li diris la absurdaĵojn ke "en Ĉinio ne estas tro multe, sed tro malmulte da kapitalismo", "kapitalisma ekspluatado devas esti disvolvata, ĉar tia ekspluato estas progresema", "ju pli multe da ekspluato signifas des pli multe da merito" kaj "tia historia merito estas senmorta"! Li pledis por disvolvado kaj longtempa konservado de kulaka ekonomio en la kamparo. Kaj li ankoraŭ elmetis la reakcian linion de disvolvado de kapitalismo kaj starigo de la burĝa diktaturo eĉ post kiam la projekto por burĝa respubliko jam komplete bankrotis.

La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon plenenergie oponis, ke Ĉinio iru la socialisman vojon. Li babilaĉis dirante: "Ankoraŭ pasos sufiĉe longa tempo antaŭ ol Ĉinio prenos sufiĉe seriozajn socialismajn paŝojn". Dudek aŭ tridek jaroj estos bezonataj, kvankam estas diferencaj taksoj, tamen sendube oni devos kunlabori dekojn da jaroj kun la kapitalistoj, unue por efektivigi industriigon kaj poste ŝtatigon de la industrio kaj kolektivigo de agrokulturo. Li diris: "En la estonto, kiam industriigo estos efektivigita kaj estos pli multaj fabrikoj kaj produktaĵoj, tiam estos tempo por lanĉi socialismon." Li diris resume: "Kiam la ĉina industrio havos superprodukton en la estonto, tiam estos la tempo por Ĉinio entrepreni socialismon." "Kiam la ĉina industrio havos superprodukton" — jen kia rimarko! Industria superprodukto estas karakterizaĵo de kapitalismo. Tiu ĉi lia rimarko rekte manifestis lian malican intencon disvolvi kapitalismon! La speco de varoj de li estis fakte nenio nova, ol ĉifonaĵo el la "teorio de produktaj fortoj" elmetita de malnovaj reviziistoj kiaj Trocki, Buĥarin, Rikov k. s. kaj frakasita de Lenin kaj Stalin en la frua stadio post la fondiĝo de Sovetunio. Li komplete neigis la rolon ludatan de la proleta diktaturo kaj la antaŭirantaj socialismaj produktaj rilatoj en antaŭenpuŝado de la disvolviĝo de la produktaj fortoj. Li komplete neigis la fakton, ke la amasoj de laboristoj kaj kamparanoj estas kreantoj de la sociaj riĉaĵoj kaj estas la vera movforto antaŭenpuŝanta la disvolviĝon de historio. En liaj okuloj estas nur la sinjoroj kapitalistoj kaj tutkore li deziris sin apogi sur ilin por starigi "senmortan meriton" kaj konstrui sian "utopion"!

Kia do estas la "socialismo" pri kiu li parolis? Bonvolu legi lian strangan diraĵon sekvantan: "Nun, en la stadio de novdemokratio, vi kapitalistoj povas plene ludi vian aktivan rolon. Kaj kion vi devos fari dum la transiro al socialismo? Lastafoje, kiam mi parolis kun sinjoro Song Fejking (Song Fejking estis administranto de la Orientazia Lanŝpinteksa Fabriko, obstinega kontraŭrevoluciulo, kiun la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon levis per laŭdoj ĝis la ĉielo post la Liberiĝo, baldaŭ poste forkuris eksterlanden. — la Red.), mi diris: 'Nun vi funkciigas nur unu fabrikon. En la estonteco, vi povos funkciigi du, tri... ok fabrikojn. Kiam la lando transiros al socialismo kaj la ŝtato donos ordonon, vi povos transdoni ilin al la ŝtato, aŭ la ŝtato ilin aĉetos de vi: se la ŝtato ne havos monon portempe, ĝi povos emisii obligaciojn. Poste, la ŝtato ankoraŭ konfidos al vi la funkciigon de la ok fabrikoj kaj vi restos la administranto, sed administranto de ŝtataj fabrikoj. Ĉar vi estas kapabla, ok pliaj fabrikoj doniĝos al vi, sume konfidiĝos al vi la funkciigo de 16 fabrikoj. Via salajro ne estos reduktita sed pliigita; tamen vi devos bone ilin funkciigi! Ĉu tion vi volas?' Sinjoro Song diris: 'Tion mi certe volas!' Vi estos alvokitaj al kunveno por diskuti kiel transiri al socialismo. Vi ĉiuj certe ne kuntiros la brovojn, sed venos al la kunveno kun ridmieno."

Kiel mirinde! Kapitalisto per unu mano vendas ok fabrikojn al la ŝtato kaj per la alia reakiras 16 fabrikojn de la ŝtato, kaj tio ĉi estas nomata "socialismo"! Tiutempe, grupo da kapitalistoj ja diris "kun ridmieno": "En la pasinteco, ni tute ne povis sondi kion la Komunista Partio havas profunde en la koro, sed nun ni iom sondis." Kaj la plej granda

enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon diris kun sklava komplezemo: "Mi lasos vin sondi kion la Partio tenas funde de la koro kaj lasos vin scii kion vi volas." Jen vera flatemo kaj servemo! Ĉu la malnovaj kaj novaj reviziistoj ne ĉiuj diris pri "paca enkreskado en socialismon"? Jen estas viva ekzemplo. Ja tute male, ili mem vere "enkreskis en" kapitalismon! Ĉu tiu ĉi n-ro unua agento de la burĝaro, kiu "enkreskis en" nian partion, ne jam plene malkaŝis sian diablan vizaĝon?

Por trompi aliajn, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon ankaŭ hipokrite parolis pri diktaturo de la proletaro, sed la de li priparolita proleta diktaturo estas pseŭdoproleta tamen vere burĝa.

Li estis ekstreme malamika al la laborista klaso kaj bojis: "Ankaŭ en la laboristaro troviĝas nefidinduloj." "Ne pensu, ke ne ekzistos problemo, kiam oni sinapogas sur la laborista klaso." Per unu movo li forstrekis la klasbatalon inter la proletaro kaj la burĝaro, prenantan limigon kaj oponon kontraŭ limigo kiel la ĉefan batalformon, kaj publike kriis: "Limigo ne devas esti praktikata antaŭ ol forpasos sep aŭ ok jaroj. Tio ĉi utilos tiel al la ŝtato kaj la laboristoj kiel al la produktado." Energie li predikis: "La ŝtataj kaj privataj entreprenoj devas kune interkonsiliĝi pri ĉiaj demandoj, de krudaj materialoj ĝis merkato, kaj kune decidi pri divido de ili," kaj "ke ĉiuj ricevu po porcion da profito". Li publike alvokis la burĝaron "batali" kontraŭ la proletaro dirante: "Vi nepre devas batali kontraŭ la laboristoj. Se vi tion ne faros, do vi ne riproĉu la Komunistan Partion, se viaj fabrikoj bankrotos en la estonteco pro batalado de la laboristoj." Jen, en liaj okuloj la ŝtato de la proleta diktaturo gvidata de la laborista klaso devas agi ne kontraŭ la burĝaro sed kontraŭ la laborista klaso. Kaj krome li ankoraŭ diris publike: "Hodiaŭ ni ne volas diktaturon de unu klaso. Ni devas reprezenti la tutan popolon." Ĉu tio ĉi ne estas de la kapo ĝis la piedoj perfido al la proleta diktaturo?

Freneze li oponis la socialisman transformadon de agrokulturo, subfosis la kooperativigon de agrokulturo kalumniante, ke la kamparanoj, kiuj donis ekzemplon en postulado de sinorganizo, nur estas bankrotintaj "malriĉaj kamparanoj, kiuj ne povas terkulturi individue", kalumniante la opinion, ke la agrokulturaj interhelpaj grupoj devas esti disvolvitaj en agrokulturajn produktajn kooperativojn, kiel "eraran kaj danĝeran utopian penson de agrara socialismo". En koluzio kun plenmano da dekstraj oportunistoj, li grandnombre forhakis kooperativojn kaj sume ducent mil kooperativoj estis malorganizitaj. Kaj krome li diris malice: "Kion ni volas diri per allasi liberan aktivadon? Ni volas diri, ke oni devas allasi liberan dungadon de kamplaboruloj kaj liberan individuan mastrumadon; estos tre bone se ili ĉiuj havos po tri ĉevalojn kaj unu plugilon. Oni ne devas allasi liberan aktivadon al tiuj, kiuj ne permesas dungadon de kamplaboruloj kaj individuan mastrumadon. Oni ne devas lasi agi laŭplaĉe tiujn, kiuj intervenas al la posedo de tri ĉevaloj." Tiamaniere, vane intencante ŝanĝi la vastan kamparon en reĝlandon de la kulakoj, en pozicion de la burĝaro por rezisti kontraŭ la proletaro, li donis nur al la kulakoj la liberon disvolvi ekspluaton, sed malpermesis al la malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj havi la liberon sin organizi por interhelpi kaj kooperadi.

Regpotenco ja ĉiam estas instrumento, per kiu unu klaso subpremas alian. Se anstataŭ disvolvi socialismon, la regpotenco de la ĵus naskita nova Ĉinio disvolvus kapitalismon, se anstataŭ limigi la burĝaron ĝi limigus la proletaron, se anstataŭ limigi la kulakojn ĝi limigus la malriĉ-kamparanojn, kaj se anstataŭ batali kontraŭ la burĝaro ĝi "batalus" kontraŭ la proletaro kaj tiamaniere tute forlasus sian plenumendan devon de subpremado al la rezisto de la burĝaro kaj defendo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, ĉu la naturo de la regpotenco de la nova Ĉinio ne jam ŝanĝiĝus radikale? Prezidanto Maŭ trafis per la parolo rekte en la vizaĝon dirante: **"Kio okazos, se nia lando ne starigos socialisman ekonomion? Ĝi fariĝos lando kia Jugoslavio, burĝa ŝtato en efektiveco, kaj la proleta diktaturo fariĝos burĝa diktaturo, kaj krome diktaturo reakcia, faŝisma. Tio ĉi tre indas je nia singardemo kaj mi esperas, ke kamaradoj bone pripensos pri ĝi."**




*La revolucia amaso de la Kinghaja Lanŝpinejo faras rigoran kritikon kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en Ĉinio.*

## III

Ĉu klasoj kaj klasbatalo ankoraŭ ekzistas en socialisma socio, post kiam la socialisma transformado de la posedsistemo de produktaj rimedoj estas fundamente plenumita? Ĉu oni devas persisti ĉe la proleta diktaturo kaj konduki la socialisman revolucion ĝis la fino, aŭ nuligi la proletan diktaturon kaj malfermi vojon por la restaŭro de kapitalismo? Tio ĉi estas gravaj teoriaj kaj praktikaj problemoj kiuj antaŭe ne estis solvitaj en la historio de la internacia komunisma movado.

Denove je tiu ĉi ŝlosila momento de historia turniĝo, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ publikigis siajn verkojn *Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo*, *Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro* k. a. Tiuj ĉi epokfaraj brilaj dokumentoj resumis la historian sperton de la proleta diktaturo en la mondo kaj la unuan fojon en la historio de disvolviĝo de marksism-leninismo science, sisteme kaj profunde argumentis la kontraŭdirojn, klasojn kaj klasbatalon en socialisma socio. Tio ĉi estas grava signo markanta ke marksism-leninismo jam disvolviĝis en tute novan stadion — la stadion de la penso de Maŭ Zedong.

Prezidanto Maŭ klare montris, ke en socialisma socio **"klasbatalo ankoraŭ ne finiĝis. La klasbatalo inter la proletaro kaj burĝaro, la klasbatalo inter diversaj politikaj fortoj kaj la klasbatalo en la ideologia kampo inter la proletaro kaj burĝaro estos ankoraŭ longdaŭraj, zigzagaj kaj iam eĉ tre akraj." "Sin trovas en la socio ankoraŭ nombro da personoj kiuj revas pri restarigo de la kapitalisma sistemo. Ili volas batali kontraŭ la laborista klaso sur ĉiuj frontoj, inkluzive la ideologian fronton."**

La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon plenenergie predikis la ideon pri "estingiĝo de klasbatalo". Li diris sensencaĵojn kiaj: En nia lando ne plu sin trovas klasoj kaj klasbatalo, kaj "kapitalistoj, bienuloj kaj kulakoj ĉiuj eniros en socialismon". "Poste, ne estos revolucia batalo, ne estos agrara reformo, nek estos socialisma transformo", "ne estos batalejo por ke la herooj montru siajn kapablojn, ĉar nun ne plu sin trovas bienula klaso kaj burĝaro estas ekstermita de ni."

Kia "estingiĝo de klasbatalo"! Tio ĉi estas nur babilaĉo por trompo. Tio ĉi estas samspeca varo kiaj "ŝtato de la tuta popolo" kaj "partio de la tuta popolo", kiujn Ĥruŝĉov kaj liaj similuloj uzis por uzurpi la gvidantecon de la partio kaj la ŝtato. Tio ĉi estas la plej senhonta kaj plej kompleta perfido al la proleta diktaturo! Sub la fumkurteno de "estingiĝo de klasbatalo", la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon ja volis narkoti la proletaron kaj la laborantan popolon, por ke bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, aĉuloj kaj demonoj kaj diabloj ĉiuj eliru

samtempe, lanĉu frenezan atakon kontraŭ la proletaro, disrompu la fundamenton de socialisma ekonomio, renversu la proletan diktaturon kaj efektivigu restaŭron de kapitalismo.

Dum tiu ĉi periodo, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon lanĉis frenezan atakon unu post alia kontraŭ socialismo kaj la proleta diktaturo, kelkfoje antaŭ kaj kelkfoje post la kuliso. Antaŭ ol la burĝaj dekstruloj komencis sian furiozan atakon en 1957, li malice atakis la socialisman sistemon babilaĉante, ke "ne troviĝas sistemo absolute bona" kaj ke "estas ne bone opinii, ke nur nia sistemo estas bona kaj ĉiuj aliaj estas nebonaj". Li distrumpetis la burĝan "du-ĉambran sistemon" dirante: "La Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj estas iasence en la sama naturo de la supera kaj suba ĉambroj", aldonante ke "tamen tio ĉi ne estas specifita en la Konstitucio". Li vane intencis ŝanĝi la Popolan Politikan Interkonsiliĝan Konferencon kaj la Tutlandan Kongreson de Popolaj Reprezentantoj en burĝajn superan kaj suban ĉambrojn tute kantante la saman melodion de "politika projektanta instituto" elmetita de la Alianco de Ĝang Bogjun kaj Luo Longgi. Ĉe la Luŝan-Kunveno de la Partio en 1959, li aktive subtenis la grandan konspirulon, karieriston kaj militariston Peng Dehuaj, kiu sin titolis "Haj Ĵuj", vane intencante renversi la gvidon de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ. Post kiam la problemo de Peng Dehuaj estis malkaŝita en la kunveno, li plue kunagis kun Peng Dehuaj kaj instigante iujn post la kuliso komplotis aliigi la antaŭe preparitan resumon de la kunveno en dokumenton kontraŭ "maldekstra devio" por oponi la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ. Kaj poste, li publike atakis la Luŝan-Kunvenon dirante absurde, ke "la Luŝan-Kunveno faris eraron", "ĝi ne devis batali kontraŭ dekstra devio", "estis erare batali kontraŭ la dekstra devio" kaj "ĝi restigos postmalsanon tra la tuta lando". Precipe dum la tri jaroj de portempaj malfaciloj, li aktivis eĉ pli freneze por kontraŭrevolucia restaŭro de kapitalismo en kunagado kun demonoj kaj diabloj en- kaj ekster-landaj. Malice li atakis la ĝeneralan linion, la grandan antaŭensalton kaj la popolajn komunumojn, kriaĉante ke nia ekonomio alproksimiĝis al la rando de bankrotiĝo, ke la aktuala "situacio ne estas bonega", "la ekonomio perdis la ekvilibrecon", "tri dekonoj estis naturaj katastrofoj kaj sep dekonoj estis homfaritaj plagoj" kaj "tre akraj kontraŭdiroj leviĝis en la laborist-kamparana alianco". Kaj kun kaŝita motivo li demagogis, ke la koro de la kamparanoj estas "nefacila", la koro de la laboristoj estas "nefacila" kaj tiu de la kadroj "same ne povas esti facila" kaj tiel plu. Energie li bojis: "Devas esti opozicio; devas esti publika opozicio kaj en la popolo kaj en la Partio", kaj per tio li preparis publikan opinion por ke la burĝaro enpotenciĝu. Pledante por la plivastigo de parceloj por privata uzo kaj de liberaj merkatoj,



*La revoluciaj oficistinoj kaj laboristinoj de la Ŝanhaja 17-a Ŝtata Kotona Ŝpinteksejo studas la gravan artikolon "Ĉu Iri la Socialisman aŭ Kapitalisman Vojon?"*

por la pliigo de etaj entreprenoj mem respondecaj pri la propraj profitoj aŭ perdoj, kaj por la fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado, li aktive levis la venton de "individua mastrumado". Li diris: "Sufiĉa retroiro devas esti farita en industrio kaj ankaŭ en agrokulturo, eĉ ĝis la fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumo kaj la praktiko de individua mastrumado!" "Estas ne timinde, eĉ se nombro da burĝaj elementoj aperos en la socio. Ne timu, ke kapitalismo inundos."

Rilate al la internacia batalo, li distrumpetis kapitulacon al imperiismo, la moderna reviziismo kaj la reakciuloj de diversaj landoj kaj estingon de la revoluciaj flamoj en la mondo, pledis por paciĝo en la interrilatoj kun imperiismo, moderna reviziismo kaj la diverslandaj reakciuloj kaj por redukto de helpo kaj subteno al la revolucia batalo de aliaj popoloj. Li diris: "Eĉ koncerne Usonon ni esperas starigi bonan interrilaton kun ĝi", kaj deziris "disvolvi amikajn interrilatojn" kun Usono. Li asertis krome, ke Ĥruŝĉov "ne povas restaŭri kapitalismon en Sovetunio", ke Ĥruŝĉov "vere" oponas imperiismon kaj ke "ni devas unuiĝi kun ili", "serĉi komunan grundon kaj rezervi la malakordojn" kaj "kune oponi imperiismon". Li eĉ senkaŝe volis, ke la Komunista Partio de Birmo formetu siajn armilojn, asertante: "Vi povas forlasi tiujn armilojn, vi povas ilin enterigi aŭ reorganizi viajn trupojn en la nacidefendan armeon", kaj ke ĝi "kunlaboru" kun Ne Vin. "Por kio?" "Por entrepreni socialisman revolucion."

En aŭgusto 1962, li denove eldonis sian nigran libron *Memkulturo*, kiu perfidas la proletan diktaturon kaj gvidas homojn ju pli memkulturi laŭ ĝi des pli reviziistiĝi. Ĝi fariĝis la "tem-kanto" de la plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj en ilia kreado de publika opinio por la restaŭro de kapitalismo!

Ĉiuj ĉi tiuj animskuaj faktoj de la batalo montras, ke post kiam la kapitalisma ekonomia bazo jam estas fundamente detruita, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon faris ĉiuhore kriman aktivadon por la restaŭro de kapitalismo. Precipe dum la tri jaroj de portempaj malfaciloj, elmontrante siajn ungojn kaj dentojn, li hisis la kontraŭpartian nigran flagon alvokantan por "opozicio" kaj retroiro. Li lanĉis plenampleksan atakon kontraŭ la Partio kaj socialismo sur la politika, ekonomia, ideologia kaj kultura frontoj, kaj per tio estigis ekstreme seriozan minacon al la proleta diktaturo. Se aferoj irus laŭ lia kontraŭrevolucia reviziisma linio, grandskala klasdistavoliĝo okazus en la kamparo; novaj burĝaj elementoj aperus grandnombre en la urboj; la vastaj amasoj de laboristoj kaj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj ricevus "refojan suferadon" kaj denove falus en la mizeran vivon de sklavoj kaj ŝarĝbrutoj; la socialisma ekonomia bazo de nia lando estus ĝisfunde detruita; radikala ŝanĝo okazus en la naturo de la proleta regpotenco kaj his-



*La membroj de Gonghan-a Popola Komunumo en Ŝandong indigne senmaskigas kaj akuzas la krimegojn de la ĉina Ĥruŝĉov, kiu provis restarigi kapitalismon en la kamparo.*




*Prenante la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong kiel armilon, la junaj ruĝaj gvardianinoj de la 23-a Mezlernejo de Pekino disvolvas profunde la revolucian amasan kritikon.*

torio retroirus sur la malnovan vojon kondukantan al duonkolonia kaj duonfeŭda socio. Kiel danĝera situacio tio estus!

Ĉe la Deka Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio en 1962, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ elmetis la grandan alvokon **"neniam forgesu klasbatalon"** kaj klarionis la marŝon por la proletaro eklanĉi plenampleksan reatakon kontraŭ la burĝaro. La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon alproksimiĝas al sia pereo kun ĉiu tago kiel "akrido en malfrua aŭtuno"!

## IV

La historio de la proleta diktaturo diras al ni, ke regpotenco estas la plej fundamenta el la problemoj en la klasbatalo sub la proleta diktaturo.

Resuminte la riĉan historian sperton de la proleta diktaturo en la mondo kaj konsiderante la seriozan fakton pri la komploto de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon por restaŭri kapitalismon, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone mobilizis kaj gvidis la milionojn kaj milionojn da revoluciaj popolanoj disvolvi la senprecedencan grandan proletan kulturan revolucion. Per tio la revolucio de nia lando sub la proleta diktaturo eniris pli profundan kaj pli vastan novan stadion. Ĝi estas granda decida batalo inter la proleta komandejo de Prezidanto Maŭ kaj la burĝa komandejo de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon.

En la granda historia dokumento, la Cirkulero de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio je la 16-a de Majo, 1966, Prezidanto Maŭ montris: **"Tiuj reprezentantaj personoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion, la registaron, la armeon kaj diversajn kulturajn rondojn, estas aro da kontraŭrevoluciaj reviziistoj; tuj kiam la kondiĉoj estos maturaj, ili kaptos la regpotencon kaj turnos la diktaturon de la proletaro en la diktaturon de la burĝaro. El tiuj ĉi homoj iuj jam estas malkaŝitaj de ni, iuj ankoraŭ ne, kaj iuj estas fidataj kaj kulturataj de ni kiel niaj daŭrigantoj, ekzemple, tiaj homoj kia Ĥruŝĉov, estas nun kuŝantaj apud ni; la partiaj komitatoj de diversaj niveloj nepre devas doni plenan atenton al tiu punkto."** Per "personoj kia Ĥruŝĉov" kuŝantaj apud ni, Prezidanto Maŭ aludis neniun alian ol la plej grandan enpartian potenctenanton irantan la kapitalisman vojon kaj la burĝan komandejon estratan de li.

Kial la revolucia linio de Prezidanto Maŭ estis bojkotata kaj oponata foje kaj refoje en la pasintaj 17 jaroj? Kial subfluo de kapitalisma restaŭro leviĝis supren fojon post fojo? La plej grava kaŭzo kuŝas en tio, ke tia burĝa komandejo kaŝiĝis en la aparato de la proleta diktaturo. Kaj tiu ĉi burĝa komandejo estis la plej granda minaco al la proleta diktaturo kaj la plej granda danĝero al la socialisma ŝtato.

La granda proleta kultura revolucio sonigis la funebran sonorilon de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Baraktante kun agonia frenezeco, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, en koluzio kun alia plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, ellaboris kaj praktikis burĝan reakcian linion. Ili kontraŭstaris la direktivon de Prezidanto Maŭ per elsendo de nombrego da laborgrupoj por subpremi la revolucian amasan movadon. En Kinghua-universitato kaj en la Unua Dependa Mezlernejo de la Pekina Pedagogia Universitato, kie la movado estis manipulita rekte de la ĉina Ĥruŝĉov, la batala lancpinto rekte direktiĝis al la revoluciaj amasoj kaj nombro da revoluciuloj estis kalumniita kiel "kontraŭrevoluciuloj". Koncerne al la kadroj, lia politiko estis ataki grandan nombron por protekti plenmanon. Iu numero de la bulteno de la laborgrupo en la Pekina Universitato, kiu estis cirkuligita kun lia aprobo, priskribis revolucian okazaĵon kiel kontraŭrevolucian incidenton, kaj li alvokis la tutan landon sekvi la ekzemplon kaj krei blankan teroron, ĉirkaŭataki kaj subpremi revoluciulojn kaj instigi unu parton de la amasoj por batali kontraŭ alia, farante ĉion ĉi tion kun la vana intenco estingi la furiozajn flamojn de la granda proleta kultura revolucio, persone bruligitajn de Prezidanto Maŭ.

Ĝuste en tiu ĉi ŝlosila momento, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kunvokis la 11-an Plenan Sesion de la Oka Centra Komitato de la Partio, publikigis sian *dazibaŭ-on* (opiniafiŝon) "**Bombardu la Komandejon**", kiu havas grandan historian signifon, kaj persone prezidis la ellaboradon de la "**Decido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio Koncerne al la Granda Proleta Kultura Revolucio**". Tio ĝisfunde malkaŝis la burĝan komandejon estratan de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, proklamis la bankroton de la burĝa reakcia linio antaŭenpuŝata de li kaj anoncis la venkon de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Tio estas alia granda kontribuo de Prezidanto Maŭ al la marksism-leninisma teorio pri la proleta revolucio kaj la proleta diktaturo.

Sub la persona gvidado de la granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ, la vastaj revoluciaj amasoj tra la tuta lando kondukis la grandan revolucian amasan movadon al ankoraŭ pli alta tajdo kaj finfine eltrenis la enpartian agenton n-ro 1 de la burĝaro kaj ties bandon de komplotuloj. En la alta tajdo de vasta revolucia kritikado levita tra la tuta lando, ili jam falis en la neeskapeblan reton, etenditan de centmilionoj da revoluciaj armeanoj kaj popolanoj, kaj fariĝis "ratoj sur la strato"— cel' de ĉies bato. Kio do efektive estas la "giganta monstro" — la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon? Lia propra krima historio de pseŭda revolucio kaj vera kontraŭrevolucio en la pasintaj pli ol kvardek jaroj jam donis al tio nerefuteblan respondon. La atestoj pri tiuj krimoj estas veraj kaj la neneigeblaj pruvaj dokumentoj amasegas kiel monto. Ĉu li povus senkulpigi sin per trompoj, neigoj aŭ rezistado? "**Bonvolu diri, kien iros lia moŝt' plagdia? Ĉielen flamas paperŝip', kandel' funebre pro li!**"

La granda proleta kultura revolucio estas granda festotago por nia granda popolo. Sub la suna brilo de la senlime radianta penso de Maŭ Zedong, la maro de sennombraj ruĝaj flagoj ondegas, la centmilionaj amasoj batalas kaj studas kaj kondukas kritikadon kontraŭ la burĝaro. La penso de Maŭ Zedong fariĝis greno, armilo kaj stirrado por ili. Ili ĵuras esti bonaj batalantoj de Prezidanto Maŭ. Ili ĵuras garantii, ke la proleta ŝtato generacion post generacio neniam ŝanĝos sian koloron! La penso de Maŭ Zedong jam unuigis la centojn da milionoj da popolanoj en grandan materian forton, kiu povas ĉion venki kaj ĉion konkeri, kaj kiu estas skuanta la malnovan mondon kaj kreanta novan mondon.

**"Nur socialismo povas savi Ĉinion!"**

Tra la pasintaj dekoj da jaroj, nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkoman-

danto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ komandis la potencan armeon de la revolucio persekuti la fuĝan malamikon, ligi la grizan drakon, fari grandajn planojn kaj ataki ĉion koruptitan kaj malbonan, direktis la ŝipon de la ĉina revolucio puŝiĝi tra la torentoj, preterpasante la kaŝitajn rifojn, spitante la ventojn kaj ondojn kaj antaŭeniradi en triumfo kaj levis marksism-leninismon ĝis tute nova stadio, la stadio de la penso de Maŭ Zedong.

Estas Prezidanto Maŭ, kiu montris, ke la novdemokratia revolucio estas la nepra preparo por la socialisma revolucio kaj la socialisma revolucio estas la neevitebla tendenco de la novdemokratia revolucio. Post la venko de la novdemokratia revolucio, estis necese por la revolucio seninterrompe transiri al la stadio de socialismo.

Estas Prezidanto Maŭ, kiu montris, ke el la pafilo venas ŝtatpotenco kaj ke nur per pafiloj la malnova mondo sub la regado de imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj povas esti transformita.

Estas Prezidanto Maŭ, kiu montris, ke post la kapto de regpotenco, la proletaro nepre devas persisti en la proleta diktaturo kaj ĝin firmigi kaj persisti iri la socialisman vojon, kaj ke kiom ajn multe da aferoj ni havas por fari, ni nepre devas ne forgesi la proletan diktaturon.

Estas Prezidanto Maŭ, kiu persone iniciatis la senprecedencan grandan proletan kulturan revolucion, kaj montris, ke klasoj kaj klasbatalo ekzistas plue dum la tuta historia periodo de socialisma socio kaj ke estas necese konduki la revolucion ĝis la fino sub la proleta diktaturo.

"Ruĝas la oriento, leviĝas la suno, en Ĉinio aperas Maŭ Zedong."

La direkto montrita de Prezidanto Maŭ estas la direkto por la revoluciaj popoloj de la tuta mondo. La vojo malfermita de Prezidanto Maŭ estas la vojo laŭ kiu antaŭenmarŝos la revoluciaj popoloj de la tuta mondo.

Kien iru Ĉinio? Kien iru la mondo? La historia rado estas ruliĝanta antaŭen en la direkto montrita de la penso de Maŭ Zedong!

*La paŝtistoj de Ŝilingole-ligo de Interna Mongolio kunvenas por akuzi la ĉinan Ĥruŝĉov kaj liajn agentojn en Interna Mongolio.*



ĈEN JONGGUJ:

# Daĝaj-brigado Antaŭenmarŝas en la Batalo kontraŭ la Ĉina Ĥruŝĉov

LA ĉina Ĥruŝĉov estas la plej danĝera malamiko de la diktaturo de la proletaro kaj ankaŭ la morta kontraŭulo de la kvincent milionoj da kamparanoj de nia lando. De multaj jaroj, utiligante la uzurpitan oficon kaj portante la mantelon de "veterana revoluciulo", li disvendis grandan kvanton de varoj de kapitalismo en la kamparo kaj ĉie subfosis la socialisman kolektivan ekonomion. Por defendi la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj kaj kadroj de nia Daĝaj-brigado faris longdaŭran kaj pint-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en Ŝanhi-provinco.

## EN LA MOVADO DE KOOPERIGO

Tiel frue kiel en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito Prezidanto Maŭ jam klare montris: **"De miloj da jaroj nur individua ekonomio estas praktikata ĉe la kamparanaj amasoj kaj ĉiu familio formas produktan unuon. Ĝuste tia diseca individua produktado estas la ekonomia bazo de la feŭdisma regado kaj igis la kamparanojn ĉiam mizeraj. La unika rimedo por ŝanĝi tian staton estas paŝopostpaŝe efektivigi kolektivigon."** Prezidanto Maŭ ankoraŭ diris: **"Nur socialismo povas savi Ĉinion." "Krom socialismo ne estas alia elirejo."** De multaj jaroj tiuj instruoj de Prezidanto Maŭ estas firme gravuritaj en la cerbo de niaj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj de Daĝaj.

En 1951, niaj vastaj amasoj de malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ŝanhi-provinco postulis starigi provajn agrikulturajn kooperativojn sur la bazo de interhelpaj grupoj laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ. Sed tio renkontis energian oponadon de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en Ŝanhi-provinco. Al iu raporto la ĉina Ĥruŝĉov faris la jenan instrukcian noton: "...Iuj elmetis la jenan opinion: Estas necese paŝon post paŝo ŝanceli, malfortigi kaj finfine nuligi la bazon de privata posedsistemo kaj levi la agrikulturajn interhelpajn grupojn en agrikulturajn kooperativojn, kaj per tio kiel nova faktoro venki la spontanean tendencon de kamparanoj. Tio estas erara, danĝera kaj utopia socialisma ideo pri agrikulturado." La celo de tio, ke la ĉina Ĥruŝĉov distrumpetis tian reakcian absurdaĵon, ja estis oponi kontraŭ socialismo. Niaj sennombraj revoluciaj martiroj sangverŝis kaj oferis sian vivon ja por elimini la privatan posedsistemon kaj efektivigi socialismon. Ĉu ni klopodos ne por malfortigi la bazon de privata posedsistemo, sed por ĝin fortigi? Ĉu ni devus ne levi la interhelpajn grupojn en kooperativojn, sed retreni ilin en individuan mastrumadon de unuopa familio? Ĉu ankoraŭ ne sufiĉis al ni malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj la suferoj alportitaj de la individua mastrumado? Ĉi tie ni ne povas ne mencii tion, kio okazis tiam en nia Daĝaj.

En printempo de 1952, komisiite de la malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj de Daĝaj, mi iris pli ol dek fojojn al la gubernia urbo por akiri permeson transformi interhelpajn grupojn en elementan agrikulturan produktan kooperativon. Sed neniel donis sankcion la gvida instanco de la gubernio kiu ricevis nigran instrukcion de la ĉina Ĥruŝĉov, transdonitan de la provinca instanco. Ni atendis kaj atendis, kaj fine en 1953 oni donis sankcion al niaj interhelpaj grupoj el 49 familioj fondi elementan agrikulturan produktan kooperativon el 30 familioj. Sed neniu el la restantaj 19 familioj volis iri la vojon de individua mastrumado. Sekve, ni nur povis starigi kooperativon laŭraporte el 30, sed efektive el 49 familioj. Tamen tio estas malkovrita de la kadroj de la gubernio dum la aŭtuna distribuado kaj ili kritikis nin. La ĉina Ĥruŝĉov ja portas unu saman pantalonon kun la bienuloj kaj kulakoj en la kamparo. Kiel vesperto timas sunbrilon, ili timas la agrikulturan kooperigon! Kompreneble, **"kvankam preskaŭ**

**ĉie troviĝas oportunistoj kiuj klopodas bari la tajdon, tamen la tajdo estas ĉiam nebarebla.''** Ne nur la vastaj amasoj de malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj de nia Daĝaj, sed ankaŭ tiuj de nia Ŝanhi-provinco kaj de la tuta lando ne aŭskultis la absurdaĵon de la ĉina Ĥruŝĉov, sed male, levis la interhelpajn grupojn en la kooperativojn, kaj poste ankaŭ efektivigis popolkomunumigon laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ.


En tiu ĉi sama periodo, ĝuste tiu ĉi ĉina Ĥruŝĉov flirtigante la ĉifonan flagon "firmigi la novdemokratian ordon" distrumpetis la "kvar liberojn" (t.e. libero de uzuro, libero de dungo de laboristoj, libero de vendo kaj aĉeto de tero kaj libero de privata entreprenado), kaj ke "ekspluatado estas merito", "ekspluatado estas glora", kaj pledis por disvolvi la tipon de "kamparana familio kun tri ĉevaloj, unu plugilo kaj unu veturilo", kio efektive signifas disvolvi la kulakan ekonomion. Kio do, se tio ne estis por reanimi la jam faligitajn bienulojn kaj kulakojn! Ĝuste estis li, kiu forhakis grandan nombron de agrikulturaj kooperativoj en la alta tajdo de la agrikultura kooperigo de 1955; en 1962 kiam nia lando renkontis provizoran malfacilon en ekonomio, li atakis la tri ruĝajn standardojn (la ĝeneralan linion de la Partio por konstruado de socialismo, la antaŭensaltegon kaj la popolajn komunumojn), efektivigis "plivastigon de parceloj por privata uzo kaj de liberaj merkatoj, pliigon de etaj entreprenoj mem respondecaj pri la propraj profitoj aŭ perdoj, kaj fikson de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado", levante la venton de individua mastrumado. Kiam blovas la vento tiam leviĝas ondoj. Ĉiu nigra vento levita de la ĉina Ĥruŝĉov blovis al Ŝanhi kaj al Daĝaj. Dank' al tio, ke en ĉiu kriza momento la granda direktilisto Prezidanto Maŭ ĝustatempe elmetis instrukciojn, ni povis rapide rekoni la intrigon de la malamiko, firme kontraŭstari la herezan venton, garantii venkan disvolviĝon de la socialisma kolektiva ekonomio kaj bankrotigi la kruelan ambicion de la ĉina Ĥruŝĉov disvolvi kaj restarigi kapitalismon en la kamparo kaj denove sklavigi nin malriĉ-kamparanojn kaj malsuperajn mez-kamparanojn.

## ALTE FLIRTAS LA RUĜA STANDARDO DE DAĜAJ-BRIGADO

Sub la brilo de la granda penso de Maŭ Zedong, **"socialismo ĉie venke antaŭenmarŝas, transpasante ĉiujn obstaklojn."** Antaŭenmarŝas la tuta lando, ankaŭ Ŝanhi-provinco kaj Daĝaj-brigado! Post la popolkomunumigo en 1960, Daĝaj-brigadon trafis granda sekeco tre rara en la historio. Sed tiu jaro tamen estis jaro kun la plej alta produktkvanto de greno en la historio de Daĝaj. La fera fakto konvinke pruvis, ke la popola komunumo havas senkomparan superecon, kaj la orientilo de sinapogo sur la propraj fortoj elmetita de Prezidanto Maŭ estas tute ĝusta. La fera fakto ankaŭ forte refutis la absurdaĵojn de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en Ŝanhi-provinco kiaj "Altgrada kooperativo estas malpli bona ol elementa kooperativo", "la starigo de la popola komunumo estas antaŭtempa", "la fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado havas superecon", "oni ne devas timi la inundon de kapitalismo" ktp.

Post kiam nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris la grandan alvokon **"lerni de Daĝaj-brigado**

*Ĉen Jongguj (meze en la unua vico) lernas el verko de Prezidanto Maŭ kune kun aliaj komunumanoj.*



**en agrikulturo"**, kamaradoj de multaj frataj provincoj, gubernioj kaj komunumoj de la tuta lando kaj diverslandaj amikoj de la mondo vizitis Daĝaj-brigadon grupon post grupo. Tio multe kuraĝigis la malriĉ-kamparanojn kaj malsuperajn mez-kamparanojn de Daĝaj-brigado, ke ili akiris unu novan venkon post alia. Ĉio ĉi tio dolore pikis la ĉinan Ĥruŝĉov kaj liajn agentojn en Ŝanhi-provinco, ke ili ĉiam pli akre sentis, ke la ruĝa standardo de Daĝaj-brigado estas por ili obstaklo, kiu malhelpas la restarigon de kapitalismo en la kamparo. Tial ili prenis Daĝaj-brigadon kiel najlon en la okulo kaj dornon en la karno. Precipe ekde 1961 ili pliintensigis sian krimagadon kontraŭ Daĝaj-brigado. En tiu jaro la unua sekretario de la Partia Komitato de Hijang-gubernio haste venis al Daĝaj-brigado kun dekkelkaj personoj sub sia gvido por esplori la tiel nomatan "blufon". Kiam ilia intrigo fiaskis, ili kriaĉis, ke ni trompis la registaron per malgrandigo de la efektiva cifero de nia agroareo, kaj devigis nin malaltigi la produktkvanton kaj anstataŭ la efektivan po-muan produktkvanton de 310 kg. raporti la falsan de 290 kg., kaj anstataŭ 120,000 kg. da greno pagendaj kaj vendendaj al la ŝtato, raporti 110,000 kg. Tiel barbare ili surverŝis la malriĉajn kamparanojn kaj malsuperajn mez-kamparanojn per malvarma akvo, ŝutis koton sur la ruĝan standardon de Daĝaj-brigado kaj neniigis la superecon de la socialisma kolektiva ekonomio.

Vintre de 1964, profitante la ŝancon de la movado de Kvar Purigoj ili organizite kaj laŭplane ludis arlekenan farson kun vana espero faligi la ruĝan standardon de Daĝaj-brigado. Ĉifoje ilia prezentado estis pli drasta, longdaŭra kaj varia; tamen per tio pli klare kaj komplete malkaŝiĝis ilia vizaĝo antaŭ la amasoj de Daĝaj-brigado.

La Kvar Purigoj estas socialisma eduka movado kun granda signifo. Prezidanto Maŭ difinis serion da ĝusta linio, orientilo kaj politikoj rilate al la movado de Kvar Purigoj. La laborgrupo sendita al Daĝaj-brigado kaj direktata de la plenmano da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la antaŭaj partiaj komitatoj de la provinco, subprovinco kaj gubernio, tute ne praktikis la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, sed lojale plenumis la reakcian linion "maldekstran" en formo sed dekstran en esenco ellaboritan de la ĉina Ĥruŝĉov. Dum la du monatoj de laborado en Daĝaj-brigado ili neniam organizis la amasojn kaj kadrojn por studi verkojn de Prezidanto Maŭ, sed pli ol dudek fojojn organizis ilin por studi la tiel nomatan "progresan sperton" de Kvar Purigoj en la kamparo plenforte distrumpetatan de la ĉina Ĥruŝĉov. Ili ne proksimiĝis al malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj kaj bazaj kadroj, sed sin turnis al la personoj kiuj havas plej multe da kritikoj al la kadroj de baza unuo. Kiuj plej malkontentiĝis pri la kadroj de Daĝaj-brigado? Kompreneble, antaŭ ĉio estas la kontrolataj bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj kaj malbonaj elementoj. Tiuj ĉi aktive provizis al la laborgrupo "materialon", fariĝante ilia apoganta forto en la movado de Kvar Purigoj. Tamen la vastaj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj kaj kadroj de baza unuo fariĝis ĉefaj objektoj de ilia batalado kaj batado. Ili ĝuste tiel ekscitis la arogantecon de la bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj kaj malbonaj elementoj, kaj subpremis la revolucian spiriton de la malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj.

Prezidanto Maŭ diris: **"El ĉiuj regresaj agoj venas rezulto kontraŭa al la deziro de la agantoj mem. Tio estas senescepta ĉu en antikveco aŭ nuntempo, en Ĉinio aŭ eksterlando."** Tio, kion ili faris, edukis nin per la negativa ekzemplo. Multaj komencis pripensi tian demandon: Kiu alsendis la laborgrupon? Por kio ĝi venas ĉi tien? Pli kaj pli multe da faktoj pruvis, ke tiu, kiu sendis kaj direktas la laborgrupon, havas kaŝitan intencon. Ili venis ne por helpi kaj progresigi Daĝaj-brigadon, sed por ĝin faligi kaj senkreditigi. Ni faris pint-kontraŭpintan batalon kontraŭ tiu laborgrupo, kiu oponas kontraŭ nia Daĝaj-brigado.

Post "enradikiĝo kaj intervizito" kaj "sekreta laborado" fare de la laborgrupo, la Daĝaj-brigado estis determinita kiel triaspeca brigado kun seriozaj problemoj. Ili ĉie propagandis: La ruĝa standardo de Daĝaj-brigado estas starigita per "falsigoj kaj mensogoj", "en la flagstango de Daĝaj-brigado troviĝas vermoj; se la vermoj ne estas forigitaj, la ruĝa flago de Daĝaj-brigado ne povas esti alte levita." Laŭ la intenco de la ĉina Ĥruŝĉov, la laborgrupo deprenis la partian kaj administran potencon de Daĝaj-brigado, flanken puŝante ĉiujn kadrojn. Ĉio estis direktata kaj mastrumata de ili. El la "kaŭzoj", per kiuj ili klopodis senkreditigi kaj faligi Daĝaj-brigadon, troviĝis la jenaj:

Ili diris: La kampoj de Daĝaj-brigado estas montaj kaj sekecaj, tamen tiel alta estas la pomua produktkvanto. La kaŭzo certe kuŝas en tio, ke estis malplimultigita la areo de tero ĉe registrigo. Por enketi la "nigran teron", ili kreis la miraklon en termezuro de la tuta lando, organizante mezuran grupon el kadroj el la provinca, subprovinca, gubernia kaj komunuma gvidaj organoj kaj najbaraj brigadoj. Ĝi nombris 70 personojn. Ili detale enketis dufoje en daŭro de pli ol 50 tagoj. Sed laŭ ilia mezuro la suma areo estas ne nur ne



*Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la Daĝaj-anoj ĵuras akiri riĉan rikolton kaj en la revolucio kaj en la produktado.*

pli granda sed malpli granda je kelkaj muoj ol tiu registrita de Daĝaj-brigado mem.

Ili diris: Se Daĝaj-brigado ne malpli multe registris la areon de tero, do estas evidente ke la produktkvanto de greno ne estas vera. Sekve ili kontrolis la kontolibrojn kaj la loĝantaron kaj pesis la restan grenon. Sed estis konstatita, ke la kvanto de greno estas ne malpli multa eĉ je duono da kg.

Kaj ili diris: Daĝaj-brigado kun nur kelkdek familioj kaj centoj da muoj de tero, tamen povas liveri al la ŝtato 120,000 kg. da greno ĉiujare. En tio nepre estas falso. Ili turnis sin al la gubernia Grena Oficejo por kontroli la konton pri greno liverita de Daĝaj-brigado en la pasintaj jaroj. Tamen ili ankaŭ trovis nenian atestaĵon pri "falsigo kaj mensogo".

Kiam ili devigis sin konfesi, ke la grena produktkvanto de Daĝaj-brigado estas efektiva, la superbezona greno vendita al la ŝtato estas multa kaj la administrado de produkto estas racia, ili klopodis serĉi "eraron" en aranĝo de la vivo de la komunumanoj. Tamen ni ankaŭ donis al ili fortoplenan refuton.

Prezidanto Maŭ diris: **"Scienco neniam timas kritikon, ĉar scienco estas vero, kiu ne timas refuton."** Se iu povas esti refutita de aliaj, do tio pruvas, ke en liaj manoj ne estas vero. Post nur du monatoj, tiu ĉi laborgrupo estis forpelita kun griza humoro plene venkita de la feraj faktoj. Prezidanto Maŭ zorgas Daĝaj-brigadon kaj ĝin lumigas lia revolucia linio. Poste, je ĉeesto de personoj rekte senditaj de la Centra Komitato de KPĈ, la partia filio de Daĝaj-brigado kun la vastaj amasoj kondukis la movadon de Kvar Purigoj laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ. La rezulto de la Kvar Purigoj pruvis, ke Daĝaj-brigado agas laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio en politiko, ideologio, organizo kaj ekonomio.

Kompreneble, la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en Ŝanhi-provinco neniel povis ĉerpi lecionon el la malsukcesoj. En 1965 kaj 1966 ili denove ŝtele kolektis enketan "materialon", intencante ankoraŭfoje insidi la kadrojn de Daĝaj-brigado. Tamen ilia krima intrigo komplete bankrotis pro la komenciĝo de la granda proleta kultura revolucio. Ja neniam falos la ruĝa standardo de Daĝaj-brigado starigita de Prezidanto Maŭ mem.

## SOLIDE BATI LA ENAKVIGITAN HUNDON

Daĝaj-brigado povis frakasi la subfosan intrigon de la klasa malamiko kaj grandpaŝe antaŭenmarŝas kontraŭ unu post alia kontraŭfluo ĉefe dank' al la ĝusta gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Estas la penso de Maŭ Zedong kiu armis la cerbon de ni malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj de Daĝaj-brigado, por ke ni povu ĉiam firme teni la socialisman direkton en ŝtormo kaj venki, en la tri grandaj revoluciaj movadoj, surprizatakon de serioza natura katastrofo kaj la subfoson de la klasa malamiko.

La faktoj de batalado dum pli ol unu jaro en la granda proleta kultura revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ pluapaŝe komprenigis nin: En la periodo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, la batalo inter la du klasoj — burĝaro kaj proletaro — du vojoj kaj du linioj estas longdaŭra, ekstreme akra kaj komplika. Prezidanto Maŭ instruas nin, ke sub la kondiĉo de la diktaturo de la proletaro la ĉefa objekto de la revolucio estas la reprezentantaj personoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la diktaturajn organojn de la proletaro, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. La kontraŭdiro inter tiu ĉi plenmano da aĉuloj kaj la vastaj revoluciaj amasoj estas la ĉefa kaj antagonisma kontraŭdiro. Arbo havas sian radikon kaj fluo sian fonton. La granda aĉulo ĉina Ĥruŝĉov estas la ĝenerala estro de la potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon embuskantaj en diversaj regionoj kaj institucioj kaj ankaŭ la ĉefa postkulisa subtenanto de la bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj kaj malbonaj elementoj en la kamparo. Oni povas diri, ke neniu el la nigraj ventoj blovintaj unu post alia kontraŭ socialismo en la pasintaj multaj jaroj ne estis direktata kaj subtenata persone de la ĉina Ĥruŝĉov. De multe da jaroj la ĉina Ĥruŝĉov oponas kontraŭ tio, por kio pledas Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ gvidas nin marŝi sur la granda kaj hela vojo, dum li vane klopodas retiri nin al senelirejo de kapitalismo. Prezidanto Maŭ persone starigis la ruĝan standardon de Daĝaj-brigado, dum li penegis por subfosi Daĝaj-brigadon, forhaki la ruĝan standardon, kaj starigi la nigran standardon.

La malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj de nia Daĝaj-brigado komprenas el la propra sperto, ke la penso de Maŭ Zedong estas nia ! vivradiko kaj la socialisma kolektiva ekonomio estas nia apogilo. Kiu oponas kontraŭ la penso de Maŭ Zedong, kiu subfosas la popolan komunumon, kun tiu ni luktos ĝis la fino. La aĉulo ĉina Ĥruŝĉov estas lupo en homa haŭto. Li faris ĉiajn eblajn malbonojn. Nun estas la tempo por ni reguligi ĉiujn kontojn kun li. La malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj de nia Daĝaj-brigado decidis firme unuiĝi kun la proletaj revoluciuloj de la tuta lando, disvolvi la revolucian spiriton "solide bati la enakvigitan hundon", kaj per pli granda energio ol tiu per kiu ni luktis kontraŭ la Tigrokapa Monto batali kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov kaj la plenmano da agentoj de li en Ŝanhi-provinco ĝis ili estos komplete faligitaj kaj senkreditigitaj! Plene eliminu ilian venenan influon en la agrikultura fronto!

# KURANTAJ AFEROJ

## En Konstruado

### GRANDA PLIPRODUKTO DE KOLZO TRA LA LANDO

En la granda proleta kultura revolucio, venadas el la vastaj kolzo-produktaj regionoj de nia lando ĝojigaj informoj pri riĉa rikolto.

Laŭ statistiko, ĉijare la totala produktkvanto de kolzo de la tuta lando pliiĝis je ĉirkaŭ 10% ol tiu de la pasinta jaro. En la komenco de julio, la kolzoj en diversaj lokoj jam estis finfalĉitaj. Pli grandan kreskon de la produktkvanto de kolzo havas la gravaj produktregionoj kiaj Hubej-, Gianghi-, Siĉuan- kaj Hunan-provincoj.

### ABUNDA RIKOLTO EN BRUTPAŜTADO DE INTERNA MONGOLIO


De julio de la pasinta jaro ĝis junio de la kuranta, en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio oni ricevis pli ol 9,400,000 brutidojn. La pliprodukto superis 20% de tiu de la pasinta jaro. La totala brutkvanto grandiĝas je pli ol 1,300,000 kompare kun tiu de la pasinta jaro.

En la daŭro de la menciita periodo, la paŝtistoj liveris al la ŝtato sume pli ol 3,200,000 brutojn porplugajn kaj pormanĝajn kaj vendis al la ŝtato grandan kvanton da lano kaj feloj.

### FABRIKADO DE MATRICOJ PER ŜTALAJ PATRICOJ SUKCESIS EN ŜANHAJO

Disvolvante la spiriton sin apogi sur la propraj fortoj, la proletaj revoluciuloj de la Unua Fabriko de Matricoj en Ŝanhajo sukcesis en mallonga tempo fabriki matricojn per la procedo de stampado per ŝtalaj patricoj. La tiel fabrikitaj matricoj havas larĝajn randojn kaj estas rekte alfikseblaj sur la muldmaŝino. Tiu procedo nun jam estas uzata en fabrikado de matricoj.

En produkto de kompleta serio da tiaspecaj matricoj, oni povas ŝpari 50 kg. da kupro kaj 2 kg. da stano kompare kun produkto de tiu de malnova speco. Krome, la kvalito de la matricoj multe plialtiĝis.





# Fotoj pri Nia Eksplodigo de la Hidrogena Bombo

En dediĉo al nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ!

En dediĉo al la kvardeka datreveno de la fondiĝo de la granda Ĉina Popola Liberiga Armeo, propramane kreita kaj persone gvidata de Prezidanto Maŭ kaj rekte komandata de vicprezidanto Lin!

En dediĉo al la Nacia Festo de la granda Ĉina Popola Respubliko en aĝo de dek ok plenaj jaroj!

La laboristoj, teknikistoj, sciencaj laborantoj kaj la komandantoj kaj batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kiuj partoprenis la esploradon, projektadon, produktadon kaj eksperimentadon de la hidrogena bombo

*La 30-a septembro, 1967*



# Krimagoj de la Ĉina Ĥruŝĉov en la Orientazia Lanŝpinteksa Fabriko


ANTAŬ la Liberiĝo, en Tiangin troviĝis Orientazia Lanŝpinteksa Fabriko, alinomata Orientazia Lanŝpinteksa Kompanio Limigita, kiu reorganiziĝis post la Liberiĝo en la Trian Lanŝpinteksan Fabrikon de Tiangin. Tiu fabriko ja estis la "olepremilo" de la ekstreme reakcia granda kapitalisto Song Fejking por ekspluati kaj subpremi laboristojn.

La patraĉo de Song Fejking estis kompradoro servanta al fremduloj kaj adoptita filo de iu angla "predikisto". Li iam oficis kiel prezidanto de la provinca konsilantaro de Ŝandong-provinco, kaj riĉiĝis per ekspluatado al la popolo. Song Fejking lernis komercon en Usono. Reveninte en la hejmlandon, li starigis la Orientazian Lanŝpinteksan Fabrikon per la mono kruele rabkolektita de lia

*La maljuna laboristo akuzas la kruelan ekspluatadon kaj subpremadon fare de la kapitalisto Song Fejking.*



*Jen "aŭtomata temporegistrilo" kaj "karto pri iro al necesejo" uzitaj de la kapitalistoj de la antaŭa Orientazia Lanŝpinteksa Fabriko por maljuste subjugigi la gelaboristojn. Tiuj, kiuj restis en necesejo iom pli longe, estis punitaj aŭ eĉ eksigitaj. Kaj la ĉina Ĥruŝĉov diris ke "La kapitalistoj devas batali kontraŭ la laboristoj." Li estas kun la kapitalistoj por subpremi la laboristojn.*



patraĉo, el importita lano fabrikigis lanfadenon kun marko "Diyang", kiu signifas "luktantajn ŝafojn" kaj kies prononco estas sama al la ideografiaĵoj signifantaj "bojkoti fremdajn varojn", kaj vendis ĝin kiel pure ĉinan produkton por trompi la patriotojn. Plejparto de liaj akciuloj estis grandaj militaristoj kaj burokratoj de Kuomintango. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito li sin apogis sur japanaj diabloj kaj produktis por ili jutsakojn. Kaj post la venko de la milito, li persone bonvenigis kaj rekompencis la tiel nomatan "aliancan armeon" (la usonan) por flati la usonan imperiismon. Li ellernis de la okcidenta burĝaro serion da "administraj rimedoj" kaj faris por la fabriko centojn da reguloj por kruele subpremi kaj ekspluati la laboristojn, ekzemple, malpermeson de edziniĝo al la laboristinoj, malpermeson de edziĝo al laboristoj kies salajro ne atingis cent juanojn, malpermeson al la laboristoj loĝantaj en la fabriko iri el la fabriko sen permeso... ktp. Se laboristoj iom malobservis tiujn regulojn, ili do estis eksigitaj aŭ monpunitaj. Li ankoraŭ dividis la laboristojn en jarajn, monatajn, tagajn kaj provizorajn, celante detrui ilian unuiĝon, kaj per disdono de "akcioj", distrumpetis la absurdaĵon ke "ĉiuj estas akciuloj", por kaŝi la fakton de ekspluatado al la laboristoj. Tial, la Orientazia Lanŝpinteksa Fabriko alinomiĝis "Civilizita Infero". En 1947, Song Fejking skribis artikolon titolitan *Mia Sonĝo*, en kiu li priskribis sian "idealon" pri disvolvo de kapitalismo, vane sonĝante "disvolvi" sian malgrandan fabrikon kun ĉ. mil dungitaj laboristoj en dek grandtipajn entreprenojn kun dekmiloj da laboristoj inkluzive de pezindustriaj fabrikoj de fero kaj ŝtalo, maŝinfabrikado kaj aliaj. Li ankoraŭ projektis konstrui "urbon de Song-familio" en la okcidenta antaŭurbo de Tiangin kaj pendigis la planon sur muro, por fanfaroni ĉie pri ĝi. En tiu "urbo", devas troviĝi ne nur kvartaloj de industrio, komerco, loĝejoj kaj oficejoj, sed ankaŭ preĝejo kaj templo.

La ĉina Ĥruŝĉov, la plej granda enpartia potencteneanto iranta la kapitalisman vojon, venis por "inspektado" en la Orientazian Lanŝpinteksan Fabrikon, je la 21-a de aprilo, 1949. Tiam, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ ĵus faris paroladon en la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Partio nur antaŭ unu monato kaj duono. Li diris: **"Post la venko de la revolucio,... konstrui Ĉinion en grandan socialisman landon."** Post la tutlanda venko de la ĉina revolucio, la fundamenta kontraŭdiro interne de la lando estos **"la kontraŭdiro inter la laborista klaso kaj la burĝaro"**. Kaj **"limigo kaj opono al limigo estos la ĉefa formo de klasbatalo interne de la novdemokratia lando."** En la Orientazia Lanŝpinteksa Fabriko tre akre iris la klasbatalo de limigo kaj opono kontraŭ limigo. La kapitalisto Song Fejking ĉiarimede subfosis produktadon kaj daŭrigis siajn kruelan subpremadon kaj ekspluatadon al la laboristoj. Subtenate de la armeaj reprezentantoj, la laboristoj kaj oficistoj de la fabriko leviĝis por malkaŝi kaj kondamni la krimagojn de la kapitalisto, firme renormaligis la produktadon kaj oponis kontraŭ la ekspluatado kaj subpremado.

Alveninte en la fabrikon, la plej granda enpartia potencteneanto iranta la kapitalisman vojon tuj faris sekretan interparolon sole kun Song Fejking.

Li diris al Song: "Nun vi funkciigas nur unu fabrikon. En la estonteco, vi povos funkciigi du, tri... ok fabrikojn. Kiam la lando transiros al socialismo... la ŝtato ankoraŭ konfidos al vi la funkciigon de la ok fabrikoj, kaj vi restos la administranto. ... Ĉar vi estas kapabla, ok pliaj fabrikoj doniĝos al vi, sume konfidiĝos al vi la funkciigo de dekses fabrikoj. Via salajro ne estos reduktita sed pliigita, tamen vi devos bone ilin funkciigi!"

Post la sekreta interparolado, li iris "akcepti" la laboristajn kaj la armeajn reprezentantojn de la fabriko, sub la konduko de la kapitalisto. Jen la rememoro de la maljunaj laboristoj pri la tiama okazaĵo: Komence, la armea reprezentanto prezentis al li la opiniojn de la laboristoj, malkaŝis la krimagojn de la kapitalisto en subfosado de la produktado, subpremado al la laborista movado kaj subpremado kaj ekspluatado al la laboristoj. Aŭdinte tion, Song Fejking tuj diris malĝoje: "Ili malriĉetas, sed mi malriĉegas, ĉiuj ni malriĉas. Mi konstruigis la fabrikon kaj vivtenas tiom multe da laboristoj, sed nun estas kulpigata pro ekspluatado. Mi ja ne scias, kio estas ekspluatado." Tiam, la armea reprezentanto indigne leviĝis dirante: "Ekspluato ja estas ekspluato. ..." Ne atendinte ĝis la fino de lia parolo, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon laŭte demandis riproĉe: Kiam vi partoprenis la revolucion? Vi ankoraŭ devas klopodi por bone kompreni la politikon!

La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon ankoraŭ diris al Song Fejking: "Vi, sinjoro Song, ne komprenas la vorton ekspluato. 'Ekspluato' estas traduko de fremdlanda termino, kaj ankaŭ ĝin oni povas trovi en la vortaro de la Komunista Partio. Se ĝi ne plaĉas al vi, oni uzu alian anstataŭe! Fakte, vi estas vivtenanto de laboristoj. Ju pli multe vi konstruigos fabrikojn kaj ekspluatos laboristojn, estos des pli bone. Nun vi funkciigas unu fabrikon, ekspluatante mil laboristojn, sed estos pli bone, se vi funkciigos en la estonteco dek fabrikojn, ekspluatante dekmil, dudekmil laboristojn."

Poste, li faris parolon al la laboristaj reprezentantoj dum unu horo. Laŭ la rememoro de la maljunaj laboristoj, li tuŝis la jenajn problemojn: Li laŭdis ke la Orientazia Lanŝpinteksa Fabriko estas bone administrata kaj bone iras la "bonstatiga" servo de la fabriko, ke Song Fejking estas kapabla, havas riĉan scion pri la produktado kaj bone lernas la principojn kaj politikojn de la Kompartio. Li ankoraŭ diris, ke en la novdemokratia socio ekspluato estas permesita, ke la laboristoj konfidu administranton Song, ne "tumultu", sed aŭskultu kion la kompanio diras.

Je sia foriro, li renkontis ĉe la pordego iun laboriston kaj diris arogante: "Nun, altiĝis via socia pozicio. Se estus en la pasinteco, ĉu vi povus vidi tian homon kia mi? Nun en Ĉinio mi estas, se ne la unua, almenaŭ la dua en rango."

*La proletaj revoluciuloj studas verkon de Prezidanto Maŭ.*



Post la foriro de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, Song Fejking perdis la prudenton pro ĝojo kaj diris al ĉiuj renkontataj: "Mia idealo disvolvi la entreprenon ja estis kvazaŭ sonĝo kiun mi sonĝis dum tiom da jaroj, kaj nur nun ĝi vere realiĝos." Li diris, ke li sentas en si "novan esperon" kaj "novan vivon". En la 30-a de aprilo, li skribis leteron al la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, dirante, ke li volas "grandigi la produkton kaj konstrui novan fabrikon". Leginte la leteron, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon tiel ĝojiĝis kvazaŭ li estus ricevinta trezoron, kaj tuj persone skribis respondon en la 3-a de majo kaj asignis specialan homon por ĝin sendi al Song Fejking. En la letero, li esprimis, ke li "tre ĝojas". Li kuraĝigis Song Fejking ke tiu "daŭre klopodu, brila estas la perspektivo, kaj ne malproksimas la reprosperiĝo de la lando kaj la nacio."

Poste, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon plurfoje venis plie al Tiangin. Li distrumpetis, ke "ekspluato estas merito", laŭdis la Orientazian Lanŝpinteksan Fabrikon kaj Song Fejking, dirante, ke "la ekspluatado de kapitalistoj faras meritoplenajn kontribuojn al la historio"; ke "hodiaŭ, la ĉina kapitalismo troviĝas en sia juneco, kaj nun estas ĝuste la tempo por ĝi ludi sian historian, aktivan rolon kaj fari meritoplenan kontribuon". Li ankoraŭ diris, ke Orientazia Fabriko estas bone funkciigata, ke Song Fejking estas "prudenta" kaj "progresema nacia kapitalisto".

Subtenate kaj kuraĝigate de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, Song Fejking kaj liaj lakeoj lanĉis furiozan atakon kontraŭ la laborista klaso.

Ĝuste en la dua tago post la foriro de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, Song Fejking okazigis tutfabrikan kunvenon de laboristoj kaj oficistoj, por premi la laboristojn per la tiel nomata "instrukcio" postrestigita de li. Imitante la tonon de sia postkulisa mastro Song Fejking diris: "Kiel mi ekspluatis vin? Vi estas vivtenataj de mi per la fabriko kiun mi konstruigis per mono. Ju pli grandan fabrikon mi funkciigas kaj ju pli multajn laboristojn mi vivtenas, des pli glora mi estas."



*La proletaj revoluciuloj firme tenas la revolucion kaj forte stimulas la produktadon.*

Por teni sian ordon de kapitalisma regado ekspluati la laboristojn, li projektis novan regularon de la fabriko sur la bazo de la malnova, "ŝanĝante la akvon sed ne la dekoktatajn drogojn". La laboristoj firme oponis ĝin, sed Song Fejking devige presigis ĝin por "prova" praktikado. Tiu kapitalisma "talismano" estis disrompita de la laboristoj nur en la movado kontraŭ koruptiĝo, kontraŭ malŝparemo kaj kontraŭ burokratismo kaj en la movado kontraŭ subaĉeto, kontraŭ evito de pago de impostoj, kontraŭ ŝtelo de ŝtataj posedaĵoj, kontraŭ trompa plenumo de ŝtataj mendoj kaj ŝtelo de sekreta ŝtata ekonomia informo en 1952.

Dum la ĉinaj popolaj volontuloj batalis en Koreio kontraŭ la usona imperiismo, Song Fejking rifuzis la ŝtatan mendon de porarmeaj jutsakoj. Poste, nur pro la luktado de la laboristoj, li estis

devigita ĝin akcepti. Sed, Song Fejking trompe plenumis la ŝtatajn mendojn, plipezigante la sakojn per malsekigo kaj akiris profitegon de 1,680,000 juanoj.

Kaj krome, sub la protekto kaj instigo de sia postkulisa mastro, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, Song Fejking veturis al Hongkong por du fojoj. Li metis en sian poŝon la profiton akiritan de la laboristoj per la disvolvado de produkto, aĉetis grandan kvanton da materialoj kaj ilin eksportis enkestiginte, kaj li investis la akiritan monon al la fabriko entreprenata de li en Hongkong. Poste, trompakirinte de la ŝtato grandajn sumojn da pruntedona mono kaj fremda valuto, li fuĝis tra Hongkong al suda Ameriko. Sub la patronado de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, la valoro de la materialoj kaj la kontanta mono de li ŝtelitaj eksterlanden sume atingis pli ol 4,000,000 juanojn.

La vizitado de la ĉina Ĥruŝĉov, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon al la Orientazia Lanŝpinteksa Fabriko en Tiangin, montris, ke li estas agento n-ro unua de la burĝaro en la Partio kaj la ĝenerala postkulisa mastro por la disvolvado de kapitalismo en Ĉinio.

En la 1-a de junio de la pasinta jaro, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone decidis publikigi la unuan en la tuta lando marksism-leninisman dazibaŭ-on, levis la flamegon de la granda proleta kultura revolucio. La revoluciaj laboristoj kaj kadroj de la fabriko aktive respondis la alvokon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, lanĉante fortegan atakon kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Ĉi tiuj ne volas akcepti sian pereon. Freneze praktikante la burĝan reakcian linion elmetitan de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, dum mallongaj kelkaj tagoj ili eĉ verdiktis pli ol tricent personojn kiel "demonojn kaj diablojn", "kontraŭrevoluciulojn" kaj "pseŭdajn maldekstrulojn sed verajn dekstrulojn". Sed, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la vastaj revoluciaj amasoj de la Tria Lanŝpinteksa Fabriko de Tiangin leviĝis por konduki firman batalon kaj akiris venkojn unu post alia, strikte laŭ la strategia aranĝo de Prezidanto Maŭ. Nun, la vastaj revoluciaj amasoj de la fabriko firme decidis profunde kaj ĝisfunde kritiki la ĉinan Ĥruŝĉov en politiko, ideologio kaj teorio, bone fari la batalon, kritikon kaj reformon en la tuta fabriko kaj gajni novan venkon de la granda proleta kultura revolucio.

*La revoluciaj laboristoj skribas dazibaŭ-ojn por malkovri kaj kritiki la krimojn de la ĉina Ĥruŝĉov.*



# Himno al la Milita Penso de Prezidanto Maŭ

## — Pri la Dramo *Batalkanto sur Nokta Maro*



*La maljuna fiŝisto Laŭ-Agong konatigas al la politika direktanto de la kanonboato 878 la terformon.*

LA revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj de la tera, mara kaj aera trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en Pekino sukcese ludis la sesscenan dramon *Batalkanto sur Nokta Maro.* Tiu dramo artisme surscenigis la du kompare grandajn venkojn en mara batalo de nia mararmeo en la lastaj jaroj. Ĝi modlis heroajn figurojn de proletaj revoluciaj batalantoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong kaj ricevis varman aplaŭdon de la vastaj revoluciaj amasoj. Ĝi estas himno prilaŭdanta popolan militon, prezentata de la revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj de la tera, mara kaj aera trupoj kun majesta grandiozeco kaj intensa revolucia patoso, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ: La literaturo kaj arto estas **"kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj".**

### MALGRANDAJ KANONBOATOJ EKSTERMIS GRANDAJN MILITŜIPOJN DE LA MALAMIKO

La ĉefa enhavo de la dramo temas pri la ekstermo de la formacio "34.7" de la usona-ĉianga mararmeo fare de iu gardboata trupo de nia mararmeo.

En la mara armeo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, estas iu heroa gardboata trupo, kiu tage kaj nokte defendas la sanktan marteritorion de la patrolando. En tiu boatotrupo estas kanonboato 878, kiu estas malnova kun personaro malmulta kaj kanonoj malgrandaj, tamen ĝi batalas heroe kaj obstine kaj multfoje faris meritojn en defendo de la patrolanda marteritorio kontraŭ la piratoj de Usono kaj Ĉiang Kajŝek. La malamikoj ne volontas akcepti sian malvenkon sub la senĉesaj pezaj batoj de nia brava mararmeo, kaj fojerefoje ripetas siajn piratajn agadojn. Inter la malamikaj militŝipoj estas la formacio "34.7", kiu estas organizita de la usona imperiismo kaj armita tute per usona ekipaĵo, kaj la ŝipestro de flagŝipo estas trejnita ankaŭ de la usona imperiismo. Tiu formacio inkluzivas la grandajn militŝipojn liveritajn de Usono "Jongĝang" kaj "Giankuj" kun granda tonelnombro, alta rapideco kaj kanonoj grandkalibraj kaj longdistancaj. Ĝi ofte prirabis surmare niajn fiŝboatojn, mortigis niajn senkulpajn fiŝistojn kaj serioze minacas la sekurecon en nia marteritorio. La vasta fiŝistaro delonge malamegas ĝin. La batalantoj de la kanonboato 878, kiuj estas filoj kaj fratoj de la popolo, firme decidis venĝi la vastan fiŝistaron kune kun



*Ding Ĉangbaŭ, la maŝinisto de la kanonboato 878 grave vundita ĉe la kapo, persistas en la batalo ĝis la fina venko.*

frataj ŝipoj kaj ekstermi surmare tiun malamikan formacion "34.7" krimplenan.

La malamikaj militŝipoj kutime entrudiĝis en la marsurfacon ĉirkaŭ nia insulo Daju. La dua taĉmento de nia gardboata trupo ne faris frontan atakon, kiu kondukus nur al longdistanca interbatalo, sed embuskigis niajn kanonboatojn en la mallarĝa markolo Langjazuj de la insulo Daju, kie estas torenta marfluo kaj tre densaj rifoj inter krutaj rokoj, por atendi bonan atakŝancon. En iu nigra nokto, la formacio "34.7" de la malamiko ŝtele alproksimiĝas al nia insulo Daju por fari krimojn. Kiam ĝi eniras en la atakan arenon de nia dua taĉmento, la malamiko tuj renkontas mortan baton fare de niaj unua kaj tria taĉmentoj. Tiuj tuj dronigis la antaŭirantan militŝipon de la malamiko "Jongĝang". Kiam la malamika militŝipo "Giankuj" en konfuziĝo provas returni sin por fuĝi el la malfavora situacio, la heroa dua taĉmento embuskiĝinta en Langjazuj kun la kanonboato 878 kiel ĝia kondukanto tuj elsturmas kvazaŭ surmara tigro, laŭ la naviga vojo montrata de la ruĝaj lanternoj, kiujn alte tenas la daju-aj fiŝistoj Laŭ-Agong kaj aliaj. En unu spiro ĝi jam sin ĵetas proksime al la malamika ŝipo "Giankuj" kaj ĝin subakvigas per intensa kaj koncentrita kanonado. Ankaŭ la komandanto de la flagŝipo de la formacio "34.7" nomata "Fera Batilo", kiu fanfaronis pri "posedo de militarto kaj sennombraj taktikoj kaj manko de rivaloj en multaj bataloj", estas kaptita de la batalantoj de nia kanonboato 878.

## LA PLEJ POTENCA BATALFORTO ESTAS HOMOJ ARMITAJ PER LA PENSO DE MAŬ ZEDONG

De la komenco ĝis la fino la dramo koncentre priskribas la emociajn agojn de la batalantoj de nia kanonboato 878, kiuj responde al la alvoko de kamarado Lin Biaŭ, kreive studis kaj kreive aplikis la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj kondukis la batalon sub la komando de la penso de Maŭ Zedong. Ĝi figure enkorpigis en si la veron montritan de kamarado Lin Biaŭ: "Por niaj trupoj, la plej bona armilo ne estas aviadilo, nek kanono, tanko aŭ atombombo, sed la penso de Maŭ Zedong; kaj la plej potenca batalforto estas homoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong, estas kuraĝo kaj maltimo al morto." Alfrontante la malamikon kun ekipaĵoj pli bonaj ol la siaj, nia gardboata trupo antaŭ ĉio organizis la batalantojn studi la instruojn de Prezidanto Maŭ **"ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj"**, **"strategie ni devas malestimi ĉiujn malamikojn"** kaj aliajn, por ke ĉiuj niaj batalantoj klare konu la aspekte fortan kaj interne sensukan esencon de la malamiko kaj starigu en si firman fidon pri nepra venko. Dum la batalo kontraŭ la malamiko, la batalantoj prenis la instruon de Prezidanto Maŭ kiel ordonon kaj movforton, kriante **"faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon"**, kaj kuraĝe sinĵetis antaŭen.

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **"taktike ni devas trakti ilin (malamikojn) ĉiujn serioze"**, nia gardboata trupo multe cerbumis kaj taktike serioze traktis la for-

# "Batala Kanto sur Nokta Maro"



Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ pri popola milito, la komandanto kaj batalantoj kune projektas planon por ekstermi la malamikon.





Sturmo al la malan...
nokta batalo, sen ...
*maldekstre*)

La armeanoj kaj pop...
de Maŭ Zedong kun...
elirejon ĉe Langja-ri...
militŝipon. (*malsupre*...

Koncentru la klasan ...
kaj solide batu la ...

Kun la nefleksebleco ...
elsendi signalon spit...
*dekstre*)



ika militŝipo por proksima, timo pri vivofero. (*supre-*

polanoj armitaj per la penso unagis unuanime kaj trovis rifo por ataki la malamikan *re-maldekstre*)

malamon al la kanonbuŝo malamikon. (*supre-dekstre*)

de la proletaro ili klopodas ite al danĝeroj. (*malsupre-*









Jubile celebrante la venkon de la surmara batalo, la armeanoj kaj popolanoj varme ĝojkrias: Vivu la venko de la popola milito! Vivu Prezidanto Maŭ!




*La politika direktanto de la kanonboato 878 pretas sursalti la malamikan ŝipon kune kun la batalantoj por kapti la malamikan kapitanon.*

macion "34.7" de la malamiko. Laŭ la militprincipo de flekseb1eco de Prezidanto Maŭ, la trupo ellaboris ĝustan batalplanon por ekstermi la formacion "34.7" koncentrante la opiniojn de la amaso. Por realigi tiun planon, la batalantoj venkis la malfacilojn kaj danĝerojn por detale prisondi Langjazuj kaj tagnokte ekzercis sin por lertiĝi en mara batalado. Dum la batalo ili disvolvis nian bonan tradicion de nokta kaj proksima batalo kaj fine ekstermis la ŝajne potencajn batalŝipojn de la malamiko.

## LA VENKO DE POPOLA MILITO

La dramo evidentigas al la spektantoj ke la venko de tiu mara batalo estis venko de popola milito. Ĝi ne nur priskribas la bravecon kaj lertecon de niaj batalantoj, modlante la heroajn figurojn, kiaj la kuraĝa kaj sagaca politika direktanto de la taĉmento Tie Ĝenhaj, la taĉmentestro Guan Dalong kun profunda klasa sento kaj intima rilato kun batalantoj, la maŝinisto Ding Ĉangbaŭ simila al Maj Hiande kiu persistis en batalo kun grave vundita kapo, la rekruto Deng Demeng, kiu ĉiam tenis en sia memoro la klasan malamon kaj ĵuris repagigi la sangan ŝuldon de la malamiko, la surkaja batalanto-kablisto Ju Leng, kiu ĉiam sopiris partopreni batalon sur ŝipo, la flegistino de la rondira kuractrupo Ĝoŭ Janhua kaj aliaj, sed ankaŭ skulptis la brilajn figurojn de la amaso, kiaj maljuna fiŝisto Laŭ-Agong, Malgranda Adong kaj la surmaraj milicanoj, kiuj senlime fidelis al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj ĝisoste malamis la malamikon. Por tiu surmara batalo, la popolamaso kaj milicanoj vere plenumis la postulojn "ĉiam liveri tuj ĉe bezono tiel homfortojn kiel materialojn", "ĉiam alveni tuj laŭ alvoko kaj esti kapablaj batali kaj venki". Estis ili, kiuj donis helpon en la nokta sondado de Langjazuj, alsendis trinkakvon al la kanonboatoj antaŭ ilia iro al la batalo, montris al ili la navigan vojon per alte tenataj lanternoj por proksime ataki la malamikon, helpis niajn trupojn kolekti militkaptitojn dum la batalo . . . . Estis tiuj soldatoj kaj popolanoj de Prezidanto Maŭ, kiuj formis netrapaseblan surmaran Grandan Muron!

En la finalo de la dramo, la konsterne batita "Fera Batilo", kiu same kiel ĉiuj reakciuloj ne volontis akcepti nek povis kompreni sian mizeran finon, provis demandi pri "sekreta armilo" de nia armeo. Kaj niaj batalantoj, milicanoj kaj la amaso alte levis antaŭ li la ruĝe brilan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kaj per tio plene lin konsternis. En tiu tempo, la politika komisaro de nia gardboata trupo Kong Hianven serioze avertis la usonan imperiismon kaj ĉiujn reakciulojn: La kaŭzo de nia ĉiama venko super rivaloj ne kuŝas en tio, ke ni havas ian "sekretan armilon", sed en tio ke niaj batalantoj kaj nia granda 700-miliona ĉina popolo estas armitaj per la penso de Maŭ Zedong! Se la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj aŭdacos provoki militon, neglektante la forton de la ĉina popolo kaj la revoluciaj popoloj tra la tuta mondo, ili nepre dronos en la maron de popola milito kaj ne povos eskapi de la sorto de kompleta pereo!

# Ĉiam Tenu Firme la Pafilon en la Manoj

HUANG ĈOŬHE (batalheroo kaj meritulo de speciala grado en iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo)

KIAM la proletaro ankoraŭ ne kaptis la ŝtatpotencon, la fokuso de klasbatalo estas la problemo de ŝtatpotenco; kaj sub la proleta diktaturo, la fokuso de klasbatalo estas ankoraŭ la problemo de ŝtatpotenco.

El niaj propraj spertoj ni profunde komprenis la gravecon de la ŝtatpotenco. Havante la ŝtatpotencon, oni havas ĉion; perdinte ĝin, oni perdas ĉion. En la malnova socio, mia familio servis al bienuloj kiel bruto de generacio al generacio kaj vivis kvazaŭ en amara akvo jaro post jaro. La "tri montegoj" de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo sufoke pezegis sur ni malriĉuloj. Kiam la japanaj agresantoj lanĉis grandskalan "balaadon" je la 1-a de majo 1942, la pli ol 300 familioj en nia tuta vilaĝo estis tretitaj de la feraj hufoj de la malamiko, kaj miaj patro, onklo kaj aliaj pli ol 380 senkulpaj vilaĝanoj estis kruele mortigitaj. Al kiu ni malriĉuloj povis plendi kaj kie ni povis trovi savon en tiu tempo? Ĉio ĉi tio estis sekvo de tio, ke la proletaro ne tenis siatempe en la manoj la ŝtatpotencon. **"El la pafilo venas ŝtatpotenco"**, tiu instruo de Prezidanto Maŭ, la plej plej ruĝa suno en nia koro, montris al ni malriĉuloj luman vojon. Nur dank' al ekpreno de la pafilo, frakaso de la malnova mondo kaj kapto de la ŝtatpotenco en la manojn de la proletaro, la laboranta popolo povas havi ĉion. Mi aliĝis al la popola armeo en oktobro 1945 por revolucii sekvante Prezidanton Maŭ. Post longa malfacila batalado sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, la revolucia popolo de nia lando fine kreis per la pafilo la ruĝan, novan Ĉinion de proleta diktaturo. De tiam, la laboranta popolo fariĝis la mastro de sia ŝtato.

La transpreno de la ŝtatpotenco, tamen, estas nur la unua paŝo en longa marŝo de dek mil lioj por la proletaro. Dum la tuta periodo de socialismo, ankoraŭ trairos la batalo de la proletaro por firmigi sian regpotencon kontraŭ la burĝaro, kiu volas uzurpi la regpotencon. La klasaj malamikoj neniam fortiriĝos memvole de la scenejo de historio. **Prezidanto Maŭ diris: "La imperiistoj kaj enlandaj reakciuloj certe ne volonte akceptas sian malvenkon kaj ili ankoraŭ faros sian lastan baraktadon. Post paciĝo de la tuta lando, ili ankoraŭ ĉiamaniere entreprenos sabotadon kaj malordigadon kaj ili ĉiuminute intencos restariĝi en Ĉinio."** Tiu granda vero estas plene pruvita de la historio de klasbatalo dum la 17 jaroj post la Liberiĝo. Tuj post la naskiĝo de nia granda nova Ĉinio, la klasaj malamikoj en- kaj ekster-landaj atakis nin furioze. En 1950, la usona imperiismo freneze lanĉis militon por agresi Koreion, kaj ankaŭ la enlandaj klasaj malamikoj volis ekagi kontraŭ ni. Ili arogante provis strangoli nian landon de proleta diktaturo en ĝia lulilo, kunagante unu de interne kaj la alia de ekstere. La ĉinaj popolaj volontuloj, armitaj per la penso de Maŭ Zedong, kuris al la batalkampo de Koreio por batali kun la korea popolo ŝultro ĉe ŝultro kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝin venkis post trijara batalado. En Panmunĵom de Koreio, mi vidis propraokule la usonajn milit-provokistojn devigite subskribi la Korean Armisticon ĉe la

tablo por intertraktado. La faktoj en la pasintaj pli ol dek jaroj pruvis la akrecon de la klasbatalo. La klasaj malamikoj senĉese atakis nin, provante renversi nian proletan diktaturon por efektivigi la kapitalisman restaŭron. Dank' al la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, ni frakasis iliajn atakojn unu fojon post alia, akiris grandajn venkojn kaj firmigis la proletan diktaturon.

La nuna mondskua granda proleta kultura revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ estas revolucio tuŝanta homan animon kaj granda iniciataĵo en la internacia komunisma movado. El la faktoj de tiu animskua klasbatalo, ni vidis pli klare la longdaŭrecon, komplikecon kaj akrecon de la klasbatalo sub la kondiĉoj de proleta diktaturo, ĝuste kiel diris Prezidanto Maŭ: **"Tiuj reprezentantaj personoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion, la registaron, la armeon kaj diversajn kulturajn rondojn, estas aro da kontraŭrevoluciaj reviziistoj; tuj kiam la kondiĉoj estos maturaj, ili kaptos la regpotencon kaj turnos la diktaturon de la proletaro en la diktaturon de la burĝaro."** La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon estas ĝuste la plej danĝera malamiko, kiu enŝteliĝis en nian hepaton. Dum longa tempo, li oponis la ruĝan flagon flirtigante "ruĝan flagon", li staris kontraŭ la proleta diktaturo kaj vane provis restarigi kapitalismon. Ĝuste estis tiu ĉi ĉina Ĥruŝĉov, kiu en la komenca periodo post la tutlanda liberiĝo kriaĉis reakcie kaj absurde ke en Ĉinio "ne estas tro multe sed tro malmulte da kapitalismo", ke "ekspluatado havas siajn meritojn" kaj ke "ribelo estas krimo", kaj plenenergie disvolvis kapitalismon. Post la ĝenerala plenumiĝo de la socialisma transformo de nia lando, li aktive propagandis pri la teorio de "estingiĝo de klasbatalo". En 1962, ĝuste kiam iris ekstreme akre la klasbatalo en- kaj ekster-lande, li freneze distrumpetis pri la "tri paciĝoj kaj unu malmulto" en eksteraj rilatoj kaj pri "la plivastigo de parceloj por privata uzo kaj de liberaj merkatoj, la pliigo de etaj entreprenoj mem respondecaj pri la propraj profitoj aŭ perdoj, kaj la fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado" kaj republikigis la venenan herbegon *Memkulturo*, en kiu li menciis nenion pri la aktuala klasbatalo kaj la proleta diktaturo. Tio celis ke ni forgesu klasbatalon en la socialisma socio kaj la proletan diktaturon kaj okupiĝu pri "memkulturo" por ke li povu ŝanĝi la proletan diktaturon en la burĝan diktaturon. Kia venena lupa koro!

*La komandantoj kaj batalantoj de la "Heroa Eskadrono de la Aerarmeo" firme plenumas la grandan politikon de Prezidanto Maŭ teni la revolucion kaj stimuli la batalpretecon, gardante sian batalpostenon.*



Nun, la ĉina Ĥruŝĉov kaj lia kompanio estas eltrenitaj de ni revolucia popolo. Tio estas brila venko de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong.

Nia Ĉina Popola Liberiga Armeo estas fondita persone de la granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ kaj rekte gvidata de nia vicĉefkomandanto Lin Biaŭ. Ĝi estas la plej ĉefa batalilo kaj la plej solida bazŝtono de la proleta diktaturo kaj forta apogilo de la granda proleta kultura revolucio. Sen ĝi ne ekzistus la proleta diktaturo. En la pasinteco, ni militiris de la nordo ĝis la sudo tra la tuta lando kaj albatalis la regpotencon de la popolo per pafiloj; hodiaŭ, ni uzos pafilojn por gardi la grandan kulturan revolucion kaj firmigi la proletan diktaturon. Ni devas gravuri en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ: **"La problemo 'kiu venkos kiun' en la revolucio povos esti solvita nur en tre longa historia periodo. Kaj ĉiam eblas la restariĝo de kapitalismo, se aferoj ne estas ĝuste traktataj. Ĉiuj partianoj kaj la tutlanda popolo ne opiniu ke ĉio jam estos en ordo post unu aŭ du, tri aŭ kvar grandaj kulturaj revolucioj. Nepre estu atentemaj kaj neniel perdu singardemon kaj viglecon."** La nuna granda proleta kultura revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ estas granda kampanjo de ĝenerala ofensivo kontraŭ la plej danĝeraj malamikoj de proleta diktaturo, en kiu estas mobilizita centmiliona revolucia popolo. Tiajn grandajn kampanjojn ni ankoraŭ faros en la estonteco. Nur tiel ni povos senĉese elfosi la prokrastajn bombojn metitajn en nia partio kaj firmigi la proletan diktaturon.

Ni revoluciaj batalantoj plej varme kaj plej firme respondas la alvokon de la Centra Komitato de nia partio kaj ĉiam fidelas al Prezidanto Maŭ, al la Partio kaj al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Ni nepre pli bone kreive studos kaj kreive aplikos la verkojn de Prezidanto Maŭ. Firme tenante la revolucian pafilon, ni estas ĉiam pretaj ekstermi ĉiujn malamikojn, kiuj aŭdacos nin ataki; kaj ni ekprenos la revolucian plumon por ĝisfunde kritiki la plej grandan enpartian potencteananton, kiu iras la kapitalisman vojon, ĝis li estos faligita kaj senkreditigita politike, ideologie kaj teorie. Ni devas nepre teni pli alte la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj ĝismorte defendi la proletan diktaturon por ke nia lando neniam ŝanĝu sian koloron dum la venontaj miloj da generacioj.


*Plenumante la taskon subteni la maldekstrulojn, la PLA-ano aktive helpas la junajn revoluciulinojn studi verkon de Prezidanto Maŭ.*





*Trupo de PLA garnizonanta sur Kinghaj-stepo indigne kondamnas la krimegojn de la ĉina Ĥruŝĉov.*

*La popolaj mararmeanoj, kiuj gardas nian mardefendon, estas ĉiam batalpretaj por doni batojn al la malamikoj, kiuj aŭdacos agresi nian teritorion.*



# La Fajrego de la Aŭtunrikolta Leviĝo Brulu tra la Tuta Mondo

— Notoj pri kunsido de reprezentantoj de ok ruĝarmeaj rotoj de trupoj garnizonantaj en Kantono

LA 8-a de septembro, ĉijare, estis la 40-a datreveno de la Aŭtunrikolta Leviĝo persone gvidata de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. En tiu festotago kun granda historia signifo, kunsidis reprezentantoj de ok ruĝarmeaj rotoj el trupoj garnizonantaj en Kantono. Rememorante la batalan historion de siaj rotoj, ili sate babilis siajn rikoltojn en lernado de la granda doktrino de Prezidanto Maŭ pri armita kapto de ŝtatpotenco kaj lia granda penso pri popola milito kaj popola armeo.

### VOJO GLORA KAJ VENKA

Jang Daĝang, politika vicdirektanto de la Dua Ruĝa Ŝtala Roto diris: Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"Ĉiuj revoluciaj bataloj en la mondo estas por depreni ŝtatpotencon kaj ĝin firmigi."** Koncerne al la problemoj ĉu kapti aŭ ne ŝtatpotencon kaj kiel kapti ŝtatpotencon ekzistas batalo inter du linioj en nia partio de longa tempo: unu estas la proleta revolucia linio reprezentata de Prezidanto Maŭ kaj alia — reakcia burĝa linio reprezentata de Ĉen Duhiu, Vang Ming kaj la ĉina Ĥruŝĉov kaj similaj.

Antaŭ 40 jaroj, Ĉen Duhiu oponis kontraŭ la ĝusta linio de Prezidanto Maŭ per sia oportunismo, forlasis armitan batalon, transdonis la popolajn armitajn fortojn al la malamiko kaj tiel fiaskigis la ŝtorme potencan revolucion. En tiu kriza momento de la revolucio, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ per granda kuraĝo de la proleta revoluciisto kaj propramane ekbruligis la fajregon de armita batalo surbaze de la kamparana movado de Hunan-provinco, gvidis la Aŭtunrikoltan Leviĝon kun granda historia signifo, fondis la bazlokon de Ginggang-monto kaj kreis nian popolan armeon unikan en la mondo.

Tiam nia Dua Ruĝa Roto suriris Ginggang-monton ĝuste sub la gvido de kamarado Lin Biaŭ. Sur la majesta Ginggang-monto, la trupoj rapide kreskis kaj potenciĝis sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong kaj profundiĝis en la kamparon por mobilizi kamparanojn al armita batalo. Post tio, ĉu en la mondfama Longa Marŝo kaj la fajrego de la Kontraŭjapana Rezistmilito, ĉu en la decida milito por entombigi "Ĉiang-dinastion", ni kune kun frataj trupoj faris longtempan armitan batalon, firme sekvante Prezidanton Maŭ. Ni bataliris de la Nordoriento ĝis Hajnan-insulo kaj finfine starigis la triumfan flagon sur la Kvinfingra Montaro.

Rememorante la trapasitan vojon, ni profunde komprenis, ke la vojo malfermita de Prezidanto Maŭ de la Aŭtunrikolta Leviĝo ĝis la marŝo al Ginggang-monto, la vojo sieĝi la urbojn per la kamparo kaj kapti ŝtatpotencon per armitaj fortoj, estas vojo glora kaj venka. Ĝi estas ne nur la unika ĝusta vojo por la ĉina revolucio, sed ankaŭ liberiga vojo por la proletaro kaj revolucia popolo de la tuta mondo.

Politika vicdirektanto de la Unua Heroa Ruĝa Roto Ĝu Ginhaj diris: La proleta revolucio

devas iri la vojon kapti ŝtatpotencon per armitaj fortoj. Kiel oni povas venke marŝi sur tiu ĉi vojo? Prezidanto Maŭ montris al la tuta Partio: La avangardo de la proletaro devas profundiĝi en la kamparon, mobilizi, organizi kaj armi la kamparanojn, sin apogante sur ili starigi kamparajn bazlokojn, efektivigi la sieĝon de urboj per la kamparo kaj fine kapti la ŝtatpotencon de la tuta lando. Tio ĉi estas vojo neniam irita de la antaŭuloj kaj granda disvolvo de marksism-leninismo farita de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ ne nur korekte solvis tiun ĉi problemon en teorio, sed ankaŭ montris brilan ekzemplon en praktiko por la revolucia popolo de la mondo.

Prezidanto Maŭ persone gvidis la Aŭtunrikoltan Leviĝon kaj la marŝon al Ginggang-monto kaj starigis la unuan ruĝan bazlokon. Nia roto naskiĝis ĝuste sub la direktado de la ĝusta linio de Prezidanto Maŭ. Antaŭe nia roto estis kamparana gerila taĉmento gvidata de la Komunista Partio en Hinguo, Gianghi-provinco, kaj ĝi estis organizita en la Ruĝan Armeon en 1929. Poste, ĉiam sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ, ĝi mobilizis amasojn, faligis tiranajn bienulojn, distribuis terojn kaj starigis revoluciajn bazlokojn ĉie kien ĝi atingis, kaj pro tio ricevis varman subtenon de la popolamasoj. Iufoje, nia roto mobilizis amasojn en iu loko por faligi tiranajn bienulojn, kaj iu malriĉa kamparano ricevis pelvon. Li tre domaĝis ĝin uzi, sed li donis ĝin al nia roto kiel memorigaĵon kaj per tio esprimis sian profundan amon kaj koran subtenon al siaj soldatoj. Poste, kiam nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ vizitis nian roton, kamaradoj de la kuirista grupo uzis tiun pelvon por alporti legomaĵon al Prezidanto Maŭ. Por memorigi la gloran historion kaj firme plenumi la instrukcion de Prezidanto Maŭ starigi revoluciajn bazlokojn, ni nomis ĝin "ruĝa pelvo". Kunportante la "ruĝan pelvon", nia roto marŝis, firme sekvante la grandan ĉefkomandanton Prezidanto Maŭ, de Ginggang-monto ĝis norda Ŝenhi-provinco kaj de Songhua-rivero ĝis Hajnan-insulo. Kaj ni mobilizis, organizis kaj armis la amasojn ĉie kien ni atingis. Tiel la "ruĝa pelvo" fariĝis la trezora heredaĵo de nia roto. Ni ĉiam sekvos Prezidanton Maŭ kaj revolucios ĝis la fino laŭ la vojo montrita de li.

## KONSTRUADO DE LA POPOLA ARMEO PER LA PENSO DE PREZIDANTO MAŬ

Jang Daĝang, politika vicdirektanto de la Dua Ruĝa Ŝtala Roto, diris: Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"Sen popola armeo la popolo havas nenion."** La popola armeo estas la vivradiko de la popolo kaj la fundamenta garantio por la venko de la revolucio. Nur dank' al ĝi oni povas kapti ŝtatpotencon kaj ĝin firmigi. La historia sperto de nia armeo akirita dum la kvardek jaroj de la Aŭtunrikolta Leviĝo ĝis nun pruvis, ke por ke tiu ĉi popola armeo fariĝu potenca armilo de la proletaro por kapti kaj firmigi ŝtatpotencon, oni nepre devas firme sekvi la armekonstruan linion difinitan de Prezidanto Maŭ en la Aŭtunrikolta Leviĝo kaj armi nian armeon per la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong.

Nia roto estis roto de la malnova Ruĝa Armeo persone elkulturita de vicprezidanto Lin Biaŭ per la penso de Maŭ Zedong. Tiel frue kiel en 1928, Prezidanto Maŭ jam sendis al nia roto partian reprezentanton, starigis partian ĉelon, organizis la komitaton de soldatoj kaj irigis en ĝi konstantan politik-ideologian laboron. Baldaŭ post la kuniĝo de trupoj de la Ruĝa Armeo, iun matenon post pluvo Prezidanto Maŭ en akompano de kamarado Lin Biaŭ persone inspektis nian roton. Li estis tre kontenta pri tio, ke nia roto modele observas "la tri ĉefajn regulojn de disciplino kaj la ses punktojn de atentigo", kaj instrukciis al la partia reprezentanto: Por konstruado de armeo oni devas unue starigi partion kaj bone zorgi pri akcepto de novaj partianoj. Tial nia roto estis metita sub la absoluta gvido de la Partio. Post tio, en la longa batalado nia roto ĉiam sekvis la instrukcion de Prezidanto Maŭ kaj marŝis antaŭen laŭ lia armekonstrua linio kaj gajnis venkojn unun post alia. En la Longa Marŝo, nia roto kiel akra tranĉilo ĉiam batalis sur plej antaŭaj frontoj kaj foje piediris 240 liojn en unu tago. Sub la gvido de rotestro Liaŭ Daĝu, 22 bravuloj brave sturmis tra pluvo de kugloj trans la ferĉenan ponton kaj fine okupis la pasejon Luding-ponto. Al kio dankis la venko de tiu batalo? Al la elstarigo de la proleta politiko kaj la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong.

El sennombraj faktoj ni profunde komprenis: **Politiko estas la komandanto, animo** kaj vivlinio de ĉiuj laboroj de nia armeo. Nur se ni apogas nin sur politiko kaj la penso de Maŭ Zedong en konstruado de la armeo kaj batalo, ni ne malvenkos en ĉia ajn cirkonstanco. Alie, se ni forgesus politikon kaj la penson de Maŭ Zedong, nia armeo perdus la direkton, farus erarojn kaj eĉ ŝanĝus sian koloron.

Subplotonestro de la Kvina Ruĝa Roto, marotransnaĝa heroo Su Fujuan kaj vicrotestro de la Heroa Unua Ruĝa Roto Long Hajjun diris: La ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj Peng Dehuaj kaj Luo Ĵujking ĉiam oponas Prezidanton Maŭ, oponas la penson de Maŭ Zedong kaj la arme-



*La Aŭtunrikolta Leviĝo — granda iniciato en la historio de la proleta revolucio*

konstruan linion de Prezidanto Maŭ. Sub la masko de la tiel nomata "reguligo" kaj "modernigo", la malnova kontraŭrevolucia reviziisto Peng Dehuaj kolportis reviziismajn varojn el eksterlando, intencis aboli la absolutan gvidantecon de la Partio super la armeo, likvidi la politikan laboron en la armeo kaj konduki nian armeon sur la vojon de burĝa armeo por efektivigi sian intrigon uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la armeo. Alia kontraŭrevolucia reviziisto Luo Ĵujking agis same kiel Peng Dehuaj, freneze oponis la penson de Maŭ Zedong, oponis la "kvar unua-ojn" kaj instrukcion pri elstarigo de politiko elmetitajn de vicprezidanto Lin Biaŭ kaj obstine disvastigis burĝan kontraŭrevolucian reviziisman linion de militaj aferoj. Li organizis la tiel nomatan "grandan konkurson pri batalarto", intencante forpuŝi per ĝi la proletan politikon, ŝanĝi la naturon de nia armeo kaj fine realigi la intrigon uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la armeo. En tiu tempo la vastaj amasoj de kadroj kaj soldatoj elmetis la proponon firme teni kaj disvolvi la gloran tradicion de la malnovaj ruĝarmeaj rotoj. Iuj diris: "Kial oni bezonas denove emfazi la malnovajn ruĝarmeajn rotojn! Tio jam sufiĉas, nur se la trupoj kapablas militi!" Tio estis nenio alia ol la absurdaĵo kritikita de Prezidanto Maŭ en la rezolucio de Gutian-Konferenco, ke la tasko



de la Ruĝa Armeo estas nur militi. Post serioza lernado de la rezolucio de Gutian-Konferenco ellaborita de Prezidanto Maŭ kaj la instrukcio de vicprezidanto Lin Biaŭ pri elstarigo de politiko, nia roto rememoris nian gloran tradicion de konstruado de la armeo kaj militado dank' al politiko, likvidis la fiinfluon de la erara vidpunkto pri simple militaj aferoj kaj forte potencigis la revoluciigon kaj batalspiritizon de la roto.


En la pasinteco, ni sukcesis batali tra la ventegoj kaj ondegoj de la milito, sekvante grandan ĉefkomandanton Prezidanto Maŭ. Hodiaŭ granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris grandan alvokon al ni plenumi la gloran taskon "subteni industrion, subteni agrokulturon kaj subteni la revoluciajn maldekstrulojn", kaj "konduki militan kontrolon kaj militan trejnadon", lerni la arton de klasa batalo en la ventegoj kaj ondegoj de la klasa batalo, ricevi revolucian hardadon en la nova batalo kaj ekzamenon de la vastaj revoluciaj amasoj. Tio ĉi estas ekzameno sen formalaĵoj kaj samtempe estas plej granda prizorgo de Prezidanto Maŭ al ni. Ni nepre ne vanigos maldankeme la esperon de Prezidanto Maŭ kaj la popolo de la tuta lando, ni unuiĝos kun la proletaj revoluciuloj de la tuta lando, kaj batalos kaj venkos kune kun ili. Kun plena revolucia entuziasmo ni ĝisfunde kritikos la plenmanon da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, ilin faligos kaj senkreditigos, komplete frakasos la komandejon de la burĝaro kaj kondukos la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino, por ke nia granda patrio kaj nia granda armeo ĉiam retenu sian brile ruĝan koloron.

## LA FAJRO DE LA AŬTUNRIKOLTA LEVIĜO BRULU TRA LA TUTA MONDO

En la kunsido, konsiderante la bonegan situacion de la nuna monda revolucio, la reprezentantoj diris kun emocio: La fajrego de la Aŭtunrikolta Leviĝo brulas nun tra la tuta mondo kaj la senlime brila penso de Maŭ Zedong lumigas nun la tutan mondon.

Plotonestro de la Naŭa Ruĝa Sturma Roto Jang Diĵuj, kuracista helpanto de la Modela Ruĝa Higiena Grupo Ĝang Kedi, politika vicdirektanto de la Dua Ruĝa Roto Ĝang Minhaj kaj politika vicdirektanto de la Tria Ruĝa Roto Luo Ŝihjun kaj aliaj kamaradoj diris: Dum la batalperiodo de Ginggang-monto, la revoluciaj fortoj estis tre malgrandaj kaj la bataloj estis malfacilegaj, sed nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ genie montris kun plena fido: **"Fajrero povas forbruligi stepon"**. La saĝa antaŭvido de Prezidanto Maŭ jam fariĝis granda realaĵo. La fajrego de la Aŭtunrikolta Leviĝo, kiu jam brulis tra la tuta Ĉinio, nun brulas tra la tuta mondo. La revoluciaj popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko pli kaj pli klare komprenas: Por rompi la katenon de imperiismo kaj la enlandaj reakciuloj kaj gajni plenan liberiĝon, la subpremataj nacioj kaj popoloj devas iri la vojon de la ĉina revolucio, t. e., la vojon sieĝi la urbojn per la kamparo kaj kapti ŝtatpotencon per armitaj fortoj. Nun la revoluciaj popoloj de pli kaj pli multe da landoj kaj regionoj jam ekprenis pafilojn kaj suriris la vojon de armita batalo. Ĝuste kiel vicprezidanto Lin Biaŭ diris en sia artikolo *Vivu la Venko de Popola Milito:* "En konsidero de la mondo kiel tuto, se Norda Ameriko kaj Okcidenta Eŭropo povas esti nomataj 'la urboj de la mondo', tiam Azio, Afriko kaj Latinameriko estas 'la kamparo de la mondo'." Nun, sub la giganta influo de la granda proleta kultura revolucio de nia lando, kaj alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la revolucia popolo de tiu "kamparo de la mondo" disvolvas potencan atakon kontraŭ "la urboj de la mondo" estrataj de la usona imperiismo, kaj la "fajrero" de armita batalo nepre brulos tra la tuta mondo, la malnova mondo estos entombigita kaj la nova mondo estos konstruita.

Reprezentantoj diris krome: en la nuna revolucia situacio de la mondo la tasko alfrontata de nia armeo estas ankoraŭ pli peza kaj malfacila. En la pasinteco niaj revoluciaj antaŭuloj marŝis antaŭen sekvante Prezidanton Maŭ tra ventegoj kaj ondegoj de la revolucia milito kaj disvastigis la fajron de la Aŭtunrikolta Leviĝo tra la tuta Ĉinio. Hodiaŭ, ni marŝas antaŭen sekvante Prezidanton Maŭ tra la ventegoj kaj ondegoj de klasa batalo. Ni nepre faros novajn meritplenajn kontribuojn al la revolucio de Ĉinio kaj de la mondo, heredante kaj disvolvante la gloran tradicion de la Aŭtunrikolta Leviĝo kaj la batalo de Ginggang-monto.




popola armeo, tiu granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong, kiuj ebligis al li la rapidan maturiĝon. Li havas senliman amon, kredon, adoron kaj fidelecon al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Li estas la plej firma sekvanto, plej fervora propagandanto kaj plej fidela defendanto de la proleta revolucia linio reprezentata de Prezidanto Maŭ. Foje, en la kriza momento, kiam iu kureganta pasaĝera vagonaro alfrontis la danĝeron de elreliĝo kaj renversiĝo, li sentime elsaltis spite al la vivdanĝero, savis la vivojn de ministoj kaj ruĝaj gvardianoj en la vagonaro kaj defendis la grandan proletan kulturan revolucion kaj la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ, kaj tiel komponis grandiozan triumfan kanton per la senfine brilanta penso de Maŭ Zedong. La amaso nomas lin "vivanta Oŭjang Haj" kaj "vivanta Caj Jonghiang".

## NOVA BATALAMIKO

En marto de 1966, aro da rekrutoj venis al la en Ŝanhi garnizonanta 10-a roto de iu inĝeniera regimento de la Departemento de Ĝenerala Postfronta Servo de PLA. Inter ili estis junulo el Anhuj, kiun oni sendis al la 6-a subplotono. Li estis Nian Sivang.

Post lia ripozo de ĉ. unu horo en la roto-sidejo, la 6-a subplotono jam aranĝis kunsidon por bonvenigi sian novan batalamikon. Montrante lin al la kunsidantoj la subplotona estro diris: "Ĉi tiu estas kamarado Nian Sivang. Li devenas de malriĉkamparana familio kaj vizitis dum du jaroj malsuperan mezlernejon."

Ĉiuj lin akceptis varme per manklakado kaj petis lin paroli.

DUM la senprecedenca, granda proleta kultura revolucio, senĉese aperas en la Ĉina Popola Liberiga Armeo novaj herooj, kiuj estas bonaj batalantoj de Prezidanto Maŭ, modeloj en la kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ, pioniroj de la socialisma revolucio kaj herooj de la proletaro. Kamarado Nian Sivang estas unu el tiuj novaj herooj.

Kamarado Nian aliĝis al la armeo nur iom pli ol unu jaron. Estas la granda proleta kultura revolucio kaj la

Nian Sivang diris: "Unue ni legu kune la verkon *Servu al la Popolo*, ĉu bone?"

"Bone! Bone!" diris la kamaradoj, elprenante la libron *Elektitaj Legaĵoj el Verkoj de Maŭ Zedong*. La nova kaj malnovaj kamaradoj ĉiuj voĉlegis kune la artikolon.

Post tio, Nian Sivang daŭrigis: "Prezidanto Maŭ instruas al ni: **'Ni alvenis el plej diversaj anguloj de nia**

lando kaj kolektiĝis kune por komuna revolucia celo.' Jen, mi estas el Anhuj, kaj vi kamaradoj iuj el Henan kaj aliaj el Ŝanhi, estas vere ke ni kolektiĝis kune por komuna revolucia celo. De nun ni studu kune la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultu liajn instruojn, agu laŭ liaj instrukcioj kaj estu liaj bonaj batalantoj."

Tiuj nemultaj vortoj iris en la korojn de la kamaradoj, ĉiuj havis la saman opinion ke ĉi tiu nova batalamiko ja starigas la politikon en la unua loko kaj estas tre simpla kaj rektparola.

"Prave diris kamarado Nian Sivang, ni nepre devas bone organizi la studadon de la verkoj de Prezidanto Maŭ," diris la subplotona estro. "Nun la nova kaj malnovaj kamaradoj ĉiuj estas ĉi tie, ni elektu iun kiel estron de nia studrondo."

"Lin ni elektu!" tuj proponis ĉiuj unuvoĉe, montrante Nian Sivang.

"Bone, Nian Sivang nun estas la estro de nia studrondo," diris la subplotona estro.

La afero estis tiel decidita.

Ĉu tio ne estis tro senpripensa ke la kamaradoj de la subplotono elektis novan batalamikon kiel la estron de studrondo?

Ne, tute ĝusta estis ilia elekto! Vidu:

Unu tutan monaton Nian Sivang portis ŝtonojn tuj post lia veno al la roto. En la konstruejo, li tuj suprenfaldis siajn manikojn, alprenis vekton kaj en grandaj paŝoj ĵetis sin al la torento de laboro. Plej multe kaj plej gaje li vektoportis.



*K-do Nian Sivang*

La politika direktanto faris kelkajn rapidajn paŝojn, kaj atinginte lin li diris kun rideto: "Vere fortajn krurojn vi havas, malgranda Nian, mi ne povis vin atingi postkurante. Ĉu vi ne sentas lacon?"

"Ne!" estis la respondo de Nian Sivang.

Tiamaniere li transportis ŝtonojn dum unu monato.

Post nelonge, la roto prenis sur sin alian pli streĉan taskon de transportado de asfaltitaj ŝpaloj. Asfalto mordas la haŭton, kvankam oni alprenis protektan rimedon, tamen estis ne eble tute eviti la mordon. Sen brovkunŝovo kaj suspiro, Nian Sivang flugrapide transportis ŝpalojn oleece asfaltitajn. Kiam la aliaj portis ĉiufoje du ŝpalojn, li metis jam la trian sur la ŝultron.

Dank' al sia arda fervoro kaj feraj ŝultroj, li kuradis pene kaj rapide tri tagojn, el la tuta roto li portis plej multe da ŝpaloj. En la kvara tago, kiam li venis al la konstruejo, li sentis doloron ĉe la vangoj, nuko kaj ŝultroj, kaj mankis al li forto. Kaj eklevinte sian kapon li vidis monton da ŝpaloj antaŭ si. "Terure!" Ekflagris en lia kapo iu penso.

"Hardado bezonas ankaŭ tempon!... porti ŝpalojn ne estas milito. Ne gravas iom malrapidi." Jen la parolon havas la "mio" en la animo! Li iom ekvilibrigis al si la animon kaj senindulge kaptis tiun sian penson en flagro. Nu kio flagris en la cerbo? Nian Sivang mem al si respondis: "Tio estas timo de laco, doloro kaj malfaciloj! En analizo ĝis la fino, tio estas leviĝo de 'mio'! Estas necese uzi la 'tri malnovajn artikolojn' kiel armilon por decideme subpremi tiun 'mion'!"

Fronte al amasego da ŝpaloj, Nian Sivang havis antaŭ siaj mensaj okuloj la figuron de Ĝang Side, kiu faras lignokarbon en malnova arbaro de profunda montaro, kaj la peĉonigraj ŝpaloj ja vere similas al lignokarbo! Jen aperis antaŭ li alia figuro, la Malsaĝa Avo, kiu **"daŭre fosadas la montojn ĉiutage sen iometa ŝanceliĝo".** Ĉi tiu amasego da ŝpaloj estas nur malgranda monteto kompare kun la montegoj kiujn la Malsaĝa Avo intencis translokigi. Prezidanto Maŭ instruas: **"Bona kamarado estas tiu, kiu pli deziras iri tien, kie la malfaciloj estas pli grandaj."** Batalanto de Prezidanto Maŭ devas esti plej firma, plej kuraĝa kaj plej sentima antaŭ malfaciloj. Kiel Prezidanto Maŭ instrukcias, tiel mi agas! Tiam li ekkantis laŭte kantojn kun la tekstoj el vortoj de Prezidanto Maŭ, surŝultrigis ŝpalojn kaj ree kuretis rapide.

La vicestro de la subplotono Sun Hiĵen elkore domaĝis lin kaj volis sendi lin al pli malpeza laboro por ke

li iom faciligu sian spiradon. Al sia vicestro Nian Sivang diris: "Portado de ŝpaloj estas batalo kaj defendo al la granda proleta kultura revolucio; de tio oni ne devas retiriĝi. Ĵus ankaŭ mi pensis pri paŭzo. Tio estas nenio alia ol leviĝo de 'mio'. Batalo kontraŭ 'mio' estas ankaŭ revoluciigo de la ideologio, lasu min solide hardiĝi!"

Dum plenumado de ĉi tiu tasko, Nian Sivang studis kaj aplikis kreive verkojn de Prezidanto Maŭ, li estis hardita, kaj lia politika konscio multe leviĝis. En sia taglibro li skribis: "Mi sentas ke mi ne povas forlasi la verkojn de Prezidanto Maŭ eĉ dum momento."

Ĉiuj kamaradoj de la 6-a subplotono multe ĝojis pro tio ke ili havas tian estron por sia studrondo de la verkoj de Prezidanto Maŭ.

## GARDOSTARANTO DE LA GRANDA KULTURA REVOLUCIO

Nian Sivang armeaniĝis ĝuste kiam la granda proleta kultura revolucio progresis en alta intenseco.

Li tre zorgis pri gravaj ŝtataj aferoj kaj atente observis la elvolviĝon de la kultura revolucio. Li opiniis ke li devas en ĉiu momento, per ĉiu vorto kaj ĉiu ago, defendi la proletan revolucian linion, kiun Prezidanto Maŭ reprezentas.

En sia taglibro li skribis jenajn vortojn el sia korfundo:

*Ne forgesu, Sivang! Ne forgesu, Sivang!*
*Ne forgesu la suferojn de la klaso en la pasinteco;*
*Ne forgesu la feliĉon de libero en la nuna tempo.*
*Firme tenu vi por ĉiam la pafilon en la mano;*
*Kaj neniam ĉesu sekvi Prezidanton Maŭ en la revolucio!*

En tiuj tagoj, ripetade li rememoris la mizerplenan historion de sia familio. Lia familio estas de malriĉa kamparano jam de generacioj, havanta loĝejon ĉe la rivero Huajhe. La avo mortis sub la skurĝo de bienulo, la patro ricevis vundojn sur sia tuta korpo donitajn de kuomintangaj soldatoj, kaj la fratino vagis por almozpetado en la aĝo de naŭ jaroj kun trijara Sivang. ... En profunda nokto, reveninte de gardostarado, Nian Sivang sidiĝis ĉe tablon en la manĝejo kaj eltiris la plumon por skribadi. La granda klasa malamo torente elverŝiĝis el lia plumpinto. En la kunveno por kondamni la nigran bandon de kontraŭrevoluciaj reviziistoj kaj sur la nigratabula gazeto aŭdiĝis la indigna voĉo de Nian Sivang.

Nian Sivang senlime amas Prezidanton Maŭ kaj estas ĉiam fidela al la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Li decidis fariĝi bona gardisto por defendi la grandan proletan kulturan revolucion kaj Prezidanton Maŭ.

Estis vintra nokto trans la Granda Muro, kie dancis en la aero neĝoflokoj kaj ruliĝis fluoj de frosto. La temperaturo jam falis ĝis tridek gradoj sub nulo. Gardostarante, Nian Sivang firme tenis sian pafilon en la manoj, al kiuj li ne surmetis gantojn. Li eĉ ne ŝirmis la orelojn per la klapoj de la kapvesto kaj kun viglaj okuloj observis ĉion en la ĉirkaŭo.

La politika direktanto venis al lia gardostarejo en inspekta rondirado kaj zorgeme lin demandis:

"Vi ne portas gantojn kaj eĉ ne mallevis la orelŝirmilojn en tia frosta vetero?"

Nian Sivang donis la jenan respondon:

"La granda proleta kultura revolucio eniris la stadion de alta tajdo, kaj la klasbatalo treege akriĝas. Prezidanto Maŭ instruas al ni: **'La imperiistoj kaj enlandaj reakciuloj certe ne volonte akceptas sian malvenkon kaj ili ankoraŭ faros sian lastan baraktadon.'** En ĉiu momento ni devas vigligi nian gardemon. Ne estas por mi facile ion fari kun la manoj en gantoj kaj klare aŭdi per la oreloj ŝirmitaj."

Tiamaniere Nian Sivang defendis la grandan proletan kulturan revolucion, kiun Prezidanto Maŭ persone iniciatis kaj gvidas.

## STURMU POR DEFENDI LA REVOLUCIAN LINION DE PREZIDANTO MAŬ

Kiam la novjaro de 1967 alproksimiĝis, Nian Sivang kaj kvin el liaj batalamikoj estis portempe senditaj al la gvida instanco por helpi la faradon de tabuloj kun vortoj de Prezidanto Maŭ. Akceptinte la taskon, Nian Sivang tre ĝojis kaj diris al siaj kamaradoj: "Tio ĉi ja estas la plej glora tasko, tasko de propagando de la penso de Maŭ Zedong, kaj ni nepre devas ĝin plenumi bone kaj rapide!" Kiam ili atingis la sidejon de la instanco, ĉiuj decidis post interkonsiliĝo, ke ili finos la laboron antaŭ la novjara tago de 1967. Nian Sivang voĉlegis por la kamaradoj la jenajn vortojn de Prezidanto Maŭ: **"Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon."** Ĉiuj havis altan entuziasmon kaj laboris dum la tuta nokto por purigi la ruston sur la ferladoj spite al la intensa malvarmo.

La sekvintan tagon, Nian Sivang diris al siaj batalamikoj: "Baldaŭ venos la novjara tago, la tasko de ŝpruclakado estas iom peza, kaj por venki malfacilojn, ni devas orienti nin per la penso de Maŭ Zedong!" Ĉiuj kamaradoj respondis: "En la studrondo vi estas la estro, do vi organizu la lernadon!"

Tiel, Nian Sivang organizis la lernadon de *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo* por firmigi la decidemon de la kamaradoj en la plenumado de la tasko. Estis en frosta decembro, al ili doloris la fingroj pro manko de hejtado en la laborloko. Dum la ŝpruclakado, la odoro de "bananakvo"* kaj lakaĵo pikis la nazojn, sed Nian Sivang daŭre laboris senlace kelkajn horojn eĉ sen kunŝovo de la brovoj kaj ia plendo pri la malvarmo. Per sia tuta koro li estis absorbita en la laboro, kiun li volis fari plej bone por ke la kamaradoj povu legi pli frue la instrukciojn de Prezidanto Maŭ.

Kiam oni devis allaki la vortojn sur la ferladojn, Nian Sivang ripetade atentigis: "Tio estas la vortoj de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj ilin legos ĉiu-



*En kunsido pri kreiva studo kaj kreiva apliko de la "tri malnovaj artikoloj", k-do Nian Sivang parolas pri siaj atingoj en intensa batalo kontraŭ egoismo per kreiva studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ.*

tage multnombra amaso. Ni nepre ne devas fari erarojn aŭ preterlasojn, eĉ komon ni devas meti en la ĝusta loko." Tion dirinte li legis kune kun la aliaj la vortojn de Prezidanto Maŭ: **"Kio vere gravas en la mondo estas la vorto 'seriozeco', kaj la Komunista Partio plej taksas 'seriozecon'."** Al ĉiu eldiro allakota, Nian Sivang ripetade kontrolis kaj legis vorton post vorto kaj frazon post frazo. Lia senlima amo kaj senegala fideleco al Prezidanto Maŭ kaj lia spirito de ekstrema seriozeco kaj respondecemo al la laboro multe kuraĝigis la kamaradojn. Oni diris: "Nian Sivang vere aplikas kreive kion li lernis kaj agas en ĉiuj rilatoj laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ."

Fine ili sukcesis plenumi la taskon antaŭ la novjara tago. Pro ilia bona plenumo de la tasko, la gvida instanco premiis ilin po du insignoj, unu kun portreto kaj la alia kun vortoj de Prezidanto Maŭ. Kun granda ĝojo Nian Sivang kaj liaj batalamikoj revenis al sia roto. Karesante la portretan insignon, li diris al la kamaradoj: "Jen mia animo."

En la antaŭvespero de la novjara tago, ĉie en la urbo Datong flirtis ruĝaj flagoj kaj lume brilis lampoj. Kun vigla spirito kaj alta batalvolo ankaŭ Nian Sivang havis koron plenan de sunlumo dum sia reiro de ekstere! Li ekpensis, ke li jam servis en la armeo unu jaron, kaj morgaŭ li eniros en alian novan jaron. En la tuj venonta jaro, la penso de Maŭ Zedong dissendos pli brilan lumon, kaj sub la nutrado de la sunlumo, pluvo kaj roso de Prezidanto Maŭ, la nova batalanto Nian Sivang faros novajn meritajn servojn al la popolo kaj la granda proleta kultura revolucio! Dume li nedeteneble rigardis kun senlima amo, fojon post fojo, al sia brusto, kie sidis la insigno kun la portreto de Prezidanto Maŭ, kaj ŝajnis al li kvazaŭ varma fluo ondus en lia brusto.

Nian Sivang rapidigis la paŝojn en la direkto al la sidejo de la roto, kantante kantojn kun tekstoj el vortoj de Prezidanto Maŭ. Subite li ekmemoris ke baldaŭ okazos en la roto vespera kunveno por la nova jaro, en kiu li ja devos prezenti la programeron *Recito de "Servu al la Popolo"* kune kun sia batalamiko Fan Vuĉen. Ĉe tio, li iris pli rapide laŭ la relvojo.

Estis en plena mallumo de la nokto, kiam Nian Sivang atingis la lokon de kurbiĝo de la fervojo. Tie li transpaŝis la fervojon kaj proksimiĝis al la ponto n-ro 9.

"U-u-u!" Ekaŭdiĝis la fajfado kaj rulbruo de vagonaro. Estis pasaĝera trajno de la vojaĝnumero 434-a rapide veturanta de Koŭĉuan-karbominejo al Datong, plena de ministoj, ruĝaj gvardianoj, revoluciaj funkciuloj

kaj kamparanoj, kunportantaj ĝojigajn informojn pri venkoj en la granda kultura revolucio kaj en produktadoj.

Nian Sivang direktis antaŭen siajn akrajn okulojn kaj vidis en la lampolumo de la lokomotivo moviĝon de suspektinda homfiguro sur la fervojo. Nian Sivang rapidis antaŭen kaj jam vidis klare grandan ŝtonon sur la relo, antaŭ ol li atingis la lokon. Ja klasa malamiko intencis renversi la trajnon en la antaŭvespero de la novjara tago, kiam la klasbatalo pli profundiĝis en sia disvolviĝo! Lia tuta korpo ektremis de surprizo. Kriante, "Iu subfosas!" li tuj alkuregis.

La krimulo vidis ke Nian Sivang subite aperas antaŭ li, kaj volis forkuri en konfuziĝo...

Dume la vagonaro daŭre kuregis rekte al la ponto n-ro 9. Akcidento de elreliĝo kaj renversiĝo de la vagonaro tuj okazos, kiam ĝi ruliĝos sur la ŝtonegon!

Ĉiam pli kaj pli alproksimiĝis la vagonaro, kaj nun ĝi jam estis nur tridek metrojn for de la ŝtonego!

En tiu ĉi plej kriza momento, nenio alia okupis la penson de Nian Sivang krom la sola volo formovi la ŝtonegon por savi la trajnon! La granda instruo **"ni mortas indan morton, se ni mortas por la popolo,"** donis

*Supre: Parto de la verkoj de Prezidanto Maŭ, kiujn k-do Nian Sivang legis.*
*Malsupre: Parto de la taglibroj de k-do Nian Sivang*






al li gigantan forton. Bolis la varma sango en lia koro, li ekhavis en si senfinan forton, kaj li decidis sin ĵeti antaŭen spite al la danĝero de kompleta frakasiĝo de la korpo! Por batalantoj de Prezidanto Maŭ, la penso de Maŭ Zedong estas la animo kaj kuraĝo, eĉ maron de fajro aŭ monton de glavoj Nian Sivang kuraĝis entrudiĝi aŭ suriri! Per forta pugnobato, al kiu koncentriĝis lia tuta klasmalamo, li faligis tiun aĉulon malsupren de la relvojo. Sekvamomente li kuris kontraŭ la vagonaron, kaj la lokomotivo impetis al li kun densa fumo, aerondoj kaj forta lamplumo. Sen ŝanĝiĝo de la vizaĝkoloro kaj batego de la koro, Nian Sivang per ambaŭ manoj levis la pezan ŝtonegon, kaj kiam li volis formovi sin, la vagonaro kvazaŭ nigra monstro jam atingis lin!

La lokomotivisto jam rimarkis homfigurojn sur la fervojo en distanco de tridek metroj kaj plenforte bremsis la lokomotivon en urĝeco. Sed, la vagonaro kun sia giganta inerteca forto ankoraŭ impetis antaŭen kaj puŝfaligis Nian Sivang...

La ŝtonego estis formovita kaj la vivoj kaj havaĵoj de la popolo elsavitaj. La pasaĝeroj, la vagonaro kaj ĉio alia estis en sekuro. Sed la bona batalanto de Prezidanto Maŭ Nian Sivang kuŝis svena sur la relvoja bazo apud la kvina vagono. Sango kovris lian kapon. Kun iom fermitaj okuloj li mienis same naiva kaj simpla kiel antaŭe.

Grave vundita Nian Sivang ne povis ĉeesti la vesperan kunvenon por la nova jaro kaj ne faris la prezenton de *Recito de "Servu al la Popolo"*, tamen, per sia heroaĵo kaj sango li pli ruĝe, multe pli ruĝe prikantis la penson esprimitan en *Servu al la Popolo*!

## "VIVU PREZIDANTO MAŬ!"

La diagnozo konstatis ĉe Nian Sivang gravan traŭmon de kraniocerbo, krevon de kraniocerbo, ostrompon de kranio kaj elfluon de cerbospina likvaĵo. Li kuŝis en lito komplete senkonscia. Hematomo ĉe la kapo, malforta batado de la koro kaj la vivo en danĝero.

Pasis jam kvar longaj tagoj. Tagnokte lin gardis kuracistoj kaj flegistinoj. En la koridoro, tien kaj reen paŝis maltrankvile ministoj, ruĝaj gvardianoj kaj revolucia amaso, kiuj venis viziti lin. Paŝoj aŭdiĝis de malproksime proksimen kaj ree de proksime malproksimen. Kaj la batalamikoj de la roto venis kaj foriris alterne por lin rigardi. Ili dormis malbone kaj manĝis senapetite. Pasis minuto; pasis sekundo. Ho Nian Sivang, nia intima batalamiko! Kiam vi rericevos vian konscion!

Fine Nian Sivang reakiris sian konscion.

"Rekonsciiĝis! Li rekonsciiĝis!"

La zorgemo kaj maltrankvilo, kiuj turmentis la kamaradojn dum la pasintaj tagoj, nun subite turniĝis en senfinan ĝojon kaj ekscitiĝon. La flegistino diris proksime al li, montrante liajn batalamikojn: "Rigardu, malgranda Nian, kiuj venis?" Nian Sivang malfermetis la okulojn, sed ne respondis. Ŝi refoje lin vokis, kaj mankis respondo kiel antaŭe. Neniun esprimon oni povis legi sur lia vizaĝo.

En la malsanula ĉambro denove regis la kutima silento. La flegistino ĵetis rigardon al ĉiuj, kaj poste ĝi falis sur la portreton de Prezidanto Maŭ pendantan sur la kontraŭa muro. Ho, nia Prezidanto Maŭ ankaŭ rigardas al nia Nian Sivang!

Kaj ŝi ekkriis ĝoje:

"Rigardu, malgranda Nian, jen Prezidanto Maŭ!"

Ĉi tiuj vortoj havis kvazaŭ grandegan potencon, kaj malfermiĝis rapide la okuloj de Nian Sivang. Li rigardis ĉirkaŭen, sed nenion li memoris! Kiam li vidis la portreton de Prezidanto Maŭ laŭ la montro de la flegistino, tuj li malfermis siajn brilajn okulojn kaj krietis mallaŭte, pene kaj kun emocio:

"Prezi... danto Maŭ!"

"Prezidanto Maŭ!" Tiu, kiun la unuan li rekonis post kvar-tagnokta svenado, estis Prezidanto Maŭ! Ĉi tiu kuraĝiga novaĵo tuj trakuris la tutan hospitalon, la tutan kazernon kaj la tutan urbon Datong. Homoj alrapidis el diversaj direktoj por rigardi lin, kaj la kvieta hospitalo ekbolis!

Sed Nian Sivang denove sveniĝis, kvazaŭ dronante en profundan dormon post longa vojaĝo.

En sekvintaj tagoj, Nian Sivang nur okaze movetis la korpon aŭ malfermetis la okulojn. Li sciis nek saton aŭ malsaton, nek varmon aŭ malvarmon. Ankoraŭ daŭris elfluado de cerbospina likvaĵo, kaj lia vivo ankoraŭ restis en la danĝero de morto. De mateno ĝis vespero, li ĉiam dormis svene kaj dormis svene...



*K-do Nian Sivang studas verkon de Prezidanto Maŭ kune kun alia paciento en la hospitalo.*

Nun, Nian Sivang revekiĝis el la svena dormado. Kun granda ĝojo la flegistino alparolis lin emociite: "Komencu, malgranda Nian, ni kune kantu!" Ŝi kantis la unuan frazon: "*Dongfang hong* (Ruĝas la oriento)..."

Tiu intima frazo instigis malgrandan Nian malfermi siajn okulojn, kaj li ekkantis movetante siajn lipojn:

*Dongfang hong* (ruĝas la oriento), *tajjang ŝeng* (leviĝas la suno), *Ĝongguo ĉuliaŭ ge Maŭ Zedong* (en Ĉinio aperas Maŭ Zedong)...

Li kantis kun interrompoj jen laŭte jen mallaŭte, tamen li persiste kantis ĝis la fino. Estis aŭdeble ke li enigis sian profundan klasan amon al Prezidanto Maŭ en ĉiun vorton kaj ĉiun silabon.

Post kelkaj alternoj de sveno kaj rekonsciiĝo, oni legis en la medicina registrofolio por Nian Sivang la jenajn notojn:

"Hodiaŭ li havas bonan spiriton kaj jam povas manĝi."

"Hodiaŭ li kantis denove la kanton *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktilisto*!"

Li kapablas nun paroli kaj kanti, ĉu li kapablas ankaŭ skribi?

En la mateno, la kuracisto donis paperon kaj krajonon al Nian Sivang kaj diris milde: "malgranda Nian, ion skribu! Skribu vian nomon!"

Ankoraŭ ne tute rekonsciiĝinta, Nian Sivang prenis la krajonon, iom pensis kaj ekskribis per tremanta mano. Sur la papero malrapide moviĝis la krajono, kiun sekvis

ĉiuj okuloj ĉirkaŭe. Estis kompletigita la unua ideografiaĵo, kaj la dua, ... la pinto de la krajono sonis malforte sur la papero, tamen, la sono ekscitis la korojn de la ĉirkaŭstarantoj.

Nun vidu, la tri ideografiaĵoj ore brilantaj aperis sub la krajono de Nian Sivang: PREZIDANTO MAŬ

Subite leviĝis en la malsanula ĉambro la ora suno de Pekino, kiel brila kaj kiel hela! La ĉirkaŭstarantoj rigardis al la tri strikte skribitaj ideografiaĵoj, kvazaŭ ili vidus la varman ruĝan koron de Nian Sivang kaj aŭdus la voĉon el lia sino! Kiel bona batalanto! Kiel bonega batalanto!

En tiuj tagoj, la batalamikoj de la roto alterne venis al la hospitalo por rigardi Nian Sivang. Ĉiu progreso de lia resaniĝo alportis al la roto ĝojon kaj kuraĝigon. Iutage, la rotestro venis al li kaj, sidante apud lia lito, rigardis lin formanĝi unu ĝiaŭzi-on**. La rotestro estis tiel ĝoja, ke li unuspire kuris al la roto por komuniki tiun ĉi ĝojigan informon al la kamaradoj. Multaj tenis lin je la mano kaj petis lin ripeti refoje kaj refoje.

Kvankam revenis al Nian Sivang la memorkapablo, tamen li ankoraŭ restis en la stato de duonsveno. Alvenis la rotestro kaj politika direktanto, sed ilin li ne povis rekoni; alvenis la plotonestro kaj la subplotonestro, ankaŭ ilin li ne povis rekoni. Antaŭ fotoj de liaj parencoj kaj amikoj, kiujn oni montris al li, li same skuetis sian kapon. La rotestro kliniĝis al li kaj demandis per mallaŭta voĉo: "Sivang, bone pensu kiujn vi havas en la familio?"

Rigardinte la rotestron kaj, momenton pensinte, Nian Sivang respondis klare:

"Prezidanto Maŭ!"

Treege emociite, la rotestro premis per la mano sian batantan bruston kaj demandis:

"Kie estas via familio?"


"En Pekino!"

Kvankam lakonaj estis la respondoj, tamen ĉiuj frazoj montris lian ruĝan koron kaj ĉiu vorto havas grandan pezon! La kuracistoj, flegistinoj kaj batalamikoj silente aŭskultis emociite ĝis larmo.

Ho Nian Sivang, nia kara batalamiko kaj bonega batalanto de Prezidanto Maŭ! La grava vundo en la kapo detruis vian memorkapablon, tiel ke vi forgesis eĉ vian propran nomon, sed vi ne forgesis la plej plej ruĝan sunon en via koro! vi ne forgesis la plej amatan gvidanton Prezidanto Maŭ! La brila figuro de Prezidanto Maŭ profunde gravuriĝis en via cerbo kaj enstampiĝis en vian koron; nenia forto povas ĝin forigi aŭ elŝiri el via memoro! Paĉjo kaj panjo estas karaj, sed ne tiom kiom Prezidanto Maŭ. Nian Sivang, ho Nian Sivang, vi havas en via koro la ruĝan sunon neniam subirontan!

Post dekdu tagoj, Nian Sivang estis transigota al Pekino por tie kuraciĝi. Ĉe lia foriro, la batalamikoj venis por diri al li adiaŭon. La politika direktanto lin alparolis zorgeme:

*Plena de revolucia optimismo k-do Nian Sivang (dua de maldekstre) kantas kantojn kun tekstoj el vortoj de Prezidanto Maŭ kune kun la ruĝaj gvardianoj lin vizitantaj en la hospitalo.*



"Kamarado Sivang, en Pekino, vi devos plenkore submetiĝi al kuracado, faru firman decidon..." Antaŭ ol la direktanto finis sian frazon, Nian Sivang jam daŭrigis:

**"Timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon."**

La direktanto volis diri ke li faru firman decidon por venki sian vundiĝon, sed ne atendis ke Nian Sivang daŭrige recitis la vortojn de Prezidanto Maŭ. Pri tiel bona batalanto, la direktanto povis tute trankviliĝi. Ne necesis diri al li ion alian, li certe ne trompos la esperon de ĉiuj.

Lia batalamiko-samlokano Ĝoŭ Benguj, kiu aliĝis al la armeo samtempe kun Nian Sivang, nun staris antaŭ lia lito. En tiuj ĉi tagoj, Ĝoŭ eĉ mem ne sciis, kiom da fojoj li venis al Nian Sivang, sed la lasta ĉiam ne rekonis lin. Hodiaŭ, Nian Sivang lin rigardis kaj rigardis, subite li ekvokis: "malgranda Ĝoŭ!" "Ha! malgranda Nian jam min rekonas!" Ĝoŭ Benguj havis neniun vorton por esprimi sian ekscititecon. Li rememoris, ke antaŭe Nian Sivang multfoje esprimis sian deziron vidi Prezidanton Maŭ, kaj nun li baldaŭ iros al Pekino, kie Prezidanto Maŭ loĝas. Kiom ĝojiga afero tio ja estas! Ĝoŭ Benguj prenis la manon de Nian Sivang kaj demandis lin en lia orelo:

"Malgranda Nian, kion vi diros kiam vi vidos Prezidanton Maŭ en Pekino?"

"Mi krios 'Vivu Prezidanto Maŭ!'."

"Vivu Prezidanto Maŭ!"

"Vivu Prezidanto Maŭ!"

En tiu ĉi plej forta sono el miloj kaj miloj da kantoj koncentriĝas ja kiom profunda amo! kaj kiom granda potenco!

### BATALU PLU KAJ BATALU POR ĈIAM

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"Vi devas zorgi pri ŝtataj aferoj kaj konduki la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino!"**

La printempo de 1967, estis printempo de bataloj. En la tuta lando, la popolo levis ruĝajn flagojn, frapis tamburojn kaj forte atakis per potenca batalilo la plenmanon da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. La kamaradoj de la hospitalo uzis ĉiujn rimedojn por resanigi Nian Sivang, en la spirito teni la revolucion kaj stimuli la laboron; ankaŭ Nian Sivang mem kun obstina volo luktis kontraŭ siaj vundoj kaj suferoj. Lia kapablo de pensado jam tute revenis al li. Kune kun la kamaradoj de la hospitalo li disvolvis kun plej alta fervoro la batalon kontraŭ la plej granda enpartia potenctenanto kiu iras la kapitalisman vojon.

Nian Sivang, bona batalanto de Prezidanto Maŭ, daŭrigas nun sian bataladon! Li estas ĉiam fidela al la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ!

Verkita de **LI TIAN** kaj **VANG ZONGĴEN**

---

**Vulgara nomo por solvilo angle nomata amyl acetate.*
***Kuirita viandhakaĵo en tegaĵo el pasto.*

## KURANTAJ AFEROJ

# En Konstruado

### GRANDA KRESKO DE LA ŜTATA AĈETKVANTO DE PORKOJ KAJ OVOJ EN ŜANDONG

En la unua duono de la kuranta jaro aperis bonega situacio en la ŝtata aĉetado de porkoj kaj ovoj en Ŝandong-provinco. Kompare kun la sama periodo de la pasinta jaro, la aĉetitaj porkoj pliiĝis je 84%, kaj la ovoj je 45%.

Dank' al la grandega kresko de la aĉetkvanto, la frostita porkviando kaj vivaj porkoj liveritaj al aliaj provincoj dum la periodo pliiĝis pli ol naŭoble kompare kun tiu en la sama periodo de la pasinta jaro, kaj la ovoj pliiĝis 35.5-oble. Ankaŭ grandkvante pliiĝis la porkoj kaj ovoj por eksportado.

### ABUNDA RIKOLTO DE LIĈIO EN LONGHI

En Longhi de Fugian-provinco, unu el la liĉio-produktaj regionoj de nia lando, la pli ol 70,000 muoj da liĉio akiris riĉegan rikolton. La totala produktkvanto superis je pli ol 30% tiun de la rekorda jaro depost la Liberiĝo.

### PLIPRODUKTO DE KANABO EN TAJ-AN

La pli ol 130,000 muoj da kanaboj en Taj-an-regiono — la ĉefa produktejo de kanabo en Ŝandong-provinco — akiris riĉan rikolton. La totala produktkvanto pliiĝis je 10% kompare kun tiu de la pasinta jaro.

En la fino de julio, la kanaboj estis jam komplete rikoltitaj tie. Nun la komunumanoj aktive prilaboras la rikoltitajn kanabojn por ĝustatempe vendi la kanabajn fibrojn al la ŝtato.

# Du Invadintaj Usonaj Aeroplanoj Estas Ekstermitaj

ĜUSTE kiam la revoluciaj popoloj jubilis pro la eniro de la mondo en la granda, nova epoko de la penso de Maŭ Zedong, kaj en la bonega situacio kiam la granda proleta kultura revolucio de nia lando senĉese akiras novajn venkojn, du A-6-tipaj atakaj aeroplanoj de la usona imperiismo sovaĝe entrudiĝis super Guanghi-regionon en la posttagmezo de la 21-a de aŭgusto, intencante fari militan provokon. Ili estis tuj ekstermitaj de la heroa aerarmeo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kiu estis batalpreta kontraŭ la malamiko. Unu usona aerpirato estis kaptita viva.

Tiuj du atakaj aeroplanoj de la usona imperiismo invadis nian landon alfluginte de usona aviadila ŝipo. Ilia maksimuma rapideco pohora estas 1,158 kilometroj, kaj ilia maksimuma flug-alteco estas 9,150 metroj. Ili estas ekipitaj per aerokontraŭ-teraj telestirataj misiloj "buldogeto" aŭ "ŝriko", bomboj kaj kombinita ataka pilota sistemo. Sed spite kiom rapide flugas kaj kiom alte suprengrimpas la pirat-aeroplanoj de la usona imperiismo, se nur ili aŭdacas entrudiĝi en nian sanktan aerteritorion, la Ĉina Popola Liberiga Armeo, armita per la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, certe kun firma decido ilin ekstermos ĝisfunde, tute kaj komplete laŭ la ordono de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.



*Jen la fino de la usona aerpirato Jimmy L. Buckley.*



*Jen usona aerpirato Robert J. Flynn, kiun ni kaptis viva.*

ĴEN ĜAN:

# Vigla Disvolviĝo de Popolaj Armitaj Bataloj en Sudorienta Azio

NIA granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: **"Sperto de la klasbatalo en la epoko de imperiismo instruas al ni, ke nur per la forto de la pafilo la laborista klaso kaj la laborantaj amasoj povas venki la armitajn burĝaron kaj bienulojn. En tiu senco ni povas diri, ke nur per pafiloj la tuta mondo povas esti transformita."** Sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong, la diverslandaj popoloj de sudorienta Azio prenas armilojn kontraŭ la ĝisdente armitaj usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kaj disvolvas pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la malamikoj, farante armitan revolucion kontraŭ armita kontraŭrevolucio. La heroaj armeo kaj popolo de suda Vjetnamio, kiuj nun okupas sin pri nacisava milito kontraŭ la usona imperiismo, kreive aplikas la teorion, strategion kaj taktikon de Prezidanto Maŭ pri popola milito, batis la usonan imperiismon konatan kiel la plej potencan en la mondo ĝis plena embaraso kaj konfuzo, kaj tiel starigis por la subpremataj popoloj de la mondo brilan ekzemplon de venkado super agresantoj dank' al popola milito. La laosa popolo daŭre persistas en sia armita batalo, firmigante la liberigitan areon ampleksantan du trionojn de la tuta lando. Ĉiam pli ardas ankaŭ la fajro de la armitaj bataloj de la revoluciaj popoloj birma, tajlanda, filipina kaj malaja. Kvazaŭ la unua printempa tondro, sub la gvido de la revolucia alo de la Komunista Partio de Hindio, eksplodis en Darjeeling la revolucia kamparana armita batalo de la hinda popolo, kiu de longe suferas sub la regado de imperiismo kaj la hindaj reakciuloj. Resuminte sian sangan sperton, la Indonezia Komunista Partio kaj la indonezia revolucia popolo jam ekprenis pafilojn por decideme faligi la reakcian militistan regadon de Indonezio.

Sub la direktado de la popolmilita penso de la granda gvidanto de la tutmondaj popoloj Prezidanto Maŭ, la popolaj armitaj fortoj en sudorienta Azio fariĝas ĉiam pli fortaj dum la daŭro de sia batalado, enprofundigante la agresantajn trupojn de la usona imperiismo kaj ĝiajn lakeojn en grandan maron de popola milito.

## VJETNAMAJ ARMEO KAJ POPOLO VENKE BATAS LA USONAN IMPERIISMON PER POPOLA MILITO

La 29-a de aŭgusto de 1967 estis la 4-a datreveno de la publikigo de la brila dokumento *Deklaro pri Opono kontraŭ la Agreso al Suda Vjetnamio kaj Murdo al la Popolo de Suda Vjetnamio Fare de Usono kaj la Kliko de Ngo dinh Diem* fare de Prezidanto Maŭ. La sukcesa disvolviĝo de la nacisava milito de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo plene konfirmis la ĝustecon de serio da akrevidaj asertoj, kiujn Prezidanto Maŭ faris en tiu deklaro.

Kiam Prezidanto Maŭ publikigis tiun deklaron en 1963, la tiel nomata "speciala milito", kiun la usona imperiismo lanĉis en suda Vjetnamio, jam malvenkis. Sed la usona imperiismo ankoraŭ volis fari sian antaŭmortan barakton, kaj ekde la



*Nguyen Tam, juna gerilano de suda Vjetnamio, kiu estas sagaca kaj lerta en batalo kontraŭ la usonaj rabistoj.*

jaro 1965 ĝi senskrupule sendis grandajn nombrojn da soldatoj al suda Vjetnamio kaj komencis "partan militon". Ĝi ĵetis rekte sur la batalkampon de suda Vjetnamio trupojn kun pli ol 460,000 personoj kaj uzas duonon de sia taktika aerforto. Samtempe ĝi ankoraŭ ĵetis malrekte en la militon pli ol 70,000 personojn el sia 7-a floto de mararmeo kaj ĉirkaŭ 100,000 armeanojn garnizonantajn en Guam, Okinava, Tajlando k. a. La popolaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio fakte fikstenas ĉirkaŭ 700,000 usonajn armeanojn, devigante la usonan imperiismon malfortigi sian superregon en diversaj lokoj de la mondo kaj malordigante ĝian kontraŭrevolucian tergloban strategion.

Kvankam la usona imperiismo enĵetis tiel grandan kvanton de armitaj fortoj kaj uzas ĉiujn modernajn armilojn escepte de atomaj bomboj, tamen ĝi suferis sinsekve mizerajn malvenkojn en sia batalado kontraŭ la armeo kaj popolo de suda Vjetnamio. Dum pli ol du jaroj ĝi perdis ĉirkaŭ 200,000 armeanojn kaj oficirojn, kaj sole dum la tiel nomata dua "sek-sezona strategia kontraŭofensivo", kiun ĝi faris en la pasinta vintro kaj la nunjara printempo, pli ol 70,000 el ĝiaj soldatoj estis ekstermitaj de vjetnamaj armeo kaj popolo.

La kaŭzo, kial la sudvjetnamaj liberigaj armitaj fortoj povis ekstermi tiel multe da malamikaj soldatoj, kuŝis en tio, ke ili senĉese kreskis kaj plifortiĝis dum la batalado. Nun ili jam formis potencan popolan armitan forton kun ĉefaj trupoj, lokaj trupoj kaj gerilaj taĉmentoj. Ankaŭ iliaj batalforto kaj taktika nivelo rapide plialtiĝis. En 1964 la liberigaj armitaj fortoj povis plene ekstermi unu batalionon de la ĉefa forto de la pupa armeo en sola kampanjo aŭ batalo. Ekde la jaro 1965 ili povas ekstermi ne nur tutan batalionon aŭ tutan regimenton de la pupa armeo sed ankaŭ tutan batalionon de la usona agresa armeo. Sole en la unuaj tri monatoj de la kuranta jaro, ili plene ekstermis 32 malamikajn batalionojn, inter

kiuj 22 estis de la usona armeo. La "elitaj" kaj "atutaj" usonaj trupoj, pri kiuj la usonaj rabistoj fanfaronis, jam estis tiel solide batitaj, ke ili eĉ ektimiĝas aŭdante la alvenon de la liberigaj armitaj fortoj.

Laŭ la strategio kaj taktiko de Prezidanto Maŭ pri popola milito, utiligante siajn avantaĝojn en atako kontraŭ la malavantaĝoj de la malamiko, la armeo kaj popolo de suda Vjetnamio vaste disvolvas gerilan militon kaj bruligas ĉie la fajron de kontraŭagresa batalo, sen preterlaso de entreprenado de mova militado sub favoraj kondiĉoj por ekstermi la malamikon dum movado. Krome, ili kreis ankaŭ tre sagace elpensitajn batalmetodojn, kiaj ter-mina milito, tunela milito, surakva gerila milito, surprizataka milito ktp. Tuj kiam la usonaj kaj pupaj trupoj eniras la liberigitajn areojn, ili falas en grandan maron de popola milito. Ĉiuj viroj kaj virinoj, ĉiuj junuloj kaj maljunuloj en la liberigitaj areoj senescepte partoprenas la batalon; ĉiu vilaĝo batalas memstare, kaj same batalas memstare ĉiu homo, tiel ke la malamiko ne scipovas kontraŭagi. Efikas nek la "helikoptera taktiko", nek la "kirasveturila taktiko" de la malamiko. La malamiko ne povas doni baton al la liberigaj armitaj fortoj, nek trovi ilin; kontraŭe ĝi mem senĉese ricevas batojn. En la lastaj jaroj, la liberigaj armitaj fortoj ofte sendis siajn elitajn trupojn profunde en la centrajn regionojn kaj gravajn bazlokojn de la malamiko por fari surprizatakan militon, tiel ke la malamiko ĉiam trovis sin en maltrankvilego. Sole en la lastaj du jaroj, la liberigaj armitaj fortoj faris ĉirkaŭ 120 atakojn kontraŭ 45 aeraj bazlokoj de Usono en suda Vjetnamio kaj detruis aŭ difektis proksimume 3,000 malamikajn aeroplanojn. La trafikaj linioj superregataj de la usonanoj kaj pupa kliko estas senĉese detruataj kaj rompataj de la gerilaj taĉmentoj, tiel ke ili ofte restas paralizitaj.

Dank' al sia persistado en popola milito, suda Vjetnamio kun nur 14,000,000 loĝantoj, estas venkanta la imperiismon n-ro 1. Tio estas miraklo

*Batalantoj de la liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio aktive disvolvas trejnadon por surakva batalado.*



en la historio de milito, heroaĵo de la vjetnama nacio kaj mondskua grandioza entrepreno aklamata de la revoluciaj popoloj de la tuta mondo.

## LAOSAJ PATRIOTISMAJ ARMEO KAJ POPOLO EKSTERMAS MALAMIKOJN EN STRIKTA KUNAGADO

De la kuranta jaro, la patriotismaj armeo kaj popolo de Laoso frakasis multajn atakojn de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, strikte kunagante kun siaj ĉefaj trupoj, lokaj trupoj kaj gerilaj taĉmentoj, aktive faris atakojn kontraŭ la malamikoj, donante al ili pezajn batojn, kaj tiel pli solidigis kaj ekspansiigis la liberigitan areon.

Post la komenciĝo de la nuna jaro, la usona imperiismo precipe pliintensigis sian atakon kontraŭ la liberigita areo de Laoso, kunage al sia agresmilito en Vjetnamio por savi sian malvenkan situacion tie. En la fino de la pasinta jaro, Usono jam plenenergie reordigis kaj reorganizis la dekstrajn trupojn de Laoso, pligrandigis la nombron de la usonaj "konsilantoj" kaj poste instigis la dekstrajn trupojn fari multajn "balaadojn" kontraŭ la liberigita areo. La ĉiam batalpretaj patriotismaj armeo kaj popolo de Laoso donis severajn batojn renkonte al la malamiko kaj frakasis ĝiajn "balaadojn". Dum batalo en januaro la armeo kaj popolo en malsupra Laoso ekstermis proksimume 900 malamikojn en la daŭro de 5 tagoj.

Post la ĝisfunda frakasiĝo de grandskalaj "balaadoj", la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj ekprovis la metodon de senĉesa "mordetado", sendante grandajn nombrojn da armitaj banditoj kaj specialaj taĉmentoj por ataki la liberigitan areon kune kun la regulaj trupoj de la dekstruloj. Sed sub la kunlaboro de la popolaj armitaj fortoj la liberiga armeo de Laoso akiris grandajn venkojn en reatakoj.

De la ebenejoj ĝis la montregionoj la laosa popolo vaste disvolvas gerilan militon. La gerilaj taĉmentoj batalas en kunlaboro kun la ĉefaj trupoj kaj lokaj trupoj, donante batojn al la malamiko, jen aperante jen malaperante, tute mistere. La laosa popolo disvolvas lerte gerilan militon en diversaj formoj, laŭ la gerila taktiko formulita de Prezidanto Maŭ: **"Kiam la malamiko antaŭenpuŝiĝas, ni retiriĝas; kiam la malamiko kampadas, ni ĝin ĝenas; kiam la malamiko lacas, ni ekatakas; kiam la malamiko retiriĝas, ni persekutas."**

La usona imperiismo ofte fanfaronas pri sia "aera supereco" kaj senĉese uzas aeroplanojn de diversaj tipoj, inkluzive de B-52, por fari barbarajn bombadojn kontraŭ la liberigita areo de Laoso, vane provante subigi la laosan popolon. En batalo pinto-kontraŭ-pinta, la laosaj liberiga armeo kaj gerilaj taĉmentoj ne nur faligis pli ol 600 usonajn aeroplanojn per diversaj pezaj kaj malpezaj armiloj, sed ankaŭ surpriz-atakis la aerodromojn de la usona armeo.

## RIPETAJN VENKOJN AKIRIS BIRMAJ POPOLAJ ARMITAJ FORTOJ EN AKTIVAJ ATAKOJ

La popolaj armitaj fortoj gvidataj de la Komunista Partio de Birmo aktive faris atakojn en diversaj lokoj tra la tuta lando lasttempe kaj akiris multajn brilajn sukcesojn. Tio estas forta puno kaj peza bato al la reakcia registaro de Ne Vin, kiu freneze oponas kontraŭ Ĉinio, komunismo kaj la popolo, kaj multe kreskigis la batalspiriton de la revolucia popolo.

La popolaj armitaj fortoj gvidataj de la Komunista Partio de Birmo jam persistis en armita batalo proksimume dudek jarojn. Sub la direktado de la penso de Prezidanto Maŭ **"el la pafilo venas la ŝtatpotenco"**, la birmaj popolaj armitaj fortoj ĉiam pli potenciĝas dum sia batalado. Nun ili jam kapablas ataki kaj okupi mezajn kaj malgrandajn urbojn. Laŭ nekompleta statistiko ili faris 400 batalojn kontraŭ la reakciaj trupoj kaj policanoj de Ne Vin sole dum la jaro 1966. La areo de batalo jam ampleksas 60% de la totala surfaco de la lando. La usona imperiismo, postkulisa direktanto de la reakcia registaro de Ne Vin, timas, ke Birmo fariĝos la dua Vjetnamio en du aŭ tri jaroj.

La reakcia registaro de Ne Vin oponas kontraŭ Ĉinio, komunismo kaj la popolo publike, furioze kaj grandskale, kaj puŝis la popolan armitan batalon de Birmo al nova stadio. La popolaj armitaj fortoj aktive faras atakojn kaj ekstermas heroe kaj lerte la malamikon. En la 29-a de majo, kiam la popolaj armitaj fortoj atakis Kanjulkvin de Toungu, ili plene disvolvis sian apartan superecon en nokta batalo. Unue ili iris al la stacidomo kaj estingis ĉiujn elektrajn lampojn tie; poste ili bruligis provizejon de la reakcia registaro. Kiam la reakciaj armeanoj kaj policanoj alrapidis por estingi la fajregon, la popolaj armitaj fortoj profitis tiun ĉi bonan okazon por fari intensan atakon kontraŭ tiu urbo de la oriento, nordo kaj sudo kaj plene frakasis la malamikon. La popolaj armitaj fortoj ankaŭ ofte faras embuskajn atakojn kaj koncentras superegan forton por


ekstermi la efektivajn fortojn de la malamiko. En la 11-a de julio la popolaj armitaj fortoj faris embuskon sur la Paukkaung-Toungu-a ŝoseo, komplete ekstermis unu kunigitan patrolon de la reakciaj armeanoj kaj policanoj de la kliko de Ne Vin kaj batalakiris nombron de pafiloj kaj kartoĉoj. Ĝuste kiel vicprezidanto Lin Biaŭ montris en sia brila verko *Vivu la Venko de Popola Milito* "Vi apogas vin sur modernaj armiloj kaj ni apogas nin sur la popolamaso kun alta revolucia konscio; vi disvolvas plene vian superecon kaj ni la nian; vi havas vian manieron de batalo kaj ni havas la nian. Kiam vi volas batali kontraŭ ni, ni ne lasos vin tion fari, nek eĉ nin trovi. Kiam ni volas batali kontraŭ vi, ni trafos kaj forglutos vin." La birmaj popolaj armitaj fortoj plene disvolvas la grandan potencon de popola milito kaj ekstermas ĉie la malamikon. Sub la korekta gvido de la Komunista Partio de Birmo, kiu tenas alte la grandan standardon de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong, ili havas la vastajn popolamasojn kiel sian apogilon kaj disvolvas gerilan militon, prenante la kamparon kiel sian bazlokon, por doni solidajn batojn al la malamiko kaj ĝin ekstermi, tiel ke la reakcia registaro de Ne Vin ĉiam trovas sin en maltrankvilego kaj pasiveco kaj esti batata.

## TAJLANDAJ POPOLAJ ARMITAJ FORTOJ LERTE EKSTERMAS MALAMIKOJN


La fajrego de armita batalo, kiun bruligis la popolaj armitaj fortoj gvidataj de la Komunista Partio de Tajlando en nordorienta Tajlando antaŭ du jaroj, jam disvastiĝis al la granda areo de dudek kvin el la sepdek unu provincoj de tiu lando. En la pasintaj du jaroj la popolaj armitaj fortoj faris pli ol 500 batalojn, en kiuj ili ekstermis pli ol 1,000 malamikojn.

El sia praktiko de batalado kontraŭ la plene armitaj kontraŭrevoluciaj fortoj kaj el la riĉa sperto de la armita batalo de ĉina revolucio la tajlanda popolo komprenas, ke tio, kion ili povas fari, estas nur preni armilojn kaj fari pinto-

*La batalantoj de la popola armeo de norda Vjetnamio faris decidon nepre venki la usonajn rabistojn.*



*La verkoj de Prezidanto Maŭ estas ideologia armilo kaj spirita nutrajo en revolucia batalo. Jen funkciuloj de la Popola Liberiga Armeo de Laoso kreive studas kaj kreive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ en milito.*



kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kaj iri la triumfan vojon de ĉina revolucio, kaj ke la proletaro kaj popolo ne havos ian pozicion, se ili forlasos armitan batalon. Sekve, ĉiam pli multe da homoj unuiĝas ĉirkaŭ la Komunista Partio de Tajlando kaj iras en la vicojn de armita batalo.

En la lastaj du jaroj, la popolaj armitaj fortoj rapide disvolviĝis kaj plifortiĝis en sia batalo kontraŭ la usonaj kaj tajlandaj reakciuloj, aplikante la strategion kaj taktikon de popola milito laŭ la granda penso de Maŭ Zedong.

Ekde la stariĝo de la popolaj armitaj fortoj, la kliko de Thanom kaj Praphas, sub la helpo kaj direkto de la usona imperiismo, multfoje sendis armitajn policanojn por konduki kampanjojn de "sieĝekstermo" strebante al estingo de la fajrero de revolucio. Sed la popolaj armitaj fortoj ĉiufoje venke frakasis iliajn kampanjojn, kaj la malamikoj estis vunditaj kaj mortigitaj en ĉiam pli granda kvanto. En la kampanjo de "sieĝekstermo" inter decembro de 1965 kaj majo de 1966, la popolaj armitaj fortoj mortigis kaj vundis pli ol 150 reakciajn armeanojn kaj policanojn, inkluzive de 16 oficiroj.

Lasttempe la popolaj armitaj fortoj ne nur firmigis kaj plivastigis la gerilajn areojn en la nordorienta, sed ankaŭ malfermis novajn gerilajn areojn en la suda, meza kaj norda partoj de Tajlando. Eĉ Thanom, la estro de la tajlanda reakciularo, ne povis ne konfesi, ke la popolaj armitaj fortoj jam kapablas okupi teritoriojn en diversaj lokoj. En la junio ĉijare, la estro de la provinco Sakon Nakhon en la nordorienta parto konfesis, ke nur 70 el la 700 vilaĝoj de tiu provinco estas "sekuraj", kaj 90% de la vilaĝoj estas "areoj, kie aktivas la komunistoj".

La vigla disvolviĝo de la popola armita batalo donas pezan baton al la usona imperiismo kaj la reakcia regado de ĝia lakeo, la kliko de Thanom. Krom provizi monon kaj pafilojn kaj pliintensigi la trejnadon kaj armadon de siaj lakeoj, la usona imperiismo nun jam sendis la tiel nomatajn specialajn taĉmentojn kaj "aerajn sturmtaĉmentojn" por partopreni rekte en la milita subpremo al la popolaj armitaj fortoj. Ankaŭ la gvidanta kliko de la sovetunia reviziismo provas koketi kun la reakciularo de Tajlando rolante kiel kunkrimulo. Sed ĉiuj konspiroj de la imperiismo, reviziismo kaj reakciularo certe suferos kompletan malsukceson.

## EKSONIS LA UNUA PAFO DE LA ARMITA REVOLUCIO DE LA HINDA POPOLO


Areo de kamparana armita batalo jam aperis sub la gvido de la revolucia alo de la Komunista Partio de Hindio en la vilaĝoj de Darjeeling-distrikto de Okcidenta Bengalo, Hindio. Tio estis printempa tondro, kiu skuas la teron de Hindio, kaj la unua pafo de la armita revolucio de la hinda popolo sub la direktado de la penso de Maŭ Zedong.


Laŭ informoj de hindaj ĵurnaloj, tiu ĉi areo de armita batalo estas starigita je la komenco de marto en Naksalbari, Kharibari kaj Phansideva de Darjeeling-distrikto en la norda, monta regiono de Okcidenta Bengalo kun surfaco de ĉirkaŭ 270 kvadrataj mejloj kaj 80,000 loĝantoj. Nun en ĉirkaŭ 20 vilaĝoj, kie la revoluciaj fortoj estas pli grandaj, jam flirtas ruĝaj flagoj.

La revolucia alo de la Komunista Partio de Hindio en Siliguri, kiu pledas por kapto de la regpotenco pere de armita batalo, jam elmetis en 1965 la sloganon armi la kamparanojn, starigi bazlokojn en kamparo kaj sinprepari por armita batalo. De du jaroj tiu alo senĉese klopodas por mobilizi kaj organizi la kamparanojn. En la komenco de marto ĉijare, post la "kvara ĝenerala elektado" de Hindio, aperis en Okcidenta Bengalo "unuecfronta" registaro sen partopreno de Hinda Nacia Kongreso. Tio estas ŝildo, kiun la hindaj reakciaj fortoj uzas por trompi kaj paralizi la popolon. La revoluciaj membroj de la Komunista Partio de Hindio tie disvolvis movadon por "forlasi tiun ĉi unuecfrontan registaron" kaj "partopreni la batalon de Darjeeling", kaj iris al Naksalbari, k. c. por plue gvidi kaj organizi la kamparanojn fari armitan batalon pri agraro.

La armitaj kamparanoj jam komencis starigi sian propran regpotencon, organizas kamparanajn ligojn kaj sentime ribelas kontraŭ la reakcia registaro de Hindio kaj la bienuloj. Ili piedpremas la leĝojn de la reakcia registaro proklamitajn por protekti la posedaĵojn de la bienuloj, okupas kaj kulturas armite la teron de bienuloj, plantejaj mastroj kaj la reakcia registaro,

*La heroe batalanta Popola Liberiga Armeo de Laoso iniciatas atakon kaj persekutas la forkurantajn malamikojn.*





*Sagace aganta gerila taĉmento de la Komunista Partio de Birmo*

forpelas la hortikulturejajn mastrojn, iras al la kampoj de la bienuloj kaj perforte rikoltas la rizplantojn, perforte transprenas la grentenejojn, pafilojn kaj kartoĉojn de la grandaj bienuloj, impostas al la bienuloj depagon de mono kaj greno kaj malpermesas akaparon kaj retenadon. Ili starigis popolajn juĝejojn por juĝi kaj puni la obstine rezistantajn, lokajn tiranojn kaj fisinjorojn.

La armitaj kamparanoj faris multajn sukcesajn embuskojn kontraŭ la "ekstermaj" operacioj fare de la reakciaj armeanoj kaj policanoj, tiel ke la lastaj suferis grandajn perdojn kaj forkuris en konfuzo. En la 24-a de majo, kiam trupo da policanoj iris al la vilaĝoj de Siliguri por "ekstermi" kaj aresti la kamparanojn, kiuj partoprenis en la perforta transpreno de la tero, ili estis embuskitaj kaj sieĝitaj de 400 armitaj kamparanoj. Dum la bataloj kontraŭ "ekstermo" sinsekve okazintaj en la lasta tagdeko de majo, la armitaj kamparanoj forigis la policajn kampadejojn en tri subdistriktoj.

La armita batalo de la kamparanoj en tiu ĉi distrikto skuis la tutan Hindion kaj ankaŭ antaŭenpuŝis la batalon de kamparana, perforta transpreno de la tero en diversaj lokoj de Okcidenta Bengalo.

## LA INDONEZIA POPOLO EKPRENAS PAFILOJN POR FARI REVOLUCION

Lasttempe, el la ĉefaj insuloj de Indonezio, Javo, Kalimantan, Sulavesi kaj Sumatro, sinsekve venas ĝojigaj informoj pri la disvolviĝo de revolucia armita batalo de la revolucia popolo en la vilaĝoj kie la reakcia regado estas malforta.

La novaĵoj pri la aktivado de la popolaj armitaj fortoj venis unue el la vilaĝoj de meza Javo kiu estas riĉa je revolucia tradicio. Post kiam la indonezia faŝisma militista kliko okazigis kontraŭrevolucian ŝtatrenverson en oktobro de 1965 kaj grandskale buĉis la revolucian popolon, la revolucia popolo en kelkaj lokoj de meza Javo entreprenis armitan reziston. Ekde tiam la indonezia faŝisma reĝimo ĉiam sentas maltrankvilon pro la revolucia ŝtormo fermentanta en tiu regiono. La ĵurnalo *Sinar Harapan* informis


fine de septembro de la pasinta jaro, ke en Purvokerto de meza Javo, en julio de la pasinta jaro, "en Kendeng inter Madjenang kaj Vangkang aperis nova armita forto", t. e., popola armita forto. La dekstraj ĵurnaloj kiel la organo de la indonezia reakcia armeo *Novaĵo-centro de Armitaj Grupoj* k. a. informis ke trupo de la popolaj armitaj fortoj faris akran batalon en Ninggil-vilaĝo proksime al la urbo Blora en meza Javo en la 5-a de marto kontraŭ la reakcia armeo de la faŝisma reĝimo de Suharto-Nasution. Antaŭ la batalo, tiu popola trupo okazigis revuon en Ninggil-vilaĝo sub severa gardado, mortpafis kelkajn reakciajn oficistojn kaj portis la provizaĵojn al la najbaraj montaj kaj arbaraj zonoj. La dekstraj ĵurnaloj informis ankaŭ, ke tiu popola trupo havas kelkajn tre lertajn pafistojn. La faŝisma reĝimo de Suharto-Nasution sendis ĉirkaŭ kvin batalionojn el la terarmea sturm-regimento — elito de siaj trupoj — por "sieĝekstermi" tiun popolan trupon, sed ili ricevis severan rebaton de tiu popola trupo kaj suferis grandajn perdojn.

Informoj pri la aktivado de la popolaj armitaj fortoj venis lasttempe ankaŭ el Kalimantan. La ĵurnalo *La Armitaj Fortoj* informis, ke en la 15-a de julio trupo de la popolaj armitaj fortoj atakis iun aeran bazlokon de la indonezia faŝisma militista reĝimo kaj mortigis kvar el la reakciaj oficiroj kaj soldatoj garnizonantaj tie. Timigite de la okazaĵo, en la 16-a de julio, la faŝisma militista reĝimo sendis helptrupon al tiu aera bazloko el Barat, la ĉefurbo de Kalimantan, per helikopteroj, kaj poste sendis plie unu roton kaj du plotonojn de la terarmea sturm-regimento el Djakarta por "purigi la kamparon".

Malgraŭ la kruelegaj subpremado kaj persekutado de la faŝisma militista reĝimo de Indonezio, la kompartianoj kaj revolucia popolo de Indonezio estas nek premfaligeblaj nek finmortigeblaj! Ili jam ekprenis pafilojn, daŭre marŝas antaŭen laŭ la sangaj spuroj de la martiroj kaj batalakiras la venkon de la revolucio paŝo post paŝo.

La venko apartenos al la popoloj de sudorienta Azio, kiuj alte tenas la standardon de armita batalo de Maŭ Zedong.

*Plenaj de vigleco, la batalantoj de la popolaj armitaj fortoj organizitaj de la Komunista Partio de Birmo intense sin ekzercas por ekstermi la malamikon en ĉiu ajn momento.*



# La Penso de Maŭ Zedong Direktas la Justan Batalon de la Usonaj Nigruloj

EN la 8-a de aŭgusto 1963, la granda gvidanto de la revoluciaj popoloj de la mondo Prezidanto Maŭ publikigis sian *Deklaron por Subteni la Justan Batalon de la Usonaj Nigruloj kontraŭ Rasa Diferencigo de la Usona Imperiismo.*


### LA DEKLARO DE PREZIDANTO MAŬ ESTAS GRANDA ALVOKO POR BATALO

La deklaro de Prezidanto Maŭ estas brila marksism-leninisma dokumento, kiu donis al la nigra popolo de Usono potencan ideologian kaj teorian armilon en ĝia revolucia batalo.

La deklaro estas senlime hela lampo kiu montras al la nigra popolo de Usono kaj ĉiuj subpremataj popoloj la vojon de liberiĝo.

La deklaro estas granda alvoko por batalo, kiu donas netakseble grandan kuraĝigon al la batalanta nigra popolo de Usono kaj la batalantaj revoluciaj popoloj de la tuta mondo.

*Batalantaj usonaj nigruloj manifestacias kontraŭ la usona agresado al Vjetnamio.*





*Kaliforniaj nigruloj iras al la parlamento kun armiloj por fari manifestacion.*

La progresado de la batalo de la usona nigra popolo dum la lastaj kvar jaroj plene pruvis la tutan serion da saĝaj tezoj elmetitaj de Prezidanto Maŭ en sia deklaro kaj montris la grandan potencon de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong. Respondante al raportistoj la 1-an de aŭgusto, Carmichael, juna gvidanto de la nigra popolo de Usono, emfazis: "Maŭ Zedong alportis al la Okcidento penson por fari batalon. ...Multaj usonaj nigruloj, kiuj partoprenas la batalon, havas lian ruĝan libreton en la mano. Multaj el liaj instruoj, ekzemple: **'Ni devas subteni ĉion, kion la malamiko oponas; kaj oponi ĉion, kion la malamiko subtenas.' 'El la pafilo venas ŝtatpotenco'**, ktp. ĉiuj estas tre klaraj. Tiuj pensoj helpas la nigran popolon de Usono vekiĝi kun ĉiu tago."

## ĈIAM PLI ARDAS LA ARMITA BATALO KONTRAŬ TIRANADO

Depost la unua grandskala kontraŭtirana batalo de la nigruloj en Harlem-kvartalo, Novjorko, en la somero de 1964, la tajdo de la armita batalo de la usonaj nigruloj pli kaj pli leviĝas kun ĉiu jaro, la lokoj influitaj de tiu batalo samtempe plivastiĝas, la nigruloj partoprenantaj la batalon fariĝas pli konsciaj kaj estas ankaŭ pli bone organizitaj, kaj la nivelo de ilia batalo senĉese plialtiĝas, tiel ili donas ĉiam pli pezajn batojn al la reakcia regantaro de Usono. La plej grava trajto de la disvolviĝo de la batalo de la usona nigra popolo dum la lastaj kvar jaroj estas tio, ke ili nun batalas per armiloj anstataŭ per malplenaj pugnoj.

En la mallongaj du monatoj ekde la komenciĝo de somero ĉijare, la armita batalo de la nigra popolo kontraŭ tiranado flamis ne nur en pli ol naŭdek urboj grandaj kaj malgrandaj, kiel Novjorko, Ĉikago, Filadelfio, Los Angeles, Detroit k.a., sed ankaŭ en Vaŝingtono, la centro de regado de la usona imperiismo. La nigruloj en Detroit, la kvina granda urbo en Usono, heroe rezistis en sanga batalo kontraŭ la brutala subpremo de la armitaj soldatoj kaj policanoj nombrantaj ĉ. 20,000 personojn en la daŭro de ĉ. unu semajno. Tio aldonis novan, senprecedence grandiozan ĉapitron al la historio de bataloj de la nigra popolo de Usono. La alte leviĝanta tajdo de ĝia armita batalo kontraŭ tiranado forte skuas la enlandan regadon de la usona imperiismo kaj konsterne teruris la reakcian regantaron de Usono, tiel ke ĝi kriis, ke tio estas "la plej serioza enlanda krizo" de Usono dum la lastaj pli ol cent jaroj.

La foj-refoja sanga masakro fare de la usona reganta grupo kontraŭ la nigra popolo de kvar jaroj jam edukis la vastajn nigrajn popolamasojn kiel negativaj lecionoj kaj komprenigis al pli kaj pli multe da homoj la necesecon de ekpreno de pafiloj. Ili ne plu estas kontentaj defendi sin per ŝtonoj, stangoj kaj boteloj; pli kaj pli

multe da nigruloj decideme sin ĵetas kun pafiloj en embuskan batalon kontraŭ la faŝismaj soldatoj kaj policanoj. En iuj urboj nigraj popolamasoj entrudis sin en vendejojn de pafiloj aŭ arsenalojn kaj prenis pafilojn por armi sin. Antaŭ nelonge en batalo okazinta en Detroit, la nigruloj la unuan fojon uzis maŝinpafilon en kunagado kun embuska grupo por fari surprizatakojn kaj multe teruris kaj konsternis la armitajn soldatojn kaj policanojn.

En Harlem-kvartalo 1964, en Watts-kvartalo 1965, en Ĉikago 1966 kaj en Newark kaj Detroit 1967..., en tiuj kvar jaroj ĉiu granda perforta batalo estis nova hardiĝo por la nigraj popolamasoj, ilia batalvolo fariĝis pli firma, kaj ili havas pli fortan fidon pri sia propra forto. La vastaj amasoj de nigruloj en Newark, plenaj de fiereco, nomas sian grandan batalon kontraŭ tiranado okazintan antaŭ nelonge "Julia Ribelo". Ili diras, ke post ĉi tiu "Julia Ribelo", ili sentas sin pli "sentimaj" kaj pli "potencaj" ol antaŭe.

Prezidanto Maŭ diris: **"La centra tasko kaj plej alta formo de revolucio estas kapti ŝtatpotencon per armita forto kaj solvi problemon per milito. Tiu ĉi marksism-leninisma principo de revolucio validas universale, tiel por Ĉinio kiel por ĉiuj aliaj landoj, tute senescepte."** La liberiĝo de la usonaj nigruloj kaj la popolo de Usono nepre iros ankaŭ tiun ĉi vojon. La vastaj amasoj de usonaj nigruloj jam travidis la trompan karakteron de la tiel nomata "Civilrajta Leĝprojekto", per kiu artifikas la reganta grupo de Usono, rompis la digon de la tiel nomata "neperfortismo", kaj disvolvis perfortan batalon. Tio ĉi estas grava progreso en la revolucia movado de la usonaj nigruloj. Ilia armita batalo ludas la grandan rolon de sturma taĉmento en la revolucia batalo de la usona popolo.

La reviziistoj de la usona kompartio, lakeoj de la sovetia reviziista kliko en Usono, parolas ankaŭ pri "klasbatalo", tamen ili freneze kalumnias kaj oponas la armitan batalon de la nigruloj kontraŭ tiranado. Sub la ŝildo de "unuiĝo" de la nigra kaj blanka popoloj, ili provas kontroli la batalon de la nigruloj kaj meti ĝin sur la relojn kiujn povas toleri la monopola kapitalo de Usono. Tiu bando de lakeoj de la monopola kapitalo estas perfiduloj de la usonaj nigruloj kaj ankaŭ de la laboranta popolo de Usono.

## LA USONA IMPERIISMO ESTAS LA RADIKO DE MALFELIĈO DE NIGRULOJ

En sia deklaro, Prezidanto Maŭ montris: **"La rapida disvolvo de la bataloj de la usonaj nigruloj estas esprimo de la ĉiam kreskanta akriĝo de la klasbatalo kaj nacia batalo en Usono."**

La leviĝo de la armita batalo de la usonaj nigruloj kontraŭ tiranado estas rezulto de la longdaŭra praktikado de kruelaj ekspluato, rasdiferencigo kaj persekutoj fare de la usona regantaro kontraŭ la nigruloj kaj de ĝia intensa praktikado de agresa politiko eksterlande kaj faŝisma politiko enlande. La nigruloj de Usono ĉiam vivas en la plej malalta tavolo de la socio kaj suferas la duoblan subpremon de klaso kaj nacio. Plejparto de la nigruloj estas senigitaj je balota rajto. Ili ricevas la plej malaltan laborpagon, kaj la proporcio de ilia senlaboreco estas plej alta. Ili estas ofte arbitre arestitaj, skurĝitaj kaj mortigitaj. La agresa milito en Vjetnamio fare de la usona imperiismo ankoraŭ pli pezigis la katastrofon al la usonaj nigruloj. La Johnson-registaro sendis antaŭ ĉiuj aliaj la nigrulojn kiel kanonfuraĝon, kaj kvarono el la rekrutaro en la tuta lando estas nigruloj. Sennombraj

*Nigruloj de Newark, Usono, brave luktas kontraŭ la "Nacia Gvardio".*



faktoj pruvas, ke la malbeninda sistemo de imperiismo kaj la kruela regado de la usona monopola kapitalo estas la ĉefa kaŭzo de la infera mizero de la nigruloj.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"En analizo ĝis la fino, nacia batalo estas problemo de klasbatalo."** Tio ĉi estas grava principo de marksism-leninismo kaj de la penso de Maŭ Zedong. La ekkono pri tiu grava principo havas treege gravan signifon por la usonaj nigruloj kaj ĉiuj subpremataj nacioj de la mondo, batalantaj por sia liberiĝo, en klara divido de la amikoj kaj malamikoj, en difino de la direkto de sia batalo kaj en ellaboro de ĝustaj strategio kaj taktiko.


La usona kapitalismo kaj imperiismo ja disvolviĝis propre surbaze de la kruela ekspluatado al la nigruloj. La rasdiferenciga sistemo de Usono estas dekomence formo de klasa subpremo. La usona reganta grupo disvolvis la rasdiferencigan sistemon ĝis ekstremo nur por plifortigi la klasan ekspluaton kaj klasan regadon. Utiligante tiun barbaran sistemon ili ne nur elpremas de la nigruloj superprofiton de dekmiliardo da dolaroj en ĉiu jaro, sed ankaŭ prenas la nigrulojn kiel vastan rezervan armeon de laboro por devigi la subprematan blankan popolon toleri la ekspluaton kaj sklavigon fare de la monopola kapitalo. Samtempe, ili utiligas tiun sistemon por krei rasan antaŭjuĝon kaj malamon inter la laborantaj popoloj kun malsamaj haŭtkoloroj, praktiki la rimedon "dividi kaj regi" super ili kaj subfosi la unuiĝon kaj batalon de la laborista klaso kaj la laboranta popolo de Usono, kun la celo defendi la reakcian regadon de la monopola kapitalo. La reakcia reganta grupo de Usono estas la komuna malamiko de la vastaj diverskoloraj popolamasoj de Usono.

## CERTE TRIUMFOS LA JUSTA BATALO DE LA USONAJ NIGRULOJ

Laŭ aspekto la reakcia reganta grupo de Usono ŝajnas kolosa, tamen en efektiveco ĝi estas nur papera tigro ekstere forta sed interne sensuka. Alfrontante la nuntempan situacion de la flamanta perforta batalo de la nigruloj, la Johnson-registaro, kiu jam estas embarasita de la agresa milito kontraŭ Vjetnamio, estas en granda paniko. Unuflanke, ĝi jam tute demetis sian maskon de "demokratio kaj libereco" kaj faras pli malkaŝan sangan subpremon kontraŭ la nigruloj, aliflanke, ĝi ankoraŭ ne forgesis ludi sian taktikon de trompo, vane provante subaĉeti ilin per bagatelaj favoroj kaj profitoj. Sed la vekiĝintaj amasoj de nigruloj jam decidis batali ĝisfine por sia plena liberiĝo. Ili estas ne subpremeblaj nek trompeblaj, ili nepre pli ardigos la fajron de armita batalo kontraŭ tiranado kaj disvastigos ĝin tra la tuta Usono.

La armita batalo de la usonaj nigruloj kontraŭ tiranado estas unu el la fortoj, plena de batalvolo, en la luktado de la popolo de la tuta mondo kontraŭ la usona imperiismo. La nigra popolo de Usono faras ribelon en la koro de la usona imperiismo. Tio donas fortan subtenon al la kontraŭusona batalo de la popolo en ĉiuj landoj. Ankaŭ la batalo de la usonaj nigruloj ricevas grandan subtenon de la tutmondaj revoluciaj popoloj. Prezidanto Maŭ montris: **"Subtenate de pli ol 90% el la popoloj de la tuta mondo, la usonaj nigruloj certe triumfos en sia justa batalo. La damninda koloniisma kaj imperiisma sistemo ja prosperis kun la sklavigado de kaj negocado pri nigruloj, kaj ĝi certe ankaŭ finiĝos kun la kompleta liberiĝo de la nigra raso."** Tiu ĉi granda antaŭdiro de Prezidanto Maŭ certe fariĝos brila realo.

*Nigruloj de la usona urbo Cambridge disvolvas batalon kontraŭ la usona reakciularo.*





*Albanaj amikoj kantas en la ĉina lingvo la kanton*
Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktilisto.

# Senfina Estas la Amo de Prezidanto Maŭ

—Kvar Popolkantoj

## *Senfina Estas la Amo de Prezidanto Maŭ*

(korea)

*Sin levas alte la montar' Hing-an sur tero,*
*Sed malpli ol la saĝ' de Prezidanto Maŭ;*
*Tre longas la torenta Hejlonggiang-rivero,*
*Sed malpli ol la am' de Prezidanto Maŭ.*

*Mallumon Prezidanto Maŭ forpelis,*
*Kaj plenan lumon li al ni liveris.*
*La oraj libroj liaj estas ja trezoro,*
*L' instruojn liajn firme tenos ni en koro.*

## Longe, Longe Vivu Kara Prezidanto Maŭ

(mongola)

*Jen la akvoj kaj ĉielo plibluiĝas,*
*Ĉar alvenas l' instrukcio de la Prezidanto:*
*La revolucion tenu kaj stimulu l' produktadon,*
*Por konstruo de la bela patrolando.*

*Ludu ĉevalkapan violonon la plej bonan,*
*Por alvokon lian diskonigi ĝis steprando,*
*Trinku el la bovlo freŝan lakton tre aroman,*
*Por ke longe, longe vivu l' kara Prezidanto.*

## Luŝeng-oj Ludas Laŭte "Ruĝas l' Oriento"

(mjaŭa)

*La suno brilas ruĝe super mjaŭaj montoj,*
*Rubene ruĝa estas kor' de mjaŭ-popolo.*
*Luŝeng-oj* ludas laŭte "Ruĝas l' Oriento",*
*Trans dekmil montojn flugas tiu kantsonoro.*

*La montajn pintojn blankaj nuboj ĉirkaŭiras,*
*Banjanajn trunkojn liantigoj grimpe volvas.*
*Al Prezidanto Maŭ la mjaŭpopol' sopiras,*
*Por tion ĉi esprimi eĉ mil luŝeng-oj ne povas.*

## Radias Ruĝe Nia Vasta Lando

(hana)

*Radias ruĝe nia vasta lando,*
*Kaj brile antaŭ ni la vojo helas.*
*Ho, Prezidanto Maŭ, Vi granda instruanto,*
*Je brilo ĉiujn stelojn Vi superas!*

*Sur sama vojo de revolucio,*
*Grandpaŝe marŝas ĉiuj familioj.*
*Ho, Prezidanto Maŭ, Vi granda direktanto,*
*Feliĉe marŝas ni sub viaj instrukcioj.*

*Cent milionoj havas saman koron,*
*Kaj l' ruĝa kor' sin turnas al Pekino.*
*Ho, Prezidanto Maŭ, Vi granda komandanto,*
*Pli karas Vi por ni ol la patrino!*

---

* *Speco de blovmuzikilo el bambuaj tubetoj kun po 1 anĉo.*



# VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ ZEDONG

**( en Esperanto )**

358 P.
En poŝformato kun
ruĝa plasta kovrilo

9 X 13 cm.
prezo: £ 0-2-0

**Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio**

**Distribuas: Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, Ĉinio**

Aĉetu ĉe niaj perantoj en via lando aŭ rekte ĉe ni——Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio. Katalogo laŭ peto.


# Signifoplena Amuza Kunveno

NIA plej estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ akceptis en la 11-a de julio la praktikantajn lernantojn el Kongolando (B.), kiuj jam finis sian periodon de praktikado kaj estis baldaŭ revenontaj al sia patrio. En la neforgesebla feliĉa momento, ili svarme ĉirkaŭis Prezidanton Maŭ kaj svingis la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la mano, kaj huraadis foje-refoje: "Vivu! Longe vivu Prezidanto Maŭ!"

Sekvintan tagon, kiam la ekvojaĝontaj lernantoj de Kongolando (B.) venis al la aerodromo kaj tie vidis



*Ĉinaj kamaradoj kaj kongolanda amiko kune kantas* Vivu Prezidanto Maŭ.



*Ĉina kamaradino kaj kongolanda amiko kune legas la* Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong.

ĉinajn kamaradojn, ili tuj etendis siajn dekstrajn manojn kaj diris kun fiereco: "Dividu kun ni la feliĉon kaj premu niajn manojn, kiuj estas premitaj de Prezidanto Maŭ." En ĝojego ili kantis kaj dancis, kaj en la vespero ili okazigis signifoplenan amuzan kunvenon kune kun la kamaradoj de la propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong de la aerodromo. En la amuzkunveno ili foje kaj refoje deziris al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ longan vivon! longan longan vivon! Ili foje kaj refoje laŭte kantadis *Ruĝas la Oriento*, *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktilisto* kaj *Vivu Prezidanto Maŭ*. Du lernantinoj krome kantis *Ore Brilas la Verkoj de Prezidanto Maŭ*. La senlima amo kaj profunda korinklino de la kongolandaj amikoj al Prezidanto Maŭ ricevis varmajn aplaŭdojn de ĉinaj kamaradoj. La tutan salonon de la aerodroma atendejo regis gajeco.

Post la amuziĝo la ĉinaj kamaradoj kaj la amikoj de Kongolando lernis kune verkojn de Prezidanto Maŭ. Dum la periodo de praktikado en Ĉinio la lernantoj el Kongolando (B.) propraokule vidis la grandan proletan kulturan revolucion, kiun faras la ĉina popolo sub la direktado de la penso de Maŭ Zedong, kaj la efektivajn agadojn, kiujn la ĉina popolo faris por firme subteni la revoluciajn batalojn de aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj popoloj. Ili diris: "La penso de Maŭ Zedong estas lumturo por la tutmonda revolucia popolo kaj potenca armilo por venki imperiismon kaj reviziismon." "La verkoj de Prezidanto Maŭ estas trezorejo de marksismleninismo kaj fonto de batalfortoj de la popolo."

La praktikado de unu jaro ne estas longa, sed la lernantoj de Kongolando (B.) vere akiris netakseblan trezoron por fari revolucion — la penson de Maŭ Zedong. La lernantoj unuanime esprimis, ke ili nepre fariĝos semantoj de la penso de Maŭ Zedong post sia reveno al la patrio kaj kontribuos al la liberiga afero de la homaro. Matene de la 13-a, la kamaradoj de la propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong akompanis la kongolandajn amikojn al la aeroplano, kaj la lastaj eklarmis ĉe adiaŭo kaj portis kun si la profundan amikecon de la ĉina popolo al sia patrolando.

## INTER Ni

### SKRIBAS NIA VJETNAMA LEGANTO DINH HUY HAN

Dum la 2000-a usona aviadilo estas faligita pafe de niaj batalantoj super la norda tero de nia patrio kaj en la loko kie ni dislogiĝas nian hospitalon mi jam ricevis viajn plej altvalorajn dokumentojn — verkojn de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong — kaj karajn medalojn kun lia portreto. Mi elkore ĝojegas pri la supraj venko kaj donaco kaj tutkore dankas vin pro tiu helpo, kiu ĉiam plej interesas min.

Starante antaŭ la granda proleta kultura revolucio de via lando, ne malmultaj fremdlandaj amikoj sur la tutmondo soifante serĉkomprenigas al si la brilon de la penso de Prezidanto Maŭ kaj esperas, ke ĝi lumigas sian proletan revolucian vojon. Kiel mi mem, spite la aĝon de la t. n. "pli de vivduono" mi tagnokte lernadas la verkojn de nia Prezidanto Maŭ Zedong kune kun tiuj de nia Prezidanto Ho Chi Minh por servi al la revolucio de proletaro dum mia tutvivo.

Eble tiam, kiam vi ricevos ĉi tiun leteron, estos la festtago de jubileo fondiĝa de la Kompartio de Ĉinio. Do, permesu min, ke mi sendas miajn plej altajn dankemojn al la CK de la Kompartio de Ĉinio, al nia genia gvidanto, granda instruanto Prezidanto Maŭ Zedong. Ĉar, ekde mia komprenaĝo, mi konscias ke dank' al la granda kaj firma subteno de la Kompartio kaj la tuta popolo de Ĉinio direktataj de nia Prezidanto Maŭ Zedong, nia lando jam flue trairas multajn malfacilojn sur la vojo batalanta kontraŭ agresantoj — francaj koloniistoj antaŭe kaj usonaj imperiistoj nuntempe.

Refoje, mi bondeziras la grandan ĝisfundan triumfon de via landa granda proleta kultura revolucio, kaj bonvolu akcepti miajn plej profundajn dankemojn al vi kaj viaj kunlaborantoj. Mi neniam forgesos viajn bonhelpojn al mia studado de ĉina lingvo kaj Esperanto.

### LETERO DE ALBANA LEGANTO B. MEZINI

Granda estis mia ĝojo kiam mi lernis ke ĉijare E.P.Ĉ. aperas ĉiumonate.

N-ro 3 de E.P.Ĉ., laŭmiaopinie, estis tre interesa. Ŝajnas, ke ni admiras senlime la vivon de k-do Norman Bethune, pri kiu mi legis pasintjare la romanon "Kuracisto de 3 Kontinentoj" skribitan de kanadanoj.

Sed al mi plaĉis ankaŭ multaj seriozaj artikoloj enmetitaj en ĉiuj unuaj numeroj de 1967, k. e.:

"Sintezita Kristala Insulino" (n-ro 3)

"Sinsekvaj Venkoj de Ĉinio sur Industria Fronto" (n-ro 2)

"La Kemia Cementa Tekniko de Ĉinio Atingis la Progresintan Nivelon de la Mondo" (n-ro 2)

"Ĉinio Konstruis la Unuan Laborejon de Sinteza Benzino en la Mondo" (n-ro 1)
kaj similaj.

Laŭdinda estas la ekstra numero de 1966.

Tagon post tago plialtiĝas la nivelo de E.P.Ĉ., la lingvo fariĝas pli riĉa, klara kaj literatura. Aŭguras al vi pli multe da sukcesoj en via laboro!

Delonge mi ne ricevis de vi materialojn en Esperanto, precipe politikajn. Mi preferus ĉiujn librojn aŭ broŝurojn de k-do Maŭ Zedong. Mi petas vin, bonvole, sendi al mi tiujn eldonaĵojn kiel eble plej frue. Mi esprimas al vi miajn plej korajn salutojn kaj gratulojn.


Vivu la granda, batala kaj poreterna amikeco inter Albanio kaj Ĉinio!

# Sun Leji—
# Bona
# Ĉefproviantisto




1) Sun Leji estas aktivulo en studado de la verkoj de Prezidanto Maŭ en la armeo. Li ofte diras: "Kiel fiŝo ne povas vivi ekster akvo, tiel same ni povas sukcesi en nenio deviante de la direktivo de Prezidanto Maŭ."


Komunisto Sun Leji estas ĉefproviantisto en la dua roto de iu trupo de PLA garnizonanta ĉe Ginan. Depost sia armeaniĝo, li diligente legas la verkojn de Prezidanto Maŭ, serioze aŭskultas liajn vortojn, praktike agas laŭ liaj instrukcioj kaj tutkore servas al la popolo.




2) Depost sia armeaniĝo en 1958 por defendi la patrolandon, li diligente lernis kaj pene sin ekzercis kaj baldaŭ fariĝis elstara pafisto.




3) Pro bezono de laboro, Sun Leji estis transmetita al laborposteno de proviantado. En la komenco li timis, ke li ne povas bone plenumi sian taskon pro sia malalta klereco. La politika direktanto rakontis al li historiojn de herooj kaj helpis lin studi verkojn de Prezidanto Maŭ por fortigi lian memfidon en konkero de malfacilo j.



4) Poste li fariĝis ĉefproviantisto. Li laboris en maniero ekstreme serioza kaj respondecema. Foje, por trovi la miskalkulon de unu cendo, li maldormis unu tutan nokton.



5) Sun Leji zorgas pri la kolektivo pli multe ol pri si mem. Por konservi la nutraĵon de la kuirejo en higiena stato, li kovris la panostablon per sia nova kulvualo kontraŭ muŝoj kaj polvo.



6) En vintro, kiam legomoj ne tiel abundas, kun la kuira subplotono sub sia gvido li ellitiĝis frue kaj enlitiĝis malfrue por fari fabkazeon kun la celo plibonigi la manĝon. Kaj ĉiufoje li kolektis la fabograjnojn kiuj falis sur la plankon.



7) Instigate de la spirito de la Malsaĝa Avo en la verko de Prezidanto Maŭ *Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo*, li sukcesis reformi la fornon kaj reduktis la karbokonsuman kvanton je 3 kvaronoj post pli ol ducent provoj.



8) Foje iu bredisto petis novan surtuton por anstataŭigi sian jam difektitan. Sun Leji rememorigis lin pri la amara pasinteco kaj montris al li la nuntempan feliĉon, kaj admonis ke li ne devas forlasi la vivostilon de laboremo kaj senluksemo. La bredisto kortuŝiĝis, mem flikis sian surtuton kaj ne plu petis novan.



9) Havante la patrolandon en sia koro kaj ne forgesante la klasfratojn, li petis al la politika direktanto transdoni cent kvindek juanojn, kiujn li ŝparis dum pluraj jaroj, por subteni la popolon en regiono trafita de natura katastrofo.



10) Okaze de la Nacia Festotago en 1964, li vidis en Pekino la plej estimatan kaj amatan gvidanton Prezidanto Maŭ. En sia taglibro li skribis: Gloron al la granda penso de Maŭ Zedong.




# Kokardo kaj Koluma Insigno de la Ruĝa Armeo

Sekvante la instruon de la granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ kaj heredante kaj disvolvante la revolucian tradicion de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo, la Ĉina Popola Liberiga Armeo abolis de 1 jun. 1965 la sistemon de militistaj rangoj. De tiam, la batalantoj kaj komandantoj portas la samajn insignojn, kokardon de kvinpinta ruĝa stelo kaj koluman insignon de ruĝaj oblongoj, kiujn siatempe portis la malnovaj ruĝarmeanoj.

Oni ja havas apartan senton por la kokardo kaj koluma insigno de la malnovaj ruĝarmeanoj. Ĉar en la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito la anoj de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo jam portis tiujn ruĝajn insignojn sur la kaskedo kaj kolumo. Tio estis la signo de la proleta revolucia armeo sub la gvido de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj simbolo de la klasa amikeco, kiun havis inter si la anoj de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo, kies superuloj kaj subuloj, oficiroj kaj soldatoj estis en unueco kaj vivis, batalis kaj unuiĝis kune.

Prezidanto Maŭ diris: "**La ĉina Ruĝa Armeo estas armita kolektivo por efektivigi la politikajn taskojn de la revolucio.**" Hodiaŭ, la komandantoj kaj batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo denove portas sur si la samajn kokardon kaj koluman insignon, kiujn uzis siatempe la malnovaj ruĝarmeanoj. La brilanta ruĝa stelo montras ke sub la firma gvido de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ, la Ĉina Popola Liberiga Armeo estas revolucia armita forto eksterordinare proleteca kaj plena de batalspirito, heredante kaj disvolvante la revolucian tradicion de la Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo, ĝi kuraĝe marŝos antaŭen por ĉiam.






EL POPOLA ĈINIO

人民中国报道

Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

**N-ro 11 (113) 1967**


## Ĉefa Enhavo


Bombardu la Komandejon (Mia Dazibaŭ-o)

Prezidanto Maŭ Inspektis Nordan, Sud-centran kaj Orientan Ĉinion

Ĉie Cirkulas la Ĝojiga Informo tra la Lando

Ĝisfunde Frakasu la Burĝan Komandejon

Ĉu Iri la Socialisman aŭ Kapitalisman Vojon?

Daĝaj-brigado Antaŭenmarŝas en la Batalo kontraŭ la Ĉina Ĥruŝĉov

Krimagoj de la Ĉina Ĥruŝĉov en la Orientazia Lanŝpinteksa Fabriko

Himno al la Milita Penso de Prezidanto Maŭ

Ĉiam Tenu Firme la Pafilon en la Manoj

La Fajrego de la Aŭtunrikolta Leviĝo Brulu tra la Tuta Mondo

Historio pri Nian Sivang

Vigla Disvolviĝo de Popolaj Armitaj Bataloj en Sudorienta Azio

La Penso de Maŭ Zedong Direktas la Justan Batalon de la Usonaj Nigruloj

Senfina Estas la Amo de Prezidanto Maŭ (*popolkantoj*)

Signifoplena Amuza Kunveno

*Sur la kovrilo* — La maljuna fiŝisto rakontas pri la mara geriltaĉmento sub la gvido de Prezidanto Maŭ, kiu donis solidajn batojn al la japanaj agresantoj kaj Ĉiang Kajŝekaj banditoj ĉe Langja-rifo. (Sceno el *Batala Kanto sur Nokta Maro*)

*Sur la dorskovrilo* — Somera Paŝtejo de Hulunber en Interna Mongolio



La ĉinaj revoluciaj artistoj prezentas la dancon "Himno al Ŝtormo" en la kamparo de Albanio.



世界語「人民中国報道」月刊一九六七年第十一期（本刊代号[illegible]五）